



EL POPOLO CĪNIO

人民中國報通

3

1970

Vortoj de Prezidanto Maŭ

La revolucia amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj estas provita en intensa internacia klasbatalo.

Niaj du partioj kaj niaj du popoloj ĉiam estos en unuiĝo kune, ĉiam batalos kune kaj ĉiam venkos kune, kio ajn okazos en la mondo.



Intime manpremas kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado Enver Hoxha la fondintoj de la revolucia amikeco inter la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio.



Albanaj amikoj venis al la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio ĉe nia ĉefurbo por kune celebri la brilan feston de la 25-a datreveno de la liberiĝo de Albanio kaj ili estis varme bonvenigataj de la komunumanoj.



Bonvenigu la Grandajn Sepdekajn Jarojn

Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*, la gazeto *Hongqi*
kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao* por la novjara tago de 1970

Forpasis la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento. La proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo, fiere marŝis en la grandajn sepdekajn jarojn per gigantaj batalaj paŝoj.

Turnante siajn okulojn al la tuta terglobo kaj rigardante antaŭen al la estonto, la popolo de ĉiuj nacioj en nia lando estas plena de ekscitiĝo kaj kore deziras eternan vivon al Prezidanto Maŭ, nia granda gvidanto kaj la revolucia instruanto de la proletaro!

Je la komenco de la sesdekaj jaroj, Prezidanto Maŭ montris kun granda malproksimvideco: “La sekvantaj 50 ĝis 100 jaroj proksimume deponit nun estos granda erao de ĝisfunda ŝanĝo de la socia sistemo en la mondo, estos mondrenversa erao, kun kiu neniu ajn pasinta historia erao povas sin kompari.”

La historio de la sesdekaj jaroj elokvente pruvigis tiun grandan antaŭdiron de Prezidanto Maŭ.

La pasinta jardeko estis jardeko, en kiu la **mal-amiko putriĝas tagon post tago, dum nia afero pliboniĝas kun ĉiu tago**; estis jardeko, en kiu Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso faris publikajn polemikojn kaj intensan lukton kontraŭ moderna reviziismo kaj gajnis grandajn venkojn; kaj estis jardeko, en kiu vigle kaj impete disvolviĝis la granda batalo fare de la tutmondaj revoluciaj popoloj kontraŭ imperiismo estrata de Usono, moderna reviziismo kun sovetunia reviziismo kiel la centro kaj la diverslandaj reakciuloj.

En la pasinta jardeko, sub novaj kondiĉoj, la revoluciaj movadoj de la proletaro kaj la vastaj popolamasoj balais la tutan mondon per la impeto

de lavango kaj forto de fulmotondro. La naci-liberiga movado antaŭentorentis en ĉiam pli altaj tajdoj. Revoluciaj marksism-leninismaj politikaj partioj kaj organizoj kreskis tagon post tago en batalado. Kapitalismo nesaveble kadukiĝas, dum socialismo prosperiĝas kun nehaltigebla forto. La granda socialisma Ĉinio staras kiel giganto en la Oriento de la mondo. Albanio, la brila lampo de socialismo en Eŭropo, disradias ankoraŭ pli pompe. Per siaj feraj pugnoj la heroo vjetnama popolo peze batis la usonan imperiismon ĝis kaprompiĝo. La granda vero eldirita de Prezidanto Maŭ “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**” kuraĝigas ĉiam pli vaste la popolojn en la regionoj de Azio, Afriko kaj Latin-ameriko en ilia armita batalo. La digo de la kolonia sistemo de imperiismo disfalis parton post parto. La furiozaj flamoj de revolucio jam etendiĝis en la “**korajn regionojn**” de imperiismo. La financa kaj mona krizo skuanta la Okcidenton kaj la pli kaj pli serioza kaj profunda ekonomia krizo metis kapitalisman ekonomion en ankoraŭ pli senesperan staton. La malnova mondo ŝanceliĝas en ventoj kaj pluvoj, vulkanoj erupciis sinsekve kaj kronoj falis sur teron unu post alia. Nenie sur la tuta terglobo imperiismo povas trovi plu “**trankvilan oazon**”.

Nelonge post kiam la usona imperiismo grimpis sur la hegemonian pozicion de la monda kapitalismo post la Dua Mondmilito, ĝi jam falis de sur la kulmino. Ĝi entreprenas armad-ekspansion kaj milit-preparon, ĉie faras agreson kaj starigas militajn bazojn, metante multajn pendigmaŝojn ĉirkaŭ sian propran kolon, kiuj estas pli kaj pli streĉataj de la mondaj popoloj. En Usono, kiu nomas sin la “**plej riĉa**” lando en la mondo, dekmilionoj da popolanoj suferas de pliiĝantaj mizero kaj malsato. La batalo de la proletaro kaj vastaj popolamasoj de Usono kontraŭ la monopola kapitala kliko kaj la batalo de usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo ĵetis la reakciajn regantojn de Usono en panikon. Neniu el la mastroj de la Blanka Domo trovis magian panaceon por savi la usonan imperiismon de ĝia dekadenco. La Wall-strataj mastroj, kiuj fanfarone priskribis la dudekan jarcenton kiel “**jarcenton de Usono**”, nun senpove lamentas, ke Usono eniris siajn “**malfacilajn jarojn**”. La rapida dekadenco de la usona imperiismo okulfrape montras, ke la kapitalisma sistemo jam venis al ekstreme profunda kaj nova ĝenerala krizo.

La sovetunia reviziisma renegata kliko — la centro de moderna reviziismo — iras pli rapide al kompleta bankroto. La klaŭno Ĥruŝĉov, kiu

paradaĉis kiel venkinta heroo dum nelonga tempo, jam fariĝis balaaĵo abomenata de la homaro. Liaj sekvantoj Breĵnev kaj similaj estas multe pli malbonaj kaj ilia stato plimalboniĝas jaron post jaro; ili dronis en sennombraj krizoj en- kaj eksterlandaj. Ili praktikas faŝisman diktaturon enlande kaj faras agreson kaj ekspansion eksterlande, kio komplete malkaŝis ilian vizaĝon de social-imperiismo kaj kaŭzis pli kaj pli fortan reziston de la popoloj de Sovetunio kaj aliaj landoj en la mondo. La apero de la sovetunia reviziisma social-imperiismo estas nur epizodo en la procezo de la kompleta disfalo de imperiismo. Ĝi povas savi nek la tutan imperiisman sistemon de ĝia falo, nek sin mem el perejo. La tiel nomata “**Breĵnev-doktrino**”, analize ĝis la fino, estas nenio alia ol vario de antaŭmorta nov-koloniismo.

Kontraste al la marasma kaj kaduka stato de imperiismo kaj social-imperiismo, la socialisma Ĉinio sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ fariĝis ankoraŭ pli firma, prospera, potenca kaj viglecplena. Prezidanto Maŭ persone gvidas nian partion disvolvi, kune kun la marksist-leninistoj de la mondo, la grandan polemikon kontraŭ moderna reviziismo, kio preparis kondiĉojn en ideologio, teorio kaj politiko por ankoraŭ pli grandaj venkoj de la monda proletara revolucio. La venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ frakasis la sonĝon de la imperiistoj kaj reviziistoj pri restaŭro de kapitalismo en Ĉinio, kaj malfermis en la historio de la internacia komunisma movado brilan vojon por firmigi la proletaran diktaturon kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino. La granda Maŭzedongpenso senprecedence populariĝas inter la sepcent milionoj da popolanoj. Estas pli kaj pli plene manifestiĝanta la profunda kaj vasta historia influo de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. Nia granda socialisma patrolando fariĝis potenca politika forto de nia epoko en la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo; ĝi fariĝis la plej fidinda amiko de la proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de ĉiuj landoj kaj fariĝis la espero de la monda revolucio.

La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion. Tra la granda tumulto, granda splitiĝo kaj granda reorganizo en la sesdekaj jaroj, la revoluciaj fortoj de la mondo pligrandiĝis kaj la klasa dividlinio fariĝis klara. La nova disvolviĝo de la fundamentaj kontraŭdiroj de la mondo neeviteble daŭre kaŭzos revolucion. La

sepdekaj jaroj estos jaroj, en kiuj la ŝtormo de la popola revolucio levigos ankoraŭ pli impete en la tuta mondo; estos jaroj, en kiuj imperiismo pli rapide disfalos en la sennombraj kontraŭdiroj; kaj estos gravaj jaroj, en kiuj la tutmondaj revoluciaj fortoj faros furiozan lukton kontraŭ la agoniaj kontraŭrevoluciaj fortoj. La usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo neniel povas eskapi sian destinitan fatalon de pereco, kiel ajn ili koluzias unu kun la alia kaj konkure luktas unu kontraŭ la alia por influ-sferoj, kaj kiom ajn da maĥinacioj kaj ruzoj ili ludas kaj kian ajn agresan militon ili lanĉas. Kaj ili ne povos daŭri multajn tagojn.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **Ĉinio devas fari pli grandajn kontribuojn al la homaro.** Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, niaj granda partio, granda popolo, granda lando kaj granda armeo certe povas plenumi la glorajn taskojn al ni asignitan de la historio kaj certe ne vanigos la esperon metitan de la monda popolo sur nin. En la nova jaro, la tuta partio, la tuta armeo kaj la tutlanda popolo devas des pli kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, pluapase armi sin per Maŭzedongpenso, antaŭenpuŝi kaj ekzameni la movadon de batalo, kritiko kaj reformo per la granda strategia penso de Prezidanto Maŭ **“Altigu la singardemon, defendu la patrolandon”** kaj **“sinpreparu kontraŭ milito, sinpreparu kontraŭ naturaj katastrofoj kaj faru ĉion por la popolo”**. Oni devas esti singardaj kontraŭ memfiereco kaj malpacienco, kaj plenumi ankoraŭ pli bone kaj rapide ĉiujn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio.

Nuntempe, la amasa movado de batalo, kritiko kaj reformo profunde disvolviĝas sur ĉiuj frontoj. La proletaraj politikoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ estas pluapase kaj ĉiufланke efektivigataj. Novaj aferoj de la proletaro kun senfina vivforto aperas ĉie. Ni devas kombini la grandan amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kun ĉiuj laboroj de batalo, kritiko kaj reformo. Ni devas firme teni kiel la ĉefĉeneron la batalon inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj kaj efektivigi la fundamentan taskon firmigi la proletaran diktaturon en ĉiuj bazaj unuoj. Ni devas daŭre disvolvi la amasan revolucion kritikon por likvidi la restantajn venenajn influojn de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. En la ideologia kaj kultura sferoj, ni

devas alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj daŭre likvidi la ideologiajn influojn de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluatataj klasoj; en la politika sfero ni devas bone fari taskojn de purigo de la klasaj vicoj laŭ la politikoj de la Partio kaj plifortigi la diktaturon super plenmano da kontraŭrevoluciaj fortoj; kaj en la ekonomia sfero ni devas plifirmigi kaj disvolvi la socialisman ekonomian bazon kaj laŭplane bati la korodajn kaj subfosajn aktivadojn de la burĝaro. Ni devas persisti ĉe la revolucio en la kampoj de edukado, scienc-esploro, literaturo kaj arto, ĵurnalismo, higieno kaj aliaj, kaj profunde konduki ĝin por akiri novajn sukcesojn kaj novajn spertojn.

Dum la Naŭa Kongreso de la Partio, Prezidanto Maŭ ripetade montris: **“Oni nepre devas lerte kapti tipajn ekzemplojn.”** **“Rilate al laboro de la tuta sfero, oni devas unue kapti bone la trionon.”** Ni devas firme efektivigi tiun ekstreman gravan instrukcion de Prezidanto Maŭ, fari ĉiufланkajn planojn kaj profunde, detale, aktive kaj zorgeme plenumi ĉiujn laborojn de batalo, kritiko kaj reformo laŭ stadioj kaj en grupoj.

Sur la bazo de purigo de la klasaj vicoj, estas necese firme teni la partian ordigon kaj partian konstruon. Konstrui nian partion per la granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo estas la radika garantio por disvolvi la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj estas problemo de fundamenta graveco por pluapase solidigi la proletaran diktaturon por jarcentoj. Tra la procezo de la partia ordigo kaj partia konstruo, de la komenco ĝis la fino ni devas meti en la unuan lokon la ordigon en la ideologia kampo, serioze studi la novan statuton de la Partio, serioze eduki la partiajn membrojn kaj la aktivulojn, kiuj petas aliĝi al la Partio, per la teorio de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso pri partio kaj per la teorio pri la interrilatoj de la gvidanto, la politika partio, la politika potenco, la klaso kaj la amasoj kaj kritiki diversspecajn reakciajn burĝarajn pensfluojn dekstrajn aŭ ultra-“maldekstrajn”. Ni devas korekte kaj bone fari la laboron de **“elimino de malfreŝaĵo kaj enpreno de freŝaĵo”**. Ĉiu membro de la Komunista Partio devas ekzameni sin mem per la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj la postuloj difinitaj en la nova statuto de la Partio kaj ĝisfunde remuldi sian mondkoncepton.

Kun la profunda disvolviĝo de la movado de batalo, kritiko kaj reformo, nun aperas nova alta tajdo de industria kaj agrikultura produkto. La

gvidantaro de ĉiuj niveloj devas stari ĉe la fronto de la amasa movado kaj ĉiuflanke efektiviĝi kaj plenumi la ĝeneralan linion **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”** formulitan de Prezidanto Maŭ kaj lian grandan instrukcion **“teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**, por ke la movado penetrive kaj longdaŭre disvolviĝu antaŭen laŭ la trako de Maŭzedongpenso. Se nur ni plene elvolvas la iniciativon de la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la revoluciaj intelektuloj, unuiĝas kun ĉiuj unuiĝeblaj fortoj kaj plene elvolvas la superecon de la socialisma sistemo, nia lando certe povas atingi kaj superi la progresintajn mondajn nivelojn en industria kaj agrikultura produkto kaj en scienco kaj tekniko. La principoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ pri **“sinapogo sur propraj fortoj”** kaj **“penado en malfaciloj”** devas esti efektivigataj en ĉiu provinco, ĉiu gubernio, ĉiu baza unuo kaj ĉiu entrepreno. Oni devas atenti enketon kaj studon pri la problemoj koncernantaj politikojn en ekonomiaj laboroj. Farante planojn oni nepre devas mobilizi la amasojn kaj priatenti rezervi sufiĉe da interspaco.

Prezidanto Maŭ lastatempe montris: **“Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj oponu kontraŭ agresa milito lanĉita de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo, precipe kontraŭ agresa milito kun atombomboj kiel armiloj! Se okazos tia milito, la popoloj de la tuta mondo devos ekstermi agresan militon per revolucia militio, kaj de nun devas sinprepari!”**

Tiu ĉi granda instrukcio de Prezidanto Maŭ, kun marksism-leninisma antaŭvido montris la batalan direkton por la popoloj de la tuta mondo kaj havas profundan historian kaj aktualan signifon. Imperiismo signifas militon. La tutmondaj popoloj nepre devas centoble altigi sian revolucion singardemon! La tuta ĉina popolo nepre devas centoble altigi sian revolucion singardemon! Ni devas plene prepari nin en ideologio kaj materio. La centralizita gvido de la Partio devas esti fortigita. La gvidantaj organizoj de ĉiuj niveloj devas pluapaaŝe efektiviĝi la proletaran revoluciigon en ideologio, organizo kaj labor-stilo, elitigi la trupojn kaj simpligi la administradon por adaptiĝi al la bezono de

preparo kontraŭ milito. Ni devas firmigi kaj perfektigi la revolucionajn komitatojn ĉe ĉiuj niveloj kaj daŭre fortigi la revolucion grandan unuiĝon kaj la revolucion triflankan kombiniĝon kaj unuiĝi en la komuna batalo kontraŭ la malamikoj. Estas necese fortigi la unuiĝon inter la armeo kaj la popolo kaj inter la armeo kaj la registaro. La Ĉina Popola Liberiga Armeo devas daŭre disvolvi sian gloran revolucionan tradicion kaj la spiriton servi la popolon tutkore kaj tutanime, daŭre bone fari la laborojn de subteno al industrio, subteno al agrikulturo, subteno al la vastaj amasoj de maldekstruloj kaj de milita kontrolo kaj milita kaj politika trejnado, devas gajni pluapaaŝan progreson en politiko kaj militafero, persisti en elstarigo de la proletara politiko, ĉiuflanke efektiviĝi la kvar bona-ojn, tio estas, bona en politiko kaj ideologio, bona en la “tri-ok”-a labor-stilo, bona en milita trejnado kaj bona en viv-arangĝo, plifortigi la batalan kapablon kaj esti ĉiam preta por fari novajn kontribuojn en la defendo de nia granda socialisma patrolando.

Disvolvi diplomatiajn rilatojn kun ĉiuj landoj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto de longe estas nia konstanta politiko. Sed ni neniel povas toleri invadon kaj okupadon de nia sankta teritorio fare de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo. Ni nepre liberigos Tajvan, la sanktan teritorion de nia patrolando! Se imperiismo kaj social-imperiismo aŭdacos invadi nian landon, do ni decideme dronigos ilin en la vastan oceanon de popola milito!

Disvolviĝas la revolucio kaj antaŭenmarŝas la popolo. La aŭroro de nova mondo sen imperiismo, sen kapitalismo kaj sen la ekspluata sistemo jam brilas antaŭ ni. Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu! Proletaro kaj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la mondo, unuiĝu! **Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon!**

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu, longe vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

El Popola Ĉinio, n-ro 2, 1970



Ĉina specialisto (*la meza*) kaj albanaj laboristoj interkonsiliĝas pri la teknologio de fabrikado de nova produktaĵo kamoŝafto.



Sube maldekstre: Albanaj artaj laborantoj venis al la Orientmara Floto de Ĉinio kaj kantis por la komandantoj kaj batalantoj de la mar-armeo la kanton "Ni Estas Veraj Amikoj", komponitan de ili mem, kun vortoj de Prezidanto Maŭ kiel teksto.



Sube dekstre: Ĉinaj kaj albanaj junuloj ligiĝas koron kun koro.



Alte tenante portretojn de la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha kaj la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, cent mil popolanoj de diversaj rondoj de la albana ĉefurbo Tirana okazigis solenan mitingon de albana-ĉina amikeco sur la placo Skanderbeg.

Post rigardo de prezentado farita de la Propaganda Taĉmento de Maŭzedongpenso de nia Ĉefurba Ferŝtala Kompanio, albanaj literaturaj kaj artaj laborantoj suriris la scenejon kaj laŭte kriis kune kun la ludantoj: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu kamarado Hoxha!"



Gratula Telegramo de Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin kaj Ĉefministro Ĝoŭ al Kamaradoj Enver Hoxha, Haxhi Lleshi kaj Mehmet Shehu

Okaze de la 25-a datreveno de la liberiĝo de Albanio

Kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kamarado Lin Biaŭ, Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj kamarado Ĝoŭ Enlaj, Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, sendis telegramon je la 28-a de novembro, 1969, al kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo, la Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, kamarado Haxhi Lleshi, Prezidanto de la Prezidentaro de la Popola Asembleo de la Albana Popola Respubliko, kaj kamarado Mehmet Shehu, Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Albana Popola Respubliko, esprimante la plej varman gratulon okaze de la 25-a datreveno de la liberiĝo de Albanio. La telegramo tekstas jene:

Tiraneo

Kamarado Enver Hoxha, la Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro

Kamarado Haxhi Lleshi, Prezidanto de la Prezidentaro de la Popola Asembleo de la Albana Popola Respubliko

Kamarado Mehmet Shehu, Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Albana Popola Respubliko

Karaj kamaradoj:

Je la tempo, kiam la frata albana popolo ĝoje celebras la 25-an datrevenon de la liberiĝo de sia patrio kun triumfa sento, ni esprimas en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio, la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la tuta ĉina popolo la plej varman gratulon al vi, al la Albana

Partio de Laboro, al la Registaro de la Albana Popola Respubliko kaj al la tuta albana popolo.

Antaŭ 25 jaroj, sub la gvido de la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha, la albana popolo ekprenis pafilojn, brave sturmis unu post alia kaj venkis la faŝismajn okupantojn de Italio kaj Germanio post malcedema kaj longtempa batalado sinapogante sur siaj propraj fortoj, kaj liberigis sian patrion. Tio estas granda venko en la historio de revolucia batalo de la albana popolo.

En la 25 jaroj post la liberiĝo, sub la saĝa gvido de la Albana Partio de Laboro, la heroo albana popolo, alte tenante la ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo, timante nek malfacilojn nek perfortojn, frakasis la renverson, detruon kaj subfosadon de internaj kaj eksteraj klasaj malamikoj, kaj defendis la sendependecon de la patrio kaj la socialisman ŝtaton. La albana popolo persistas en la proletara diktaturo kaj senŝanceliĝe iras sur la socialisma vojo, kaj akiris brilajn atingojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La revoluciiga movado de Albanio puŝis la socialisman revolucion al pli profunda etapo, multe ŝanĝis la spiritan fizionomion de la popolo kaj akcelis pluapaŝe la viglan disvolviĝon de la socialisma konstruado. La albana popolo faris bravan bataladon kontraŭ imperiismo estrata de Usono, moderna reviziismo kun la gvida kliko de la sovetunia reviziismo kiel la centro kaj la diverslandaj reakciuloj, kaj faris eminentan kontribuon por la revolucia afero de la mondaj popoloj. Hodiaŭ, socialisma Albanio jam fariĝis forta citadelo subtenanta la batalon de la proletaro kaj revoluciaj popoloj de diversaj landoj de la mondo por liberiĝo.

La brilaj venkoj akiritaj de la albana popolo estas venkoj de la proletara revolucia linio de la Albana Partio de Laboro estrata

de la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha. La Albana Partio de Laboro kaj albana popolo riĉigis la trezorejon de Marksismo-Leninismo per sia brila revolucia praktikado.

La ĉina popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio sentas senkomparan ĝojon pro la brilaj atingoj kaj grandaj venkoj akiritaj de sia kunbatalanto — la albana popolo kaj la Albana Partio de Laboro. En la longtempa komuna batalado, niaj du partioj, du registaroj kaj du popoloj starigis inter si profundan revolucionan amikecon. Nia amikeco estas bazita sur Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo, kaj estas provita de furiozaj ŝtormoj. La daŭra disvolviĝo de la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio certe havos ĉiam pli profundan influon al la internacia komunisma movado kaj la revolucia afero de la mondaj popoloj.

Nun, la revolucia batalo de la popoloj de la mondo jam eniris novan historian etapon. Kiel ajn freneze baraktas imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, ili neniel povos savi sin el sia neevitebla pereco. Iliaj tagoj restos ne multaj. Ni unuiĝu kun la proletaro de la tuta mondo kaj la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de ĉiuj landoj, por gajni pli grandan venkon!

Vivu la heroo albana popolo!

Vivu la eterna kaj nerompebla batala amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!

Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

Lin Biao, Vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

Ĝou Enlaj, Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko

La 28-an de novembro, 1969

Kunveno en Pekino por Celebri la Brilan Festtagon de Albanio

JE la 28-a de novembro 1969, pli ol 1,000 revoluciaj kadroj kaj revoluciaj [popolanoj de nia ĉefurbo Pekino solene kunvenis por varme celebri la 25-an datrevenon de la liberiĝo de Albanio kaj la venko de ĝia popola revolucio. La kunveno adreŝis varman festan gratulon al la heroo albana popolo kaj esprimis firman subtenon al ĝia konduko de batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo ĝis la fino.

La celebran kunvenon ĉeestis Kang Ŝeng, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Huang Jongŝeng, membro de PB CK KPĈ kaj estro de la Ĉefstabo de ĈPLA, Jaŭ Venĵuan, membro de PB CK KPĈ, Hie Fuĝi, membro de PB CK KPĈ, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj ĉefkomitatano de la Pekina Revolucia Komitato, Vu Fahian, membro de PB CK KPĈ kaj vicedro de la Ĉefstabo de ĈPLA, Guo Moĵo, membro de CK KPĈ kaj vicedro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

La kunvenon ĉeestis invitite Xhorxhi Robo, albana ambasadoro al Ĉinio, Nane Kutra, vicedro de la Politika Departemento de la Albana Popola Armeo, kiu gvidas la Artan Ensemblon de la Albana Popola Armeo en vizito al Ĉinio, kaj ankaŭ aliaj albanaj kamaradoj en Pekino.

La celebra kunveno estis saturata de atmosfero de la revolucia solidareco kaj batala amikeco inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio. Meze de la profundo de la podio

pendas giganta portreto de kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albana popolo kaj intima kunbatalanto de la ĉina popolo kaj giganta portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj intima kunbatalanto de la albana popolo. Ambaŭflanke de la portretoj pendas la naciaj standardoj de Ĉinio kaj Albanio. Sur la muro kontraŭ la podio estas slogano en ĉina kaj albana lingvoj: "Eterne verdu la granda amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj!"

Kamarado Hie Fuĝi kaj kamarado Robo faris paroladojn plenajn de proletara amikeco.

En sia parolado kamarado Hie Fuĝi diris, ke la 25 jaroj post la liberiĝo de Albanio estas 25 jaroj batalaj, revoluciaj kaj triumfaj. Troviĝante en densa sieĝo de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, la heroo albana popolo persistas en la diktaturo de proletaro kaj en iro de la socialisma vojo. Observante la grandan instruon de kamarado Enver Hoxha "**konstrui socialismon kun pioĉo en unu mano kaj pafilo en la alia**", la albana popolo frakasis renversan intrigon kaj subfosan aktivadon de klasaj malamikoj en kaj ekster la lando, akiris brilajn venkojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj tiel konstruis la malriĉan kaj postĝintan Albanion en progresan socialisman landon.

Li diris, ke la Albana Partio de Laboro kaj la albana popolo plenumas marksism-leninisman linion, persistas en vero kaj kuraĝas batali, firme staras en la antaŭaj vicoj de la batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, kun nobla



proletara internaciisma spirito subtenas aktive revoluciajn liberigajn batalojn de ĉiuj subpremataj popoloj kaj ĉiuj subpremataj nacioj tra la mondo kaj tiel faris gravan kontribuon en defendo de Marksismo-Leninismo kaj akcelo al la monda revolucio.

Li daŭrigis, ke ĉiuj atingoj de la albana popolo en la 25 jaroj post la liberiĝo estas akiritaj dank' al la korekta gvido de la Albana Partio de Laboro estrata de la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha kaj al la senlaca klopodo kaj sinforĝesa laboro de la albana popolo. La heroa Albanio meritas la nomon nedetruibla citadelo de socialismo firme staranta sur la kontinento de Eŭropo.


Kamarado Hie Fuĝi emfazis, ke la monda revolucio jam eniris grandan novan epokon. La revolucia movado de la proletaro kaj popoloj de ĉiuj landoj tra la mondo estas en vigla disvolviĝo; la usona imperiismo kaj sovetunia reviziisma social-imperiismo sin trovas en senelirejo de malfaciloj internaj kaj eksteraj kaj en senprecedenca izoleco, iliaj tagoj fariĝas ĉiam pli malfacilaj. Komplotante inter si kaj luktante unu kontraŭ la alia, ili faris ĉiajn malbonojn. Por sin liberigi el la nuna embaraso, ili unuflanke dissemas energie iluzion pri "paco", aliflanke intensigas armeekspansion kaj militpreparon, por fari novan militan aventuron, eĉ fari nuklean minacon al nia lando. Kontraŭ la kontraŭrevolucia duvizaĝa artificio de la usona imperiismo kaj social-imperiismo ni tenas altan singardemon. Nia principo estas: **"Se neniuj atakoj nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin."** Se la usona imperiismo kaj social-imperiismo trudos al ni militon, la ĉina popolo firme leviĝos al rezisto ĝis la fina venko.

En la fino kamarado Hie Fuĝi diris, ke "intimaj amikoj trans maro proksimas ja kvazaŭ naj-

baroj". Kvankam miloj da lioj apartigas Ĉinion kaj Albanion, tamen la komuna afero kaj komuna batalo intime ligas nin. La du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio starigis nedetruibajn batalan amikecon kaj revolucion unuigon en la komuna batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj en la afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La revolucia batala amikeco inter ni estas fondita de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha, estas provita de la intensa internacia klasbatalo. La forto naskita de tiu amikeco estas neelĉerpebla kaj vere senrivala. Observante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo firme subtenas la heroan albanan popolon, batalas ŝultrojn ĉe ŝultro kaj marŝas manon en mano kune kun la albana popolo en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

En sia parolado kamarado Robo diris, ke sub la gvido de la Albana Komunista Partio (t.e. la nuna Albana Partio de Laboro) estrata de kamarado Enver Hoxha, kun senprecedenca heroismo, la albana popolo venkis la du okupantojn — la itala faŝismo kaj germana naziismo kaj gajnis liberon kaj ĝisfundan sendependecon. Samtempe kun tio la politika regado de la bienuloj kaj burĝaro en Albanio renversiĝis kaj pasis por ĉiam.

Kamarado Robo diris, ke dum la 25 jaroj, sub la gvido de la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha Albanio firme marŝas sur la vojo de socialisma revolucio





Sur la prezidantara podio

kaj socialisma konstruado. En la pasinteco, Albanio estis unu el la plej postigintaj landoj en Eŭropo, hodiaŭ Albanio jam fariĝis progressa agrikultur-industria lando.

Kamarado Robo diris, ke la albana popolo, observante la instruon de la Partio, neniam forlasis sian pioĉon por konstrui la patruon kaj neniam demetis sian pafilon por defendi la socialismajn venkajn fruktojn kontraŭ minaco de agresoj kaj intrigoj de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj

social-imperiistoj kaj iliaj lakeoj al la Albana Popola Respubliko.

Li montris, ke nun en la mondo la ĝenerala krizo de imperiismo, reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj profundiga pliapaŝe. Por sin liberigi el tiu plorinda situacio, la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj modernaj reviziistoj obstine daŭrigas ekstreme reakcian agresan politikon kaj senĉese planas novajn intrigojn kontraŭ diverslandaj popoloj. Por efektivigi malnoblajn planojn kaj ekspansiajn politikojn, ili plenenergie plifortigas la kontraŭrevolucion sanktan aliancon inter Usono kaj Sovetunio. Hodiaŭ, la ĉefa atako de la kontraŭrevolucia uson-sovetunia alianco direktiĝas al la Ĉina Popola Respubliko, kiu estas la plej granda obstaklo netransirebla por la regantoj de la Blanka Domo kaj la novaj caroj de Kremlo en ilia kovado de intrigo.

En efektivigo de la kontraŭĉinia plano la sovetunia social-imperiisma Breĵnev-Kosigin-kliko jam preskaŭ freneziĝis, senkaŝe kriaĉis pri starigo de la t.n. "sistemo de kolektiva sekureco en Azio". La sovetuniaj reviziistoj delonge transiris de vortoj al aktivado. Ili faris sangajn provokojn kaj

Solena kunveno de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj popolanoj de la ĉefurbo por varme celebri la 25-an datrevenon de la liberigo de Albanio kaj la venko de ĝia popola revolucio



dislokiĝis siajn trupojn ĉe la landlimo inter Sovetunio kaj Ĉinio. Sed ĉiuj provokoj kaj intrigoj kontraŭ Ĉinio estas destinitaj al senhonta fiasko.

Kamarado Robo diris, ke la granda, eterna kaj senmorta amikeco ligas la albanan popolon kaj la grandan ĉinan popolon. La amikeco inter niaj du partioj, du popoloj kaj du socialismaj landoj estas vera revolucia batala amikeco bazita sur Marksismo-Leninismo kaj la proletara internaciismo. Tia amikeco estas starigita kaj fortikigita en la komuna batalo de la revolucio kaj socialisma afero, estas provita en ŝtormo de la revolucio kaj en la batalo por oponi kontraŭ la komunaj ĉiamamikoj — la imperiismo kaj la moderna reviziismo kaj defendi Marksismo-Leninismon, kaj estas nerompebla. Ni ĉiam estas veraj fratoj kaj intimaj kunbatalantoj ĉu en sunbrilaj tagoj ĉu en malfacilaj horoj.

Kamarado Robo entuziasme laŭdis la grandajn venkojn de la ĉina Granda Proletara Kultura Revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Li diris, ke la albana popolo, la Albana Partio de Laboro kaj la registaro de la Albana Popola Respubliko dekomence plenforte subtenas kaj laŭdas la ĉinan Grandan Proletaran Kulturajn Revolucion kaj varme aklamas pro la historia venko akirita en la batalo por frakasi la kontraŭrevolucionan renegatan klikon estratan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.

Li diris, ke la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio estas daŭrigo de la socialisma

revolucio sub la proletara diktaturo. Ĝi jam fariĝis granda lernejo por levi la revolucion kaj klasan konscion de la laboranta popolo kaj armis la vastajn popolamasojn per Maŭzedongpenso.

Li diris, ke la brilo de la ĉina Granda Proletara Kultura Revolucio lumigas la tutan mondon. Ĝi estas granda kaj neelĉerpebla fonto inspiranta ĉiujn subprematajn popolojn en la batalo kontraŭ imperiismo kaj brila ekzemplo por ĉiuj revoluciuloj kaj la laborista klaso en reviziismaj landoj alvokanta ilin sinĝeti en batalon, fari revolucion kaj rekonstrui proletaran diktaturon. Ĝi multe akcelis la mondan revolucion movadon.

Kamarado Robo varme laŭdis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio, ke ĝi estas kongreso de venko de la marksism-leninisma revolucia linio de Maŭ Zedong, de venko de la proletaro super la burĝaro kaj de venko de la socialisma vojo super la kapitalisma vojo. La historiaj dokumentoj de tiu kongreso estas granda ideologia trezorejo de Marksismo-Leninismo, kontribuo kun granda signifo al teorio kaj praktiko de Marksismo-Leninismo kaj multe riĉigis la historiajn spertojn de proletara diktaturo. Ĝi malfermis brilan perspektivon ne nur por la internacia komunisma movado, sed ankaŭ por la tutmondaj revoluciaj popoloj. La albana popolo aklamas pro tiuj brilaj atingoj, rigardas ilin kiel siajn venkojn kaj kiel grandajn venkojn de la revolucia afero kaj socialisma afero en la tuta mondo.

Membroj de la Arta Ensemblo de la Albana Popola Armeo kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kune kantas revolucion kanton.



La paroladoj de kamarado Hie Fuĝi kaj kamarado Robo vekis tondrajn aplaŭdojn en la kunvenejo.

Post la paroladoj, ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj laŭte kriis la sloganojn: "Ni varme celebru la 25-an datrevenon de la liberiĝo de Albanio!" "Ni firme subtenas la albanan popolon en la batalo kontraŭ

imperiismo kaj reviziismo!" "Vivu la heroo albanan popolon!" "Vivu kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de la albanan popolon kaj intima amiko de la ĉina popolon!" "Vivu Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolon!"

Post la kunveno, la Arta Ensemblo de la Albana Popola Armeo faris bonegajn prezentadojn.



La komandanto kaj batalantoj de la Albana Popola Armeo studas militajn verkojn de Prezidanto Maŭ.

La batalantoj de la Albana Popola Armeo diligente faras militan ekzercadon.



La Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio Revenis de Albanio al Pekino

Kamarado Enver Hoxha akceptas kamaradojn Li Hiannian kaj Li Deŝeng.





Sur la prezidantara podio de la celebra kunveno

PARTOPRENINTE la celebradon de la 25-a datreveno de la liberiĝo de Albanio kaj la venko de ĝia popola revolucio kaj farinte amikan vizitadon en Albanio, la Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio kun kamarado Li Hiannian kiel la estro, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj kamarado Li Deŝeng kiel la vicestro, alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio kaj ĉefo de la Revolucia Komitato de Anhuj-provinco, forveturis per speciala aeroplano de Tiraneo matene de la 4-a de decembro 1969 kaj venke revenis al la ĉefurbo de nia lando — Pekino posttagmeze de la 6-a, kun profunda revolucia amikeco de la albana popolo al la ĉina popolo kaj ĝia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio atingis Tiraneon je la 26-a de novembro. Tie la delegacio entuziasme celebris la 25-an datrevenon de la liberiĝo de Albanio kune kun la frata albana popolo, kiel propran grandan feston de la ĉina popolo.

La ĉina delegacio estis varme bonvenigata kaj feliĉe ricevis intiman akcepton de la albanaj partio, registaro kaj popolo, kaj ricevis feliĉan aŭdiencon de la granda gvidanto de la albana popolo kaj la plej intima amiko de la ĉina popolo kamarado Enver Hoxha. Dum la vizitado, la ĉina delegacio vizitis Tiraneon, Shkodra kaj Fier, kaj tie intervidiĝis kun la vastaj laborantaj amasoj, kio plie fortigis batalan unuiĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj Albanio.

En la 3-a de decembro, la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Konsilantaro de Ministroj okazigis bankedon en la palaco "Gerilo" de Tiraneo por regali la Partian kaj Registaran Delegacion de Ĉinio.

Kamarado Enver Hoxha, la granda gvidanto de Albanio kaj la Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, ĉeestis la bankedon.

En la bankedo, kamarado Mehmet Shehu kaj kamarado Li Hiannian faris paroladojn unu post alia.

Kamarado Shehu montris en sia parolado, ke la amikeco inter Albanio kaj Ĉinio forĝita de kamarado Hoxha kaj Prezidanto Maŭ estas nerompebla. La brila venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio faras Ĉinion pli granda kaj pli forta.

Kamarado Li Hiannian montris en sia parolado, ke la revolucia batala amikeco de la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio estas nedetru-ebla. La Albana Partio de Laboro faris gravan kontribuon en la internacia komunisma movado.

En la bankedo plena de plej varma kaj amika atmosfero, kamarado Enver Hoxha tostis por la nerompebla amikeco kaj batala unuiĝo de la du partioj kaj du popoloj de Albanio kaj Ĉinio, kaj por la frata sepcentmiliono popolo de Ĉinio kaj ĝia eminenta gvidanto Prezidanto Maŭ, la granda marksist-leninisto kaj plej intima amiko de la albana popolo.

Kiam la Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio forveturis de Tiraneo matene de la 4-a, en la aerodromo ĝin varme adiaŭis la gvidantoj de la albanaj partio kaj registaro Shehu kaj aliaj, kaj reprezentantoj de revoluciaj amasoj de Tiraneo. Post unutaga ripozo survoje, la ĉina delegacio revenis al Pekino en la posttagmezo de la 6-a. Al aerodromo ilin bonvenigis kamaradoj Ĉen Boda kaj Kang Ŝeng, membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Huang Jongŝeng kaj Hie Fuĝi, membroj de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj aliaj respondecaj kamaradoj de la centraj departementoj.

Ankaŭ kamarado Xhorxhi Robo, la ambasadoro de Albanio al Ĉinio, aliris por la bonvenigo.

La Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio vizitas la Termoelektran Centralon de Fier.



Grandiozaj Atingoj de Albanio en Industrio

SUB la ĝusta gvido de la Albana Partio de Laboro estrata de kamarado Enver Hoxha, la heroa albana laborista klaso akiris tre grandiozajn atingojn sur la ŝoseo de konstruado de socialisma moderna industrio en la pasintaj 25 jaroj.

La albana socialisma industrio komenciĝis de nulo kaj brile disvolviĝis de malgrando al granda. Antaŭ la liberiĝo, la malriĉa kaj postĝinta Albanio tute ne havis modernan industrion. Ĝi havis nur kelkajn manlabore ekspluatatajn minejojn tenatajn en la manoj de fremdlandaj kapitalistoj kaj kelkajn simplajn metiejojn. En tiu tempo eĉ najloj devis esti importataj. Hodiaŭ, la socialisma Albanio ne nur starigis siajn modernajn industriojn pezan kaj malpezan, sed ankaŭ ebligis al ili rapidan disvolviĝon. Kompare kun tiu en la antaŭliberiĝa 1938, la albana industria produktvaloro en 1968 kreskis de 8 ĝis 61.6 procentoj en la totala industria kaj agrikultura produktvaloro; la proporcio de industria produkto en la nacia enspezo kreskis de 4 ĝis 39.5 procentoj. La industria produktvaloro en 1968 kreskis je pli ol 51 obloj ol tiu en 1938, t.e. semajna industria

produktvaloro en 1968 egalas al la tutjara en 1938. Kaj la totala industria produktvaloro en 1969 kreskos je ĉ. 57 obloj ol tiu en 1938.

La brilaj atingoj de Albanio en starigo kaj disvolvado de la socialisma industrio estis akiritaj de la vastaj amasoj de la albana laborista klaso kaj aliaj laborantaj popoloj kiuj, sub la gvido de la Albana Partio de Laboro kaj kamarado Enver Hoxha, disvolvante la revolucion heroismon senĉese venkis malfacilojn post malfaciloj sur la vojo antaŭen kaj faris akran batalon kontraŭ la klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj. Tra la tuta proceso de efektivigo de socialisma industriigo en Albanio iris la brava kaj obstina batalo fare de la heroa popolo de la lando de agloj kontraŭ la senhontaj obstrukcadoj, subfosoj kaj blokadoj de imperiismo kaj moderna reviziismo. La modernaj reviziistoj perfide kaj unuflanke disŝiris interkonsentojn kaj retiris siajn "specialistojn" el Albanio kun vana provo detrui la socialisman konstruadon de Albanio. Sed la heroa albana popolo estis neniom timigita. Ĝi plifirmigis sian decidemon sendepende disvolvi la socialisman industrion sinapogante sur la propraj fortoj kaj


riĉfontoj de sia lando kaj ekspluatante la latentajn fortojn enlandajn. Kun pioĉo en unu mano kaj pafilo en la alia kaj disvolvante la revolucion spiriton de penema lukto, ili frakasis la subfosajn intrigojn kaj aliajn krimajn agojn de la malamiko kaj venke marŝas antaŭen sur la vojo de konstruado de socialismo.

Por firme efektiviĝi la orientilon unue disvolvi la pezan industrion kaj sendepende disvolvi la socialisman industrion, la Albana Partio de Laboro kaj la popolo faris grandajn kvantojn da laboroj por ekspluato de subteraj mineralaj riĉfontoj de sia lando. Disvolvante la heroan spiriton kuraĝi batali kaj kuraĝi venki, la geologiaj laborantoj de Albanio trovis mineralajn fontojn de nafto, kupro, kromo, karbo, fosforo ktp. en lokoj senperspektivaj laŭ asertoj de fremdlandaj burĝaraj "aŭtoritatoj", kaj tiel pretigis favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de iuj pezindutriaj fakoj. Kompare kun tiu en 1938, la produktokvanto de nafto de Albanio en 1968 kreskis je pli ol 9 obloj, tiu de kromo je 51, tiu de kupro je 34 kaj tiu de karbo je 135. Gigantaj atingoj estis akiritaj

ankaŭ en la prilabora industrio de tiuj mineraloj. Plena ekfunkcio de la Petrola Prilaborejo en Fier en la lasta tempo ĝisfunde frakasis la senhontajn asertojn de la eksterlandaj burĝaraj specialistoj ke la nafto de Patos estas neniel prilaborebla en Albanio kaj devas esti eksportata kiel krudaĵo, kaj manifestis la grandan talenton kaj neelĉerpeblan kreivon de la heroo albana laborista klaso.

Kelkaj grandaj kemiaj industriaj entreprenoj estis starigitaj en Albanio de post la komenco de efektiviĝo de la kvara kvinjara plano (1966—1970). La kvanto de nitrogena kaj fosfata sterkaj liveritaj de la kemia industrio al la agrikulturo en 1968 plimultiĝis je ĉ. 7 obloj ol tiu en 1965. Ankaŭ la elektropova industrio de Albanio disvolviĝis kun eksterordinara rapideco. Kun la finkonstruiĝo de serioj da hidroelektraj kaj termoelektraj stacioj, la elektropova totalo de Albanio en 1968 plimultiĝis je 75 obloj ol tiu en 1938. En tiu periodo ankaŭ la maŝina industrio de Albanio havis rimarkinde rapidan disvolviĝon. Kompare kun tiu en 1950, la produktkvanto de maŝinpartoj de la tuta lando en 1968 kreskis je 65


Laboristoj de la mekanika laborejo de la Traktor-maŝinparta Fabriko en Tiraneo estas en laboro.



obloj, kaj la totala produktvaloro de la maŝina industrio en 1969 egalas al la totala produktvaloro de la tuta industrio de la lando en 1950.

Donante la unuan lokon al la disvolvo de produktado de la produktaj rimedoj, Albanio akiris rimarkindajn atingojn en disvolvado de produktado de vivbezonaĵoj. Kun la sinsekva konstruiĝo de entreprenoj de malpeza industrio, la produktkanto de la malpeza industrio en 1968 altiĝis je ĉ. 44 obloj kompare kun tiu en 1938, i. a. tiu de kotonaj kaj lanaj ŝtofoj produktitaj de la ŝpinteksa industrio en 1969 egalas al 130 obloj de tiu en 1938, kaj la produktkanto de la manĝaĵa industrio altiĝis je ĉ. 37 obloj. Hodiaŭ, Albanio ne nur povas produkti la ĉefajn ĉiutagajn bezonaĵojn kiuj preskaŭ ĉiuj devis esti importataj en la pasinteco, sed ankaŭ povas eksporti ilin.


En la lastaj jaroj, senprecedence altiĝis la socialisma konscio de la albanaj laboristoj en la arda revoluciiga movado, ili ĵetis sin en la ardan socialisman konstruadon kun alta politika kaj produkta entuziasmo kaj forte antaŭenpuŝis la pluan rapidan disvolvon de la industria produktado. En 1968, la produktado de multaj industriaj branĉoj jam atingis la celajn difinitajn por 1970.



La Nitrogen-sterka Fabriko de Fier de Albanio




Laboristoj de la Termoelektra Centralo de Fier estas en laboro.



La laboristoj de la Spinteksejo "Stalin" en Tirane de Albanio levas ardan tajdon de produktado.

La profunda batalamikeco inter ĉinaj teknikistoj kaj albanaj laboristoj estas formita en komuna laboro kaj reciproka lernado.




La Socialisma Agrikulturo de Albanio en Prospero

KUN profunda disvolviĝo de la revoluciiga movado en la kamparo de Albanio, la vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj montras pli viglan entuziasmon kaj pli altan batalspiriton en laboro tiel ke venas unu post alia informoj pri novaj atingoj en diversaj frontoj de agrikulturo kaj ĉie regas vicleco kaj prospero.

Post la venka plenumo de la agrara reformo tra la tuta lando en 1946 radikalaj ŝanĝiĝoj okazis en la produktaj rilatoj en la kamparo, kio multe akcelis la disvolviĝon de la produktivaj fortoj kaj metis solidan fundamenton por la socialisma kolektivigo de agrikulturo. En tiu jaro, unuafoje fondiĝis nombro da agrikulturaj kooperativoj, ŝtataj agrikulturejoj kaj maŝinaj kaj traktoraj stacioj.

Ekde 1951, laŭ la direkto montrita en la kvar kvinjaraj planoj ellaboritaj de la Partio kaj registaro por disvolvi la nacian ekonomion, la vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj de Albanio kun volo strebi al prosperiĝo kaj potenciĝo daŭre levis la agrikulturan produkton jaron post jaro. Preĉipe post la Kvina Kongreso de la Albana Partio de



Abunda rikolto de tritiko en la agrikultura kooperativo "Maŭ Zedong" de Albanio

Laboro, mondrenversa ŝanĝiĝo aperis en la kamparo. En la kamparoj de kelkaj montregionoj, kie antaŭe ne troviĝis kooperativoj, la kooperativigo estis realigita en malpli ol tri monatoj post la kongreso, tiel ke en la tuta lando 98% de kamparanaj familioj kun 98% de la tuta areo de la agro aliĝis al agrikulturaj kooperativoj. Nun Albanio jam venke plenumis tra la lando la grandan taskon de agrikultura kolektivigo.

Post la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro grandskale disvolviĝas la revoluciiga movado en la vasta albana kamparo. La vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj faris intensajn atakojn kontraŭ la malnova ideologio de la ekspluata klaso en la kamparo, plene likvidis la religiajn superstiĉojn kaj postigintajn patriarkajn rajtojn kaj disvolvis la batalon por plena emancipiĝo de la virinoj. En la revoluciiga movado, sekvante instruojn de la Partio, la vastaj amasoj de kadroj en la kamparo peneme efektivas revoluciigon en sia ideologio kaj persiste partoprenas kolektivan produktan laboron, plibonigas la stilon en gvido kaj pliintimigas interrilaton kun la amasoj.

Dank' al profunda disvolviĝo de la revoluciiga movado kaj ĝenerala studo de la historio de la Albana Partio de Laboro kaj la verkoj de kamarado Enver Hoxha en la kamparo la plua revoluciigo en la ideologio de la agrikulturaj laboruloj estis multe akcelita. Tio multe pli levis ilian entuziasmon en revolucio kaj fervoron en laboro kaj forte antaŭenpuŝis pluan disvolviĝon de la agrikultura produktado. Laŭ la statistiko, la totala agrikultura produktvaloro de Albanio en 1968 kreskis ĝis pli ol trioblo de tiu en 1938 antaŭ la Liberiĝo, aŭ pliiĝis je 78% ol tiu en 1960.

Sekvante la instruon de sia granda gvidanto kamarado Enver Hoxha **“la batalo por memprovizi grenojn signifas kaj signifas la batalon por socialismo”**, kaj sub la aktiva subteno de la laborista klaso kaj la tuta popolo, la vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj de Albanio levis novan alttadjon en agrikultura produkto kun grena pliprodukto kiel la centro kaj akiris gigantajn sukcesojn. En 1968 la produktokvanto de la grenoj en la lando kreskis je 150% pli multe ol tiu en 1938, i. a., tiu de tritiko je pli ol 100%, tiu de maizo je 63% kaj tiu de rizo je 92%. Iuj montregionoj, kiuj ne povis sufiĉe provizi sin per grenoj en la pasinteco, jam

atingis grenan sufiĉan memprovizon kaj eĉ havas superfluaĵn grenojn por vendi al la ŝtato ekde 1966.

Krom pliprodukto de grenoj jaron post jaro, ankaŭ produkto de multaj ekonomiaj plantaĵoj rapide disvolviĝis. La produktokvanto de ekonomiaj plantaĵoj en 1968 kreskis je 22-oblo pli multe ol tiu en 1938, i. a. tiu de kotono je 76-oblo, kaj tiu de tabako je 7-oblo. Ankaŭ la plantareoj de fruktaroj kaj legomoj plivastiĝis jaron post jaro.

Rimarkindaj sukcesoj estis atingitaj ankaŭ en brutbredado de Albanio dum la pasintaj 25 jaroj. La totala nombro de bredataj bovoj en 1968 kreskis je 43% pli ol tiu en 1938.

Unu el la gravaj rimedoj prenitaj de la agrikulturaj laboruloj por pliprodukto grenon estis plivastigo de semareo de grenaj plantaĵoj. En la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro kamarado Hoxha diris: **“Por rapida disvolviĝo de agrikulturo, estas necese preni samtempe intensifikacion de agrikulturo kaj longtempan ekspluaton de virga tero.”** Varme respondante al la alvoko de la Partio, la vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj, batalantoj de la Popola Armeo kaj junaj volontuloj luktis kontraŭ la naturo kun sentima heroo



La ŝtata agrokultivejo de Durres akiris tomatan riĉrikolton.

spirito kaj kulturebligis pli ol 209,000 hektarojn da virga tero nur en la periodo de 1956 ĝis la nuna printempo. Post la starigo de la popola regpotenco en Albanio oni entreprenis grandskalajn laborojn por dreni marĉojn kaj tiel ricevis pli ol 30,000 hektarojn da fekundaj agroj.

La rapida disvolviĝo de irigacia konstruo estas unu el la gravaj faktoroj de la gigantaj atingoj en la agrikultura produkto de Albanio. Ĝis 1968, pli ol 242,000 hektaroj da tero en Albanio estis irigaciataj, t.e. la irigaciata areo kreskis ĝis 8-oblo de tiu en 1938.

Rimarkinde leviĝis ankaŭ la nivelo de mekaniko en agrikulturo kaj brutbredado. La lando nun havas sume 10,500 traktorojn (normajn), kaj sole en la Mallakaster-a Traktorstacio la totala sumo de traktoroj jam egalas tiun en la tuta Albanio en 1948.

Ankaŭ la senĉesa kreskado de produkto de kemiaj sterkoj de la lando multe kontribuis en la disvolviĝo de agrikultura produkto.



Albanaj gejunuloj konstruas ŝtuparkampojn sur sovaĝa monto.

Laboristoj de la ŝtata agrokultivejo de Shkodra de Albanio zorgeme faras kampan mastrumadon en vinberĝardeno por akiri bonan rikolton.



Luo Ĉundi kaj Ŝia Virina Montekspluata Taĉmento

HIEKENG-A produkta brigado de Joŭhi-gubernio de Fugian-provinco en nia lando troviĝas en fora montregiono. La tereno, kiun ĝi okupas, konsistas el 7 montoj kaj 7 grandaj ravinoj. La supraĵo de la 7 montoj ampleksas pli ol 22,000 muojn. Starante sur ties plej alta monto Tigrokapo kaj rigardante malsupren Hiekeng, oni vidas, ke ŝtuparkampoj viciĝas ĝis la monttalioj, kaj verdaj pinoj, bambuoj, kubeboj (*litsea cubeba*), oleaj kamelioj kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj prosperas ĉie sur la montoj.

La virina montekspluata taĉmento gvidata de la kompartianino Luo Ĉundi, kiu estas fame konata tra la tuta provinco, laboras sur la monto Tigrokapo. La hodiaŭaj pitoreskaj montoj de Hiekeng estis antaŭe tute sovaĝaj. Nur dank' al la laboremaj manoj de la membroj de la taĉmento, kiu venkis multajn malfacilojn, la montoj ricevis la nunan vivplenan prosperecon.

NASKIĜO DE LA VIRINA MONTEKSPLUATA TAĈMENTO

En 1962, kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis saĝan instrukcion pri disvolvo de la klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, la joŭhi-a popolo levis novan altan tajdon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. En la vintro de tiu jaro, la joŭhi-a gubernia komitato de la Partio alvokis la popolanojn de la tuta gubernio disvolvi forstan produktadon por subteni la socialisman konstruadon. La estro de virinoj de Hiekeng-brigado Luo Ĉundi pensis en si, ke ŝi estas kompartianino, kiu batalis kiel

iniciatinto kontraŭ bienuloj en la agrara reformo kaj, aktive respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ en la movado de agrikultura kooperigo, gvidis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn fondi la unuan agrikulturan kooperativon en Hiekeng. Nun, antaŭ la nova tasko, ŝi des pli devas agi kiel pioniro por la revoluciaj amasoj. Farinte firman decidon, ŝi pri kalkulis la laborfortojn de la brigado: Ĉi tie en la ravinoj la akvo estas malvarma, kaj estas ne oportune por virinoj labori en la rizkampoj. Tial la laborfortoj de viroj estas plene okupitaj de rizkampaj laboroj kaj ne estas ebleco elpremi laborfortojn el ili por montekspluatado. Sed, la problemo povos esti solvita, se oni organizos por tio la laborfortojn de la virinoj, kiuj sinokupas nur pri dommastrumado. La ideo de Luo Ĉundi trovis aprobon de la partia filio, do kun alta memfido ŝi tuj sin ĵetis en la ideologian mobilizadon por organizi la virinan montekspluatan taĉmenton.

Dum pluraj tagoj Luo Ĉundi iradis tien ĉi tien al 7 vilaĝoj por mobilizi la virinojn. Informiginte ke ŝi volas organizi virinan taĉmenton por ekspluati monton kaj planti arbojn, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiuj aprobis la ideon. Sed plenmano da klasaj malamikoj timis, ke virinoj suriros la vojon de revoluciigo kaj laborigo, ili do disvastigis la onidiron: “Alta estas la monto Diabla Kaverno, kaj danĝeraj estas ĝiaj vojetoj. Eĉ viroj neniam kuraĝis surgrimpi ĝin, kaj virinoj ne pensu pri ĝia ekspluatado.” Alfrontante la provokon de la klasaj malamikoj, Luo Ĉundi decideme diris: “Kun la gvido de Prezidanto Maŭ, ni virinoj de la nova Ĉinio ja kuraĝas iri la vojon neniam iritan de la

antaŭuloj.” Firme sin apogante sur la Partio kaj amasoj, ŝi foje-refoje frakasis la detruajn intrigojn de la malamikoj kaj decidis nepre fondi la montekspluatan taĉmenton. Luo Ĉundi komprenis, ke por batali kontraŭ la naturo kaj klasaj malamikoj oni nepre devas sin apogi sur la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. Ŝi do propagandis al virinoj kun alta fervoro la instruon de Prezidanto Maŭ: **“La ĉina virinaro estas granda fonto de homa forto. Tiu ĉi fonto nepre devas esti ĉerpata en la klopodo por konstrui grandan socialisman landon.”** Tiel ili ricevis profundan edukon. Tamen, iuj patrinoj kaj bopatrinoj timis, ke mankos homoj por fari hejmajn laborojn, se filinoj kaj bofilinoj iros al montoj. Luo Ĉundi do prenis sian familion kiel ekzemplon por konvinki ilin. La familio de Luo Ĉundi havas 6 membrojn, inter kiuj estas unu maljunulino kaj tri infanoj. Ŝi plene okupiĝas pri revoluciaj laboroj, ŝia edzo partoprenas en kolektiva laboro kaj estas bona komunumano kaj ŝia bopatrino plenumas la hejmajn laborojn por subteni ilin en revolucio, kaj krome ŝi ankoraŭ bredas plurajn porkojn

por akumuli sterkon por la kolektivo. La spirito de ŝia familio servi tutkore al la kolektivo kaj revolucio ricevis laŭdon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kiam altiĝis la konscio de la amasoj, sub la ekzempla agado de la familianoj de kadroj de la brigado, aro da filinoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj memvole sin anoncis por iri sur la montojn kaj planti arbojn sekvante Luo Ĉundi.

Renkonte al la matena suno, alte tenante ruĝan flagon kaj portante kun si hakilojn kaj manĝaĵojn, la virina montekspluata taĉmento kun alta batalvolo marŝis profunde en la montojn kun densa arbaro, sub la gvido de Luo Ĉundi.

LA UNUA BATALO SUR LA MONTO DIABLA KAVERNO

La taĉmento unue venis al la monto Diabla Kaverno malantaŭ la vilaĝo. Tiu sovaĝa monto kun periferio de pluraj lioj estis dense kovrita de



Dum laborpaŭzo Luo Ĉundi organizas siajn taĉmentanojn studi la dokumentojn de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

lianoj, dornaĵoj, herboj kaj arbustoj. En la malnova socio, por tirane propriĝi ĝin al si la bienuloj trompe fabrikis fabelon, ke sur la monto estas diablo en la kaverno. Se iu kuraĝus tuŝi herbon aŭ arbon sur la monto, tiu trafos malfeliĉon. Kun maltima spirito "kiel oni povas kapti tigridojn sen eniro en kavernon de tigro?" Luo Ĉundi kondukis ĉiujn iri pririgardi la "diablan kavernon". Atinginte la lokon, la taĉmentanoj vidis, ke la t. n. "diabla kaverno" estas tute malplena kaj nenio troviĝas en ĝi. Tiel tute forvaporigis la mistero pri la "diabla kaverno". La taĉmentanoj indigne diris: "En la pasinteco la bienula klaso trompis la amasojn por okupi la monton per feŭda superstiĉo. Nun la malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj fariĝis mastroj de la montregiono. Ni virinoj nepre devigos la sovaĝajn montojn elliveri valorojn kaj servi al la socialisma konstruado."

La unua laboro estis forigi herbojn, arbustojn kaj dornaĵojn altajn je homa staturo. Tiam 9 taĉmentanoj havis nur 5 hakilojn, sed ili ne cedis antaŭ la malfaciloj. Sub la varmega suno, ili hakis dornaĵojn sur kruta deklivo, krociĝante per unu mano al lianoj kaj ŝvingante per la alia la hakilojn. Tiuj, kiuj ne havis hakilojn, forigis sovaĝajn herbojn per ŝpatoj kaj ŝoveliloj. Tagmeze, sub la varmega suno ŝvito tramalsekigis ilin, sed neniu volis ripozi. Kiam ili soifis, ili trinkis akvon el fonto. Por satigi sin, ili manĝis iom da kunportitaj manĝaĵoj. En la unuaj tagoj, sur manoj de iuj taĉmentanoj aperis sangaj vezikoj kaj dornoj ĝissange pikis la manojn kaj piedojn de aliaj, tamen neniu plendis pro tio.

Iutage, kiam la 18-jara Joŭ Ĉunjing absorbite hakadis arbustojn, ŝi subite falis pro mispaŝo. Iu taĉmentano ŝerce diris: "Ĉunjing jam ne povas levi sin, estas necese forporti ŝin per novedzina palankeno!" Kaptinte la hakilon, Joŭ Ĉunjing tuj salte restariĝis. Ŝi ekpaŭtis kaj serioze



Luo Ĉundi gvidas siajn taĉmentanojn al montekspluatado.

diris: "Neniu povas min forporti. Mi laboros sur la montoj dum mia tuta vivo!" Ŝia respondo eksplodigis ĉiujn per rido kaj en ridado la taĉmento laboris pli entuziasme.

Por favorigi la laboron Luo Ĉundi kondukis ĉiujn anojn porti siajn litaĵojn al iu kabano ĉe la montpiedo kaj tie loĝi. Pro neuzado dum longa tempo, tiu kabano estis iom kaduka kaj ne povis bone ŝirmi la enloĝantojn de ventoj kaj pluvoj. Krome en ĝi abundis moskitoj. Sed la taĉmentanoj rigardis batalon kontraŭ malfaciloj pro la revolucio kiel ĝojon kaj gloron. Vespere ili forpelis moskitojn per fumado, kaj post tio ili sidis en rondo, kantis revoluciajn kantojn kaj faris revoluciajn rakontojn por altigi reciproke la la batalvolon. Disvolvante la revolucion opti-

mismon, ili brave batalis daŭre pli ol dek tagojn kaj fine forigis komplete la herbojn kaj fornaĵojn de la monto.

Apenaŭ forpasis la Printempa Festo de 1964, Luo Ĉundi kaj ŝiaj taĉmentanoj venis al la monto Diabla Kaverno, vadante en neĝotavolo, por ordigi la montsupraĵojn kaj fosi kavojn. Ili propramane transplantis sur la monton pli ol 30,000 arbidojn de pinoj kaj oleaj kamelioj. De tiam la monto Diabla Kaverno profunde dorminta mil jarojn ne restas plu sovaĝejo. La taĉmentanoj donis al ĝi novan nomon "Liberigo".

PLANTI VERDAJN PINOJN SUR LA MONTO TIGROKAPO

Kvazaŭ printempa vento, la sukceso de la virina taĉmento en konkero de la monto Diabla Kaverno atingis ĉiujn angulojn de la tuta mont-regiono kaj altiris al si pli kaj pli da virinoj. En la sekvinta jaro, la nombro de la taĉmentanoj kreskis ĝis kelkdek. Kun pli da fortoj, ili direktis nun siajn fortojn al batalo kontraŭ la plej granda monto Tigrokapo. La monto ricevis sian nomon ne nur pro tio ke ĝi forme similas al tigra kapo,

sed tie efektive troviĝis ankaŭ multaj aproj kaj tigroj. Veninte ĉi tien, ili unue ebenigis iun spacon por konstrui domon, kaj post finarango de la loĝejo ili tuj komencis forigon de herboj kaj arbus-toj kaj bruligon de la forhakaĵoj sur la monto. En la unua monato glate iris ilia laboro, kaj iom post iom ili forgesis la ekziston de tigroj. Sed, iuvespere, taĉmentanoj Ĉen Hiuĝen k. a. haste kuris maltrankvile al Luo Ĉundi por informi ŝin pri sia renkontiĝo kun tigro. Okazis, ke en tiu tago Ĉen Hiuĝen kaj aliaj tri virinoj descendis la monton por preni ion. Jam estis krepuska vespero, kiam ili revenis. Sur la revena vojo ili renkontis tigron, kiu eliris por serĉi nutraĵon. Vidinte multajn homojn, la tigro forkuris de malproksime. Sed ili unuafoje vidis tigron, tio neeviteble iom konsternis ilin. Por altigi la batalvolon de la taĉmentanoj, Luo Ĉundi en la sama vespero rakontis al ili pri sia renkontiĝo kun tigro antaŭ pli ol dek jaroj: "En la agrara reformo mi sola iris aliloken por ĉeesti kunvenon. Sur la revena vojo ankaŭ mi renkontis tigron. Efektive, la homo timas tigron, tamen, la tigro ankoraŭ pli multe timas homon. Se ni nur sekvos la instruon de Prezidanto Maŭ, faros firman decidon kaj brave batalos kontraŭ ĝi, ni povos ĝin forpeli." Rememorante la forkuron de la timema tigro, la kvar taĉmentanoj emocie diris: "Tigro ja vere timas



Luo Ĉundi kaj ŝiaj taĉmentanoj purigas la montdeklivon.

homon, sed ni virinoj de la nova Ĉinio timas nenion!" La taĉmentanoj firme decidis forhaki ĉiujn herbojn de la monto, detrui la kuŝejojn de tigroj kaj forpeli ilin. De tiam ili kolektive eliris frumatene, revenis malfrue kaj persistis en la laboro.

Kiam rapide progresis ilia laboro, ili neaten-dite tuŝis la neston de krabroj. El 24 taĉmentanoj 23 estis atakitaj de krabroj. Pikite de krabroj, Luo Ajju sentis jen malvarmon jen varmon. Iuj ne povis malfermi okulojn kaj aliaj buŝon pro ŝveliĝo de pikvunditaj lokoj. Sed en la sekvinta tago neniu konsentis ripozi, kaj ili decidis forigi ankaŭ la nestojn de krabroj.

Post la intensa batalo, zono longa je pli ol dek lioj sur la monto Tigrokapo destinita por planti arbojn estis pretigita. Dum plantado de arbidoj ĉiuj diris: "Apogante nin sur la granda Maŭzedongpenso ni venkis malfacilojn unu post alia. Poste, por bone flegi la arbaron, ni ankoraŭ devas nin apogi sur Maŭzedongpenso!" Ili do starigis sur la alta pinto de la monto Tigrokapo grandan sloganon tabulon sur kiu estas skribo "Brave antaŭenmarŝu alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso", por ke ĝi brilu sub la radiantia suno.

En kelkaj jaroj, la taĉmento plantis 1,551 muojn da ekonomiaj plantaĵoj kaj arboj, kiaj pinoj, kriptomerioj, tearboj, bambuoj kaj oleaj kamelioj, sur la montoj Liberigo kaj Tigrokapo. Nun granda parto de tiuj plantaĵoj jam plene kreskis kaj komencis doni fruktojn, kiuj kontribuas en subtenado al la socialisma konstruado. La virina taĉmento krome subtenis la agrikulturan produktadon per mono el sia kolektiva akumulo. En la granda kultura revolucio ili fondis prilaborejon de kubebo kaj tepreparejon, kaj krome ili disvolvis multspecan mastrumon, inkluzive bredadon de porkoj kaj plantadon de rizo. La montoj Liberigo kaj Tigrokapo fariĝas pli kaj pli riĉaj kaj belaj.

Nun post la batala bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio la virina montekspluata taĉmento de Hiekeng-brigado firme staras kiel verda pino sur la monto Tigrokapo kaj fariĝis ruĝa standardo de revoluciigo kaj laborigo por la virinoj de montregiono de Fugian. En 1969 la taĉmentestro Luo Ĉundi honore ĉeestis la Naŭan Kongreson de la Partio, estis elektita kiel kandidata membro de la Centra Komitato de la Partio kaj ricevis intiman akcepton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

GANG HANGUJ:

Mi Fariĝis "Nud"

MI estas patrino de tri infanoj iam vizitinta lernejon nur du kaj duonon da jaroj. En oktobro de 1968 mi lernis 10 tagojn en la kurso de Maŭzedongpenso por "nudpiedaj kuracistoj" de nia komunumo kaj fariĝis "nudpieda kuracisto".

POR DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

Iutage en oktobro de 1968, la sekretario de la partia filio de nia produkta brigado sciigis min, ke mi iru partopreni la kurson de Maŭzedongpenso por "nudpiedaj kuracistoj" de la komunumo. Aŭdinte la vorton "kuracisto", mi tuj ekmemoris la kuracistojn en hospitalo, kiuj portas neĝblankan robon, grandan buŝkovrilon kaj stetoskopon ĉirkaŭ la kolo kaj parolas ĝentile. Mi tuj diris al li: "Ne, ne, kiel mi povus fariĝi kuracisto!" La sekretario ekridis kaj diris: "Prezidanto Maŭ instruis al ni: '**La pleba estas la plej saĝa dum la aristokrata estas la plej stulta**'. Vi estas kompartiano, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fidas vin kaj sendas vin al la kurso por lerni kuracan arton, por ke vi defendu la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj gajnu gloron por Prezidanto Maŭ!" Ne multaj estis la vortoj de la sekretario, sed ili tute lumigis mian koron. "Bone!" mi diris, "Mi marŝos en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ!" Kaj tiamaniere mi eniris la kurson por "nudpiedaj kuracistoj".

En la kurso, gvidantaj kamaradoj unue organizis nin studi la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj liajn instrukciojn pri la kuraca kaj higiena laboro kaj kritiki la kontraŭ-revolucion reviziisman kuracan kaj higienan linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki per realaĵoj okazintaj ĉe nia loko. Post la studo kaj kritikado mi komprenis, kial nia brigado havis neniun sanitariston kaj kial la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj malsaniĝintaj ne povis ricevi ĝustatempan kuracon. Tio ja rezultis el la kontraŭ-revolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio freneze antaŭenpuŝita de la granda

pieda Kuracisto”

renegato Liu Ŝaŭki. Nun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj lernas kuracan arton, defendas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj tenas en siaj manoj la potencon de kuraco kaj higieno, tio ĉi estas tre grava afero. Kiam altiĝis mia konscio pri la batalo inter la du linioj, ŝanĝiĝis mia sinteno al lernado de kuraca arto. Mi decidis venki ĉiun ajn malfacilon kaj bone ellerni kion oni instruos al ni. Post dektaga streĉa lernado, mi akiris elementan scion pri kuracaj efikoj de iuj kuracherboj, konis nombron da akupunkturaj punktoj ofte uzataj kaj scion pri farado de simplaj medikamentoj.

Reveninte al la brigado, mi tuj komencis fari preparadon por starigi higienan stacion kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Mi laboris de la mateno ĝis la vespero senripoze kaj postnelonge problemoj aperis sinsekve. Mia bopatrino diris al mi: “Hanguj! Tuttage vi kuradas ekstere. Vi povas ne zorgi pri ni gemaljunuloj 70-80-jaraj, sed kiu prizorgu la tri infanojn?” Iuj vilaĝanoj balilis: “Ĉu malklera virino povas fariĝi kuracisto? Kia ridindaĵo!” Aŭdinte la grumblojn kaj ironiojn mi vere iom deprimiĝis. Kun tiu demando mi lernis la artikolon de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune*. Prezidanto Maŭ diris: “Ni ĉiuj devas lerni lian spiriton de absoluta senegoismo. Kun tiu spirito oni povos fari sin homo ege utila al la popolo.” La vortoj de Prezidanto Maŭ tuŝis mian animon. Mi tre hontis, kiam mi komparis min kun la absolute senegoisma doktoro Bethune. Por konvinki la bogepatrojn, mi inspiris ilin rememori la suferojn en la malnova socio kaj pensi pri la hodiaŭa feliĉo. Mia bopatrino akuzis kun larmoj la malnovan socion pri ĝiaj krimoj. Mi diris al ili, ke Prezidanto Maŭ instrukiis, ke oni devas **“meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon”**, por ke ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tenu la potencon de kuraco kaj higieno, tio estas la plej granda zorgo kaj amo de Prezidanto Maŭ al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Altiĝis la politika konscio de la maljuna

paro kaj ili diris emocie: “Hanguj, do vi faru vian laboron solide kaj senĝene! La tutan dommastrumadon ni prizorgos!”

LA UNUA PROVO

En la tria nokto post mia reveno de la kurso, membro de la familio de la malriĉkamparanino Je Man de Jongĝong-grupo venis al mi por ke mi iru doni urĝan helpon. Tiam ekbategis mia koro. Mi pensis, ke la malsanulo certe estas en danĝero, se oni sendis en profunda nokto por peti urĝan helpon; mi dubis, ĉu mi sukcesos lerninte kuracarton nur dum dek tagoj. Dum la ŝanceliĝo mi ekmemoris la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **“Kio estas laboro? Laboro estas batalo.”** Mi konsciis, ke mi estas kompartiano kaj krome “nudpieda kuracisto” elkulturita de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj devas peni pleje por resanigi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Do mi ekiris palpante en mallumo. Kiam mi venis al la hejmo de la paciento, mi vidis, ke li jam perdis sian konscion. Mi ekmemoris la urĝsavan rimedon per akupunkturo, tuj elprenis la arĝentajn pinglojn kaj pikis la pacienton ĉe kelkaj ŝlosilaj akupunkturaj punktoj. Kelkajn minutojn poste la paciento rekonsciigis! Kun larmoj pro ĝojego la familianoj de la paciento diris al li: “Franjo Hanguj savis vin.” “Ne!” mi diris haste, “ne mi, sed la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!”

Pli ol 50-jara maljuna malriĉkamparanino Ĝaŭ Hing de Songĝong-grupo suferadis de hepatito kaj reŭmatismo de multaj jaroj ĝis tia grado, ke ŝi ne povis ellitiĝi. Vidinte ŝian mizeran staton pro turmento de la malsanoj kaj memorante la instruon de Prezidanto Maŭ pri **“ekskluziva”** kaj **“senrezerva”** servado al la popolo, mi decidis ŝin resanigi per kuracado. Mi iris al la domo de onklino Ĝaŭ Hing, studis kune kun ŝi koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, kune kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman higienan linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj per Maŭzedongpenso liberigis ŝin de la pesimismo kaŭzita de la longa turmento de la malsanoj. Altiĝis ŝia konscio kaj ŝi diris: “Mi nepre altigos mian konvinkon kaj liberigos min de la malsanoj por poste partopreni kolektivajn produktajn laborojn.” De tiam mi studis kune kun ŝi verkojn de Prezidanto Maŭ, kuracis ŝin, iris sur montojn por serĉi kuracherbojn, portis akvon kaj faris dommastrumadon por ŝi. Post zorgema kuracado, multe boniĝis ŝia sanstato kaj ŝi jam povis ellitiĝi por fari malpezajn laborojn.

PROpra PRAKTIKO

Kvankam mi lernis iom da scioj pri kuracherboj kaj ofte uzataj akupunkturaj punktoj en la kurso, tamen mi estis malcerta pri iliaj efikoj sen propra praktikado. Por bone koni la efikon de kuracherboj, mi mem ilin gustumis antaŭ ol ilin doni al la pacientoj. Kaj krome mi iris al la domoj de la pacientoj por informiĝi pri la stato post preno de preskribita medikamento kaj resumi sperton. Por konstati akupunkturajn punktojn, mi faris centojn da piko sur mia korpo per pingloj. Iuj diris, ke mi faras memturmenton. Mi diris: "La kompartianoj ĝuste devas esti kuraĝaj en tio. Havigi al si iom da doloro, por ke pli multaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝuu la bonon de la kuracado per akupunkturo kaj kuracherboj ja estas la plej granda ĝojo por ni 'nudpiedaj kuracistoj'."

En decembro de 1968, en nia brigado cirkulis traŭheito. Mi iam aŭdis, ke iu herbo tre bone efikas en kuraco de traŭheito, sed ĝi estas tre venena kaj oni ne povas ĝin uzi sen eksterordinara bezono. Mi decidis unue mem ĝin gustumi. Mi sekigis tiajn kuracherbojn, pulvorigis kaj faris pilolojn el ili. Unue mi prenis unu pizograndan pilolon kaj baldaŭ eksentis kapturniĝeton. Ĉu mi estas venenita? Mi pensis, ke tio ne estis pro veneniĝo, sed pro efiko de la pilolo. Kaj mi prenis alian pligrandan pilolon. Post tio mi sentis pli fortan kapturniĝon, kaj ekvomis. Mi trovis, ke mi jam estis venenita kaj ne devas preni plian. Kvankam mi iom suferis pro tiu eksperimento, tamen mi estis volonta tion fari por la sano de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Post ripetfoja eksperimentado, fine mi akiris bonan konon pri la kuracpovo kaj aplika kvanto de tiu herbo. Praktika apliko en kuraco pruvis, ke la herbo tre bone efikas en kuracado de traŭheito, se nur oni ĝin uzas en konvena kvanto.

Tra praktiko, konado, denova praktiko kaj denova konado, mi akiris bonan konon pri la kuracpovo de centoj da kuracherboj kaj kelkaj ofte uzataj eŭropaj kuraciloj kaj ekmastris la arton de injekto kaj akupunkturo.

MOBILIZO DE LA AMASOJ

Kiam la novaĵo ke "nudpieda kuracisto" resanigis malsanulon estis disvastigita, pli kaj pli

multaj homoj petis de mi kuracadon. La higienan stacion de la brigado frekventas homoj, ke mi eĉ ne povas trovi tempon por manĝi kaj dormi. Vidante ke mi malgrasiĝas tagon post tago, mia bopatrino diris kun kora bedaŭro: "Hanguj! Disfalos via ostaro, se vi daŭre agos tiamaniere!" Mi rigardis al la bopatrino kurbiginta pro suferado dum duono de la vivo kaj poste al miaj tri malgrandaj infanoj, kaj mi bone komprenis la amon de la maljuna bopatrino al mi. Sed mi konis pli klare, ke sennombraj malriĉuloj en la mondo ne liberigis kaj mi ne devas pensi nur pri mi mem, pri mia familio kaj miaj infanoj, se mi volas fari revolucion. Por la sano de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi volonte laboros ĝis morto pro laco.

Kvankam mi faris mian plejebulon, tamen mi ankoraŭ ne povis plenumi la bezonojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kion fari? Kun tiu problemo mi atente studis la instruojn de Prezidanto Maŭ pri energia disvolvado de amasa movado. Kaj sekve mi senlace konigis dum kuracado receptojn kaj drogherbojn al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, por ke ili povu mem kuraci siajn malsanojn. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj forte min subtenis en tio. Akirinte sciojn pri kuracherboj, ili disvolvis amasan aktivadon de kolektado kaj prezentado de kuracherboj, kiun partoprenis 80 procentoj de la tuta membraro de la brigado. Mi fondis kurson de "nudpiedaj sanitaristoj" kune kun kadroj de la brigado por elkulturi "nudpiedajn sanitaristojn" de la produktaj grupoj. Post sia establiĝo, tiu reto de higiena laboro ludis tre bonan rolon, tiel ke oni ne bezonas iri el sia domo pro kuraco de malsanetoj nek iri el la brigado pro kuraco de ordinara malsanoj.

Vidinte, ke mi diligente servas al la amasoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre konfidis kaj subtenas min. Foje mia bopatrino malsaniĝis kaj mi ne havis tempon por zorgi pri dommastrumado, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado meminciate sendis al mia domo brullignon kaj akvon. La estro de malriĉkamparana grupo diris al mi: "Dediĉu vin senrezerve al bona plenumo de via laboro; viajn dommastrumadojn ni prizorgos." Vidinte ke la amaso tiel prizorgas min kaj subtenas min, mia bopatrino kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj esprimadis al mi sian deziron, ke mi bone servu al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, senĉese revoluciu kaj daŭre marŝu!

Bi Jinglan — Bona

Filino de la Partio

LA heroaĵoj de Bi Jinglan — bona filino de la Partio, vaste cirkulas ĉe la bordo de la Flava Maro kaj en la orienta Ŝandong-provinco.

I

En la jaro 1954, Bi Jinglan ĵus estis 17-jara. Ŝi finis sian lernadon en elementa lernejo, kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konfidis al ŝi la fondon de kredita kooperativo.

Navigado en maro dependas de stiristo kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso. En sia *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan* Prezidanto Maŭ montris: “**Sen malriĉkamparanoj ja ne povas esti revolucio. Nei ilin ja signifas nei la revolucion. Ataki ilin ja signifas ataki la revolucion.**” Dank’ al la instruo de Prezidanto Maŭ ŝi komprenis, ke servi al la popolo en la kamparo devas esti ĉefe servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ankaŭ kredita kooperativo devas servi al ili.

Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Ĵongĉeng-gubernio antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucion reviziisman linion en la laboro de kredita kooperativo, nome, “la akciuloj povas pruntepreni monon, sed la kredita kooperativo ne pruntedonu monon al la senakciuloj”. Bi Jinglan pensis, ke plejparto el la senakciuloj estas malriĉkamparanoj kaj malsuperaj

mezkamparanoj. Ĉu tio konformas al la instruoj de Prezidanto Maŭ, se nia kredita kooperativo ne donas helpon al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiuj estas en malfaciloj?

Bi Jinglan tute ne aŭskultis la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon kaj kompakte ligis sin kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la malnova socio familianoj de maljuna malriĉkamparano Vang Ŝuhian de Ĝitun-brigado devigite laboris kiel dungitoj por bienuloj dum kelkaj generacioj. Antaŭ nelonge li suferis gravan malsanon kaj ne havis monon por sin kuraci. Informiĝinte pri tio, Bi Jinglan persone sendis al li pruntitan monon. Transpreninte la monon, Vang Ŝuhian miris kaj demandis: “Ĉu mi rajtas pruntepreni sen akcio en la kredita kooperativo?” Jinglan respondis: “Prezidanto Maŭ alvokis nin fondi kreditan kooperativon por nenio alia ol servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kvankam vi ne havas akcion en la kredita kooperativo, tamen ni konsideras ankaŭ vin kiel membron de nia kredita kooperativo.”

La domo de malriĉkamparano Bi Kegiu de Liuŝu-brigado estis detruita de pluvego je unu angulo, tiel ke la tegmento estis tuj falonta. Kiam la tuta familio de Bi Kegiu klopodis por ripari la domon, alkuris Bi Jinglan en tramalsekigitaj vestoj. Ŝi diris al Kegiu: “Trankviliĝu, nia kredita kooperativo fondita sub la gvido de Prezi-



Kamaradino Bi Jinglan kun ŝia filo Hiaübo

danto Maŭ helpas solvi vian malfacilon, kia ajn granda ĝi estos!” Ŝi forkuris kaj baldaŭ revenis kun mono kaj ĝin donis al Bi Kegiu.

Kiam Bi Kegiu transprenis la monon per siaj manoj, li sentis, ke varma fluo trakuras lian tutan korpon. Li emociite diris: “Tio estas ne mono sed la zorgo de Prezidanto Maŭ al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!”

Bi Jinglan profunde amas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, sed ĝisoste malamas la klasajn malamikojn. Iutage, kiam Bi Jinglan ne estis en la kredita kooperativo, iu kulako ne akceptanta remuldon trompe prunteprenis 5 *yuan* de la kooperativo. Eksciinte tion, Jinglan firme diris: “Tiu ĉi sumo da mono absolute ne devas esti pruntedonita!” Kun la diro ŝi rapide elkuris kaj reprenis la monon.

Ĝuste kiam la kredita kooperativo solidiĝis kaj disvolviĝis laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ,

la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Jongĉeng-gubernio kalumniis, ke “la amasoj ne fidis la kreditan kooperativon fonditan de la amasoj mem”. Sed Bi Jinglan travidis ilian intrigon forhaki la kreditan kooperativon. Ŝi diris indigne: “Ili kantas malsaman melodion kontraŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. Nuligi la kreditan kooperativon estas absolute malpermesite! Aferoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nepre devas esti mastrumataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj mem, kaj la povo de la kredita kooperativo ankaŭ devas esti tenata de ili mem.”

La hereza vento estis bremsita. Por ke la povo de la kredita kooperativo estu tenata en la manoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ŝi proponis, laŭ la peto de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, al la brigadoj elekti po 1-2 reprezentantojn por formi administran komitaton de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la kredita kooperativo. En produktaj grupoj oni elektas reprezentantojn el malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel perantojn ne disiĝantajn de la produkto kaj starigis filiojn de la kredita kooperativo, tiel ke la komunumanoj deponas aŭ prunteprenas monon en sia vilaĝo. Tiamaniere la kredita kooperativo ricevis pli da laŭdoj kaj subteno de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En printempo de 1962, Bi Jinglan komencis labori kiel estrino de Liuŝu-a Kredita Kooperativo. Ĝuste tiam nia lando renkontis seriozajn naturajn katastrofojn de tri sinsekvaj jaroj kaj la granda renegato Liu Ŝaŭki plej energie blovis la nigran venton de “tri pliiĝoj kaj unu fikso”. En tiu periodo la kolektiva ekonomio estis detruita kaj vivo de la komunumanoj troviĝis en granda malfacilo. En tiaj cirkonstancoj Bi Jinglan gvidis kadrojn de la kredita kooperativo iri inter la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj kune laboris kun ili por malkaŝi la intrigon de la klasaj malamikoj subfosi la kolektivitan ekonomion kaj samtempe por propagandi la penson de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj kaj venko super malfaciloj; ŝi multe propagandis superecojn de la popolkomunumo, helpis la brigadojn kaj malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn aranĝi monrimedojn kaj vivon kaj solvi malfacilojn. Dank’ al la helpo de la kredita kooperativo la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj plie disvolvis la socialisman kolektivitan ekonomion.

II

“Niaj tiuj ĉi trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la intereso de la popolo.”

Ĝuste laŭ tiu ĉi instruo de Prezidanto Maŭ, Bi Jinglan dediĉis sian limigitan vivon al senlima servo al la popolo.

“Bi Jinglan fariĝis neĝhomo dum neĝado kaj kvazaŭ elakvigita koko dum pluvado. Por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ŝi laboregas per la tuta energio, sed neniam zorgas pri si mem.” La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tiel priskribis la lojalan servon de Bi Jinglan al la popolo.

En Hoŭgangtoŭ-brigado estas maljuna malriĉkamparano Bi Giahi, kiu suferis de grava malsano. Jinglan vizitis multajn lokojn, fine trovis indiĝenan recepton kaj aĉetis drogojn por Giahi. Ŝi hejmenrevenis tretante neĝon en malluma nokto nur post kiam ŝi pretigis dekoktaĵon kaj vidis, ke la maljunulo ĝin trinkis. En frua mateno de la sekvinta tago ŝi denove venis helpi lin preni dekoktaĵon. Forpasis unu, du... tagoj, kaj ĉiutage ŝi tiel faris. Sub flegado de Jinglan la sanstato de Giahi pliboniĝis tagon post tago. Iun tagon, norda vento blovis aparte furioze kaj neĝo jam blokadis la vojon. Por ke Giahi tute resaniĝu, Jinglan piediris al urbeto Ŝidaŭ fore je pli ol 30 lioj por aĉeti kuracilon. Prenante la manojn de Jinglan avino Bi diris: “Jinglan, rigardu, kiel maldika kaj malforta vi estas, eĉ ventblovo povus vin forporti. Vi neniel povas iri tien en tia neĝstorma tago!” Jinglan diris: “Zorgi kamaradojn signifas zorgi la revolucion. Mi povas venki ĉian ajn grandan malfacilon por fari ion utilan nur al la revolucio kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.”

Kien Bi Jinglan iris, tien ŝi alportis la varmecon de la Partio.

Rimarkinte ke porkobredado en Ĝitun-brigado disvolviĝis malrapide pro malmulta generado, ŝi tuj biciklis kun iu kamarado al alia komunumo fore je pli ol 40 kilometroj kaj aĉetis porkidojn de bona raso “hinĝin” por la brigado. Por preventi kaj kuraci malsanon de porko ŝi ellernis injekti, kaj por ke la komunumanoj ŝpare uzu karbon, ŝi ellernis reformi kuiran fornon. Kiam ŝi devis iri aliloken, ŝi ĉiam plene ŝargis sian biciklon per agrikulturiloj, leteroj, poŝtpaketoj kaj aliaj. Ŝi estis kaj poŝtisto kaj vendisto kaj aĉetisto. Ŝi

volontis fari ĉion kion la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bezonis.

Kien Bi Jinglan iris, tie ŝi propagandis Maŭzedongpenson.

Iun tempon bredisto de Ĝitun-brigado volis forlasi sian postenon. Bi Jinglan plurfoje vizitis lin por kune lerni *Servu al la Popolo* kaj rememori profundan suferon kaj malamon en la malnova socio. La maljuna bredisto larmis pro emociiĝo kaj diris: “Mi eraris, ĉar mi ne aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj forgesis mian devenon. Ekde nun, mi ne nur daŭre laboros kiel bredisto, sed ankaŭ laboros pli bone por gajni gloron al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj Prezidanto Maŭ.” Tiu ĉi maljunulo preskaŭ sesdekjara nun ankoraŭ firme memoras la instruojn de Prezidanto Maŭ, kiujn Jinglan diris al li, tagnocte zorgas diligente pri stalo kaj faras laboron de du homoj. Ŝi helpis komunumanojn funkciigi kurson de Maŭzedongpenso kaj organizis kamaradojn de la kredita kooperativo periode iri al brigadoj por sciigi kiel la komunumanoj studas la verkojn de Prezidanto Maŭ.

Bi Jinglan prizorgis ĉion de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj neniam konsideris pri si mem.

Iun frostan matenon, neĝflokaj flugadis en nordokcidenta vento. Post ellitiĝo Bi Jinglan nereteneble ektemis pro frosteco. Tuj ŝin kaptis la penso: ĉu malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj jam surhavas vatitajn vestojn? Ĉu malfacilojn renkontis tiuj senhelpaj maljunuloj kaj familioj de martiroj en vivo? Ĉu estas malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj bezonas pruntepreni monon por pretigi vestojn? Tion pensante ŝi tuj iris eksteren malgraŭ la neĝstormo.

La vivkondiĉo de Jinglan estis kompare bona, tamen ŝi ĉiam vivis mallukse, ŝia vatita jako estis farita antaŭ dekkelkaj jaroj, kaj ŝia vatita litkovrilaro el kruda ŝtofo estis uzata dekkelkajn jarojn. Sed ŝi ŝparis monon kaj per ĝi aĉetis agrikulturilojn kaj medikamentojn por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En 1963, Bi Jinglan suferis de hepatito, kaj krome ŝia korpo rapide malpeziĝis pro troa laciĝo en laboro. Gvidantaj instancoj plurfoje konsilis ŝin enhospitaligi por kuraci, sed ŝi ĉiam diris: “Malsano estas papera tigro. Kun revolucia spirito oni certe povas ĝin venki. Malriĉkampara-

noj kaj malsuperaj mezkampanoj min atendas! Mia malsano estas nenio grava!”

En marto de 1963, estiĝis sur ŝia kruro maligna absceso. Ĝuste en tiu tempo iu kamaradino de la kredita kooperativo pasigis akuŝajn feriojn, sed ne estis homo por anstataŭi ŝin. Tiam Jinglan firme decidis: “Mi prenu ŝian laboron!” Retenante turmentadon de la malsano, ŝi sola faris laboron de du homoj. En ŝia poŝo ĉiam troviĝis sedativo. Kiam la absceso akre doloris al ŝi, ŝi englutis kelkajn tablojdojn. Kelkfoje ŝi tremis de dolorego, sed ŝi ĉiam parkere legis kunpremante dentojn: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” Foje ŝi svenis survoje de doloro. Kiam oni rimarkis ŝin svena, ĉiuj larmis nereteneble. Iu maljunulino diris prenante ŝiajn manojn: “Jinglan, vi elĉerpis vian tutan energion por ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, kial vi ne zorgas pri vi mem!” Kamaradoj plej rapide sendis ŝin en hospitalon. Kiam ŝi rekonsciiĝis, ĉiuj plendis pri ŝi, sed ŝi respondis: “Kio estas timinda en morto? Mi timas ke mi mortos ne pro la revolucio. Mi povos elteni pli da doloro por la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj!”

III

Sunbrilo kaj pluvo kreskigas pinon.

Estas la brila Maŭzedongpenso, kiu kreskigis Jinglan de ordinara kampara intelekta junulino en eminentan komunisman batalantinon. Ŝi diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj rigore transformis sian mondkoncepton per Maŭzedongpenso.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estis ĵus eldonita, Bi Jinglan prunteprenis ĝin de iu demobilizita armeano kaj kopiis ĝin vorton post vorto. Nokte en plej varma somero, ŝvito malsekigis ŝiajn vestojn, kaj kuloj pikis ŝiajn manojn kaj vangojn. La patrino admonis ŝin: “Jinglan, jam estas profunda nokto, tujenlitiĝu!”

“Panjo, mi povas nek manĝi nek dormi, sed kiel mi povas servi al la popolo, se mi ne legas verkojn de Prezidanto Maŭ!”

En la lastaj kelkaj jaroj, profitante ripoztempon Bi Jinglan finlegis la 4 volumojn de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj notis taglibrojn kun kelkcent mil vortoj, kiuj radias la brilon de Maŭzedongpenso.

Bi Jinglan neniam forgesis studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, eĉ kiam ŝi grave malsaniĝis

kaj ne povis manĝi, ŝi ankoraŭ persistis en la studado.

En 1963, Jinglan kuŝis en hospitalo kaj ricevis operacion. Tuj post vekiĝo ŝi petis flegistinon doni al ŝi la verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj poste senlace ekstudis. La akra doloro de la vundo tiel turmentadis ŝin, ke ŝia vizaĝo paliĝis, sojograndaj ŝvitgutoj fluus kaj ŝiaj lipoj senĉese tremis. Vidinte ke ŝi jen legas jen skribas kaj malmulte ripozas, flegistino plurfoje admonis al ŝi: “Jinglan, vi estas ĵus operaciita kaj krome via vundo estas serioza, vi lernu post la resaniĝo.”

Kun rido Jinglan firme respondis: “La korpo malsanas, sed la penso ne devas malsaniĝi; la korpo povas ripozi, sed la penso ne devas ripozi.”

En la sama tago, kiam la gvidantaj kamaradoj de la banko venis al hospitalo por ŝin viziti, ŝi eksciis en la interparolado, ke en la sekvonta tago la banko kunvokos ĉiujn laborantojn de la banko kaj kreditaj kooperativoj por transkomuniki koncernajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Ŝi firme insistis pri partopreno de la kunveno. Ŝi emocie petis la kuracistojn kaj gvidantajn kamaradojn: “Lasu min aŭskulti la voĉon de Prezidanto Maŭ kaj tiam mi estos multe kuraĝigita en spirito, tiel ke mi resaniĝos tre rapide. Kvankam mi ne povas sidi, tamen mi povas aŭskulti kuŝante, ĉar miaj oreloj estas sanaj.” Jinglan petis tiel forte ke la kuracistoj kaj la gvidantaj kamaradoj de la banko ne povis rifuzi. En la sekvanta tago kamaradoj alportis ŝin al la banko per brankardo. Sur la brankardo ŝi aŭskultis kaj registris per krajono eltenante turmentadon de la malsano per mirinda energio.

Maŭzedongpenso faris Jinglan pli matura en politiko, kaj ŝia spirita mondo jam atingis pli novan altecon. En sia taglibro ŝi skribis: “Vera revoluciulo devas havi grandiozan revolucion idealon kaj ligi sian ĉiun agon kun la idealo. Komunisma socio ne povas sin formi per si mem sed estos kreita de miloj kaj dekmiloj da revoluciuloj. Por konstrui socialismon oni devas havi grandiozan idealon batali dum sia tuta vivo por realigi komunismon.” Ŝi strikte ligis siajn penson kaj laboron kun la afero de la Partio kaj la liberiĝo de la tuta homaro.

Bi Jinglan heroe oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la malamiko, tamen ŝia brila nomo restos por ĉiam en la koro de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ĵongĉeng-gubernio, Ŝandong-provinco.



ĈE la norda fino de Bakbo-golfo, en la Donghing-a Aŭtonoma Gubernio de Diversaj Nacioj en la suda parto de Guanghi de nia lando finkonstruiĝis granda digo tri kilometrojn longa kun meznombra alteco de 6 metroj kaj larĝeco de 30 metroj ĉe la bazo kaj 4.5 metroj ĉe la supro. Ĝi kuŝas inter la piedo de Jongŝutoŭ-monto en la oriento kaj Vutoŭ-duoninsulo en la okcidento, barante la vastan ondantan maron kaj protektante la 22,000 muojn da nove konstruitaj fekundaj kampoj. La laborantaj popolanoj de la ĝuang-a, ĝing-a, jaŭ-a kaj han-a nacioj de Donghing-gubernio verkis superban poemon en sia batalo por konstruado de kampoj per marbarado, varme respondante al la granda alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn".

TIEL KOMENCIĜIS LA LABORO

La Donghing-a Aŭtonoma Gubernio de Diversaj Nacioj situas sur la norda bordo de Bakbo-golfo. La laŭborda marfundo estas ebena kaj

fekunda. De multaj jaroj la vasta laboranta popolo de tiu loko jam deziris bari la maron por konstrui kampojn. En la jaro 1958, stimulate de la situacio de la Granda Antaŭensaltego, grupoj post grupoj da malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj fiŝistoj de Ĝuang-a, ĝing-a kaj han-a nacioj venis al la bordo por fari mezuradon kaj esploradon. Tiutempe, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova Kompartia Komitato de la gubernio ne kredis, ke la ordinaraĵaj popolamasoj sukcesos en tio, kaj ili opiniis, ke tiel kolosa konstruado estos neebila sen investo de la ŝtato. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de ĝuang-a, ĝing-a kaj han-a nacioj decideme marŝis antaŭen laŭ la vojo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj, kiun montris Prezidanto Maŭ. Kaj la batalo komenciĝis unue en Ĝenjuling-grupo de Fangĉeng-komunumo de Donghing-gubernio. Tiu grupo havas nur 14 familiojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun 34 laborfortoj. Ili bone unuiĝis kaj la unuaj komencis konstrui digon por krei kampojn ĉe marbordo proksime de la

produkta grupo. Kiam flusis, ili ascendis monton por dehaki ŝtonojn kaj arbojn, mem faris puŝarojn, plektis korbojn kaj faris vektojn; kiam malflusis, la viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj estis organizitaj por transporti ŝtonojn kaj konstrui digon. Post penlaborado dum du vintroj kaj du printempoj, fine ili konstruis maran digon kun longeco de 1,400 metroj, kreis pli ol 300 muojn da kampoj kaj starigis por la tuta gubernio standardon de konstruado de kampo per marbarado.

Senlima estas la forto de modela ekzemplo. La venko de Ĝenjuling-grupo de Fangceng-komunumo en konstruado de kampo per marbarado pli firmigis la decidemon kaj memfidon de la diversnaciaj popoloj de Donghing-gubernio en batalakiro de kampoj el la maro. Sub la forta subteno de la Popola Arma Departemento, organiziĝis dudek milicaj batalionoj en julio de 1967 kaj torente marŝis al Bakbo-golfo por tie kampadi kaj konstrui maran digon. Tre malbonaj estas la tieaj naturaj kondiĉoj: en unu flanko ondas la maro, en alia flanko estas vastega strando kaj montgigantoj staras en malproksimo. Pro la malfaciloj en transportado, malrapide iris la konstruado.

En aprilo de 1969, venke inaŭguriĝis la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio kun granda historia signifo! Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de ĉiuj nacioj de Ĉinio faris la batalan alvokon **“Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”**, kio donis grandan kuraĝigon al la diversaj nacioj

batalantaj ĉe Bakbo-golfo. Multaj komunumoj sendis helpajn trupojn al la konstruejo. Ili rapide levis altan tajdon de konstruado por “konstrui l’ digon sen sekund-malŝparo, malfruan rizon planti en la markamparo”.

Bolis la konstruejo kaj la konstruitaj partoj de la digo rapide sin etendis laŭ kontraŭa direkto al la mezo. En la tempo de nur iom pli ol monato, oni jam plenumis du trionojn de la konstrua laboro de la digo.


Nur 350 metroj de la digo restis nekonstruitaj. Ĉe la meza parto estis du ŝaneloj, kie la akvo fluis rapidege. Kiam flusis, marakvo enkuris tra la breĉo kvazaŭ miloj kaj miloj da galopantaj ĉevaloj, kiam malflusis, la marakvo sur la areo de pli ol kvardek kvadrataj kilometroj torentegis en la maron tra la breĉo. En la furioza torento, ok-ĉevalpova motorboato ne povas sin puŝi antaŭen per sia plena forto, kaj kiam oni ĵetis en ĝin sablosakojn pli ol 150 kilogramojn pezajn, ili estis facile forportitaj de ĝi kvazaŭ lignaj pecetoj.

Kaj la du partoj de la konstruata digo devis kuniĝi ĝuste ĉe tiu loko.

POR AKIRI ANKORAŬ PLI GRANDAJN VENKOJN

Vidinte la gigantan forton de la diversnaciaj popoloj post unuiĝo sub la granda ruĝa stan-

Parto de la granda digo



dardo de Maŭzedongpenso kaj analizinte la favorajn kondiĉojn por tranĉo de la fluo per kunigo de la du partoj de la digo, la komandejo de la konstruejo decidis fari la kunigon de la du partoj je la 25-a de majo, 1969, nome la plej favora fluo en la tuta jaro.

La informo pri tiu decido estis rapide disvastigita tra la tuta gubernio.


Ĉu en fiŝistaj vilaĝoj de ĝing-a kaj han-a nacioj aŭ en loĝejoj de ĝuang-a kaj jaŭ-a nacioj en la grandioza Ŝivandaŝan-montaro, ĉie regis ĝojego. La diversnaciaj laborantaj popolanoj vizitis unu alian por sciigi la informon kaj estis forte ĝojigitaj kaj kuraĝigitaj. Kiel ili povus ne emociiĝi kaj hurai, kiam ili vidis, ke baldaŭ efektiviĝos la espero de la prapatroj pri kreo de kampoj el Bakbo-golfo?

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de jaŭ-a nacio, kiuj tre malofte iris el Ŝivandaŝan-montaro kaj ne akiros profiton el la kreotaj kampoj, foje kaj refoje studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **“La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero.”** Ili diris emocie: “Kvankam oni ne asignis al ni taskon en la konstruado de kampo per marbarado, ni tamen devas, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, unuiĝi kun la alinaciaj klasaj fratoj kaj batali kune por akiri venkon en la kunigo de la du partoj de la digo.”

Gaŭpi-grupo de Tanŝan-komunumo estas jaŭ-nacia vilaĝo, kiu situas sur la plej alta monto je 1,000 metroj super la mara nivelo en la Donghing-a Aŭtonoma Gubernio de Diversaj Nacioj kaj 100 kilometrojn fore de la konstruejo. Por veni al la marbordo, ĝiaj grupanoj devas transiri tri montegojn, transvadi 11 riverojn grandajn kaj malgrandajn kaj trapasi danĝeran pasejon sur kruta rok-muro. Sed kiam ili informiĝis, ke la du partoj de la mara digo kuniĝos, ili memvole sendis al la konstruejo siajn plej bonajn gefilojn, kaj tiuj rapidis al la konstruejo por partopreni la batalon, vektportante grenon kaj litaĵojn trans la montojn kaj riverojn.

Hikeng-brigado de Banba-komunumo estas ankaŭ jaŭ-nacia vilaĝo, kiu situas en primitiva arbaro kaj profunda monto. Ĝi sendis al la konstruejo 10 junajn kaj kapablajn milicianojn. Informiĝinte pri tio, ke la jaŭ-aj fratinoj unuafoje descendis la montojn, milicianoj de la ĝing-a kaj ĝuang-a nacioj demandis ilin kun zorgemo: “Ĉu vi ne timas malfacilojn?” Tiam ili respondis senŝanceliĝe: “Por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn, nenian ajn malfacilon ni timas!” Kaj ili agis kiel ili diris, kaj laboris persisteme ĝis la triumfa plenumo de la tasko.

Ĝuang-a milicano Lu Guanlin de Banba-komunumo, kiu kaptis usonan paraŝutintan piraton uzante portvektion kiel batalilon, brave marŝis en la milicaj vicoj portante litaĵojn. Li diris: “Per tiu ĉi sama portveкто foje mi kaptis usonan



banditon, kaj nun mi faros novajn kontribuojn en la konkero de la maro batalante kune kun la diversnaciaj klasfratoj per la sama portvektio!"

Informiginte pri tio, ke la du partoj de la digo kuniĝos, milicanino Tan Gujĵing, aktivulino en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, ŝia patro Tan Giagin kaj ŝia avino Tan Vuma ĝoje rapidis al la konstruejo. La 70-jara Tan Vuma diris: "Nia amata Prezidanto Maŭ alvokis nin 'Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn'. Mi estas kompartiano kaj mi firme respondos al la alvoko de Prezidanto Maŭ, unuiĝos kun la klasaj gefratoj diversnaciaj kaj faros mian kontribuon en la batalo por kunigo de la digopartoj." La tri generacioj de la familio de Tan Gujĵing viveplene batalis sur la konstruejo.

Kiam la informo pri la kunigo de la digopartoj atingis la fiŝistan vilaĝon ĝing-nacian Vanvej-insulon, tieaj kadroj kaj amasoj estis konstruantaj la mar-

digon de sia brigado. Opiniante ke la interesoj de parto devas submetiĝi al tiuj de la tuto, ili senhezite ĉesigis sian konstruadon kaj sendis 600 milicanojn al konstruejo de la digo, kiuj rapidis al la loko kun alta batalvolo. Ili diris: Por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn, ni ĝing-naciaj fiŝistoj nepre faros niajn kontribuojn.

La vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj de PLA viglatente gardostarantaj tage kaj nokte ĉe la marbordo rigardis la partoprenon al la batalo de la kunigo de la mardigaj partoj kiel praktikan agon en efektivigo de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn". Potencaj kolonoj marŝis unuj post aliaj al la konstruejo!

HEROOJ KVIETIGIS LA VASTAJON DE ONDOJ

Tuj komenciĝos la tranĉo de la mara fluo.

Milicaninoj de Jaŭ-nacio, kiu loĝas sur altaj montoj, alvenis subteni la konstruadon de kampoj en maro.



Sur la konstruejo, tajde moviĝis homoj kaj arbare staris ruĝaj flagoj — grandioza bildo sin prezentis.

La konstruaj trupoj el diversaj lokoj viglanime sin ĵetis en batalon sur la tereno 350 metrojn longa. Ekstere de la digo, relative grandaj fiŝistaj ŝipoj starantaj unu tuj apud alia formis arkforman kontraŭventan kaj kontraŭondan “muron”, interne de kiu estis boatoj, plene ŝarĝitaj per longaj ŝtonpakoj, sabloplenaj sakoj kaj diversaj materialoj. Ĉio jam pretiĝis, kaj la konstruantoj animstreĉe atendis la batalan signalon de la konstrua komando pri komenciĝo de la batalo.

“..... Komenciĝu la ŝtopado de la tuta breĉo de la mara digo!” Ordonis la komando kaj la sturmaj taĉmentoj de la milicanoj tuj rapide dronigis ŝipojn, sinkigis sabloplenajn sakojn kaj metis inter ili branĉojn de maraj olivarboj.....

“Gajno de tempo signifas venkon!”

“Nepre finu la taskon antaŭ la fluso!” El la megafonoj senĉese disaŭdiĝis stimulaĵoj sloganoj.

La vetero ĉe Bakbo-golfo estas tre kapricema. La tute serena ĉielo povas subite fariĝi nubozaj kaj doni torentan pluvegon.

La milicanoj faris intensan batalon kontraŭ ŝtormo, pluvego kaj ondegoj. La terportantoj flugrapide kuris en vicoj tra la lignotabula ponto. Subite ondego sinĵetis al la ponto kaj kun forta krako rompiĝis tabulo de la ponto, kaj amaso da homoj estis haltigita sur la rompita ponto! Kamaradoj Liang Ligjun, Gu Guangcaj kaj aliaj junuloj revenintaj al siaj hejmlukoj por partopreni agrokulturan produkton post diplomiĝo, saltis en la akvon, subtenis la rompitan tabulon per siaj ŝultroj por ke la ter-portantoj povu trakuri sur ĝi.

Pli kaj pli furioziĝis la vento kaj la ondoj. Subite la pordo de drentunelo portempa en la digoparto de Vutoŭ-brigado estis breĉita de ondoj kaj marakvo onde entorentis tra ĝi. Je tiu



La aktivulino de viva studo kaj viva apliko de Maŭ-zedongpenso Tan Gujĵing laboras sur la konstruejo.

kriza momento, kompartiano Tan Giagin saltis en la maron laŭte kriante: “Protektu la digon!” “Protektu la digon!”. Ankaŭ lia filino kompartianino Tan Gujĵing saltis en la maron samtempe. Sekvante iliajn ekzemplojn, milicanoj saltis en la maron unuj post aliaj. Ili staris brako en brako kaj ŝultro ĉe ŝultro kaj formis homan muron el dekoj da personoj, kaj baris la atakantajn ondojn de la maro.

Apenaŭ tiu breĉo estis ŝtopita, la torenta marakvo tamen truigis la digon ĉe ĝia bazo en alia loko. Vizaĝe al la furioza kirlo de marakvo, milicanino de ĝing-nacio Luo Ĝoŭkjun, kiu ĵus aliĝis al la Partio en februaro de 1969, ekmemoris la revolucion heroismon de sia frato, kiu oferis sian vivon en brava luktado kontraŭ la usona imperiismo, kaj senlima indigno kontraŭ la usona imperiismo ekflamis en ŝia koro. Ŝi saltis en la maron kaj persiste luktis kontraŭ la maro ĝis kiam alkuris ŝiaj kunbatalantoj kaj kune ŝtopis la truon.

Furioza vento levis ondegojn, kiuj ruliĝadis antaŭen. En la ŝtormo kaj pluvego oni ne povis malfermi siajn okulojn, nek firme stari.

“Disfalo minacas la 50-metran digparton! Milicanoj tuj faru urĝan savon per ĉiuj siaj fortoj!”

Homoj torentis al la danĝerejo laŭ la ordono de la komandejo.

Tiumomente, iom post iom grandiĝis la breĉo en parto de la digo kaj minacis granda danĝero. La milica batalionestro Ta Zuĉaŭ kaj dekkelkaj milicanoj samtempe saltis en la furiozajn akvo-kirlojn kaj premtenis la sabloplenajn sakojn per siaj korpoj. Kun la ĝisfunda revolucia spirito timi nek malfacilojn nek morton, ili persistis en

la luktado tute sencede kaj fine sukcesis savi la digon el la danĝero.

Kaj tiamaniere, dank' al la ĉiamvenka Maŭ-zedongpenso, la milicanoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la ĝuang-a, ĝing-a, jaŭ-a kaj han-a nacioj luktis 16 horojn kontraŭ la maro per siaj feraj ŝultroj kaj laboremaj manoj kaj sukcese plenumis la konstruan laboron de kunigo de la du partoj de la digo kaj per tio kreis heroaĵon.

Sur la arda konstruejo



Verkoj de Maŭ Zedong

(en Esperanto)

(Parto de la Broŝure Eldonitaj Verkoj
en la Periodo 1937-1941)

Orientilo, Rimedoj kaj Perspektivo por Rezisti kontraŭ la Japana Atako	24 pĝ.
Batalu por la Mobilizado de Ĉiuj Fortoj por Gajni Venkon en la Rezist-milito	16
Kontraŭ Liberalismo	12
La Situacio kaj Taskoj en la Kontraŭjapana Rezistmilito post la Falo de Ŝanhajo kaj Tajjuan	32
Strategiaj Problemoj en la Kontraŭjapana Gerila Milito	72
La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito	40
La Problemo de Sendependeco kaj Memstareco en la Unuecfonto	16
Problemoj de Milito kaj Strategio	40
La Direkto de la Junula Movado	24
Esti Oponata de la Malamikoj Estas Afero Bona sed Ne Malbona	8
Inaŭguraj Vortoj por <i>La Komunisto</i>	28
La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio	70
Pri Nova Demokratio	92
Nov-demokratia Konstitucia Reĝimo	24
Nunaj Taktikaj Problemoj en la Kontraŭjapana Unuecfonto	24
Pri Nia Politiko	24

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



“Tri Popularaj Artikoloj” de Prezidanto Maŭ

Voĉlegado

Servu al la Popolo

Memore al Norman Bethune

Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo

Sur unu disko (33 1/3)

N-ro de disko: WM - 870

Mendu ĉe Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio, aŭ ĉe la Libroservo
de la Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

5000-ĈEVALPOVA HIDRAŬLIKA DIZEL-LOKOMOTIVO

La unua 5000-ĉevalpova hidraŭlika dizel-lokomotivo projektita kaj fabrikita de nia lando mem naskiĝis en la Sifang-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko de Kingdaŭ. Multfoja prova veturado pruvis, ke la lokomotivo estas bonkvalita kaj konforma al la postuloj de la projekto kaj cetere havas apartan stilon propran al nia lando.

Dizel-lokomotivo tiel grandpova estas produktata nur de malmultaj landoj en la mondo. En la jaro 1959, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Sifang-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko sukcesis produkti post provado la unuan 2000-ĉevalpovan hidraŭlikan dizel-lokomotivon de nia lando kaj komencis po-grandan produkton. Por kontentigi la bezonon de la impeta disvolviĝo de la socialisma konstruado de nia lando, ili projektis kaj fabri-

kis tiun grandpovan hidraŭlikan dizel-lokomotivon en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

10000-TONELA DRAGŜIPO

Antaŭ nelonge, la 10000-tonela dragŝipo Jin Song de skrapa kaj suĉa tipo projektita kaj konstruita de nia lando mem sukcese surakviĝis en Giangnan-ŝipkonstruejo de Ŝanhajo.

La ĉefaj karakterizaĵoj de tiu 10000-tonela dragŝipo estas granda kapacito, alta laborefiko, facila funkciigebleco, vasta uzebleco, racia strukturo de la ŝipkorpo kaj alta aŭtomateco en dragado. Ĝi estas instalita per diversaj novaj progresintaj teknikaj ekipaĵoj kaj povas plenigi sin per ŝlimo en nur 15 minutoj. Tiu ĉi dragŝipo estos uzata ĉefe por dragi navigvojon de marhavenoj de nia lando, kaj ĝia sukcesa konstruo havas gravan signifon por la disvolviĝo de la navigacio de nia lando.

Ili Estas Ordinaraĵoj

Laborulinoj

Sekvante la intiman instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ “Unuiĝu kaj partoprenu en produktado kaj politika aktivado por plibonigi la ekonomian kaj politikan staton de virinoj”, la vastaj amasoj de kamaradinoj de nia lando aktive partoprenas la laboron de diversaj batallinoj de industrioj kaj agrikulturo kaj diversajn revoluciajn aktivadojn kaj ŝanĝis la pozicion de subpremeco kaj malestimateco de la virinoj en la malnova socio. Ili estas kaj ordinaraĵoj laboruloj kaj mastroj de la nova Ĉinio.


Tiu ĉi serio da fotoj prezentas al vi kvar eminentajn kompartianinojn de Junnan-provinco. Ili estas laboristino, kamparanino, PLA-anino kaj nudpieda kuracistino. Ili tenas la revolucion, stimulas la produkton kaj aliajn laborojn kaj sinpreparon kontraŭ milito kaj senĉese faras kontribuojn.

Aktivulinoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso (*de maldekstre dekstren*): Li Gujhua, Jang Hiaŭsan (baj-nacio), Li Cujjing kaj Kingveng (tibetanino) interŝanĝas siajn komprenojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.





Li Gujhua, konstanta membro de la revolucia komitato de Kunming-a Cigared-fabriko kaj membro de la revolucia komitato de Junnan-provinco.



Jang Hiaŭsan, vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de Junhian-gubernio.



Li Cujing, telefonistino de la Popola Liberiga Armeo.





Kingveng, bona "nudpieda kura-
cistino" de la liberigitaj servutuloj.



Supre dekstre: Post kiam ka-
maradino Li Gujhua estis elek-
tita en gvidantaron, ŝi persistas
en partopreno de fizika laboro
por ke neniam ŝanĝiĝu ŝia
karaktero de laborista klaso.



Sube maldekstre:
Kamaradino Jang
Hiaŭsan, bona mo-
delo por la amasoj,
partoprenas kolek-
tivan produktan
laboron kune kun
amaso.

Sube dekstre: Ka-
maradino Li Cuj-
jing riparas teleko-
munikilon kune
kun siaj kunbata-
lantinoj.





Kamaradino Li Cujing aktive partoprenas fizikan laboron por akceli sian ideologian revoluciigon.

Sunradioj Prilumas Ĵentun-vilaĝon

ĴENTUN estas vilaĝo en Lianseng-komunumo de Kingpu-gubernio, Ŝanhajo. Ĝi situas ĉe la vasta, ondanta lago Dianŝan kaj estas ĉirkaŭata de verdaj arboj. La verdaj rizplantoj en ĝiaj vaste etendiĝantaj kampoj ondetas inter kanaletoj rete interkruciĝantaj. Kiel bele aspektas la akvoriĉa lando sude de Jangzi-rivero!

Sed antaŭ la Liberiĝo tiu bela vilaĝo estis loko plagita de bilharzioj. Ĉiu mezaĝa kamparano de la vilaĝo, kiu hazarde postvivis, ankoraŭ klare memoras la popolkanton cirkulintan antaŭ 20 jaroj:

*En maldekstro ĝemas sola vir' blankhara,
Kaj postlasis orfojn dekstre la najbaro.
Sovaĝiĝis kampoj kaj malplenas domoj.
Tie kaj ĉi tie ploras ĉie homoj.*

En tiu tempo, pli ol duono el la 2,800 muoj da rizkampoj ne estis kulturata. Eĉ se rizplantoj estis plantitaj sur iuj kampoj, ili ankaŭ ne povis kreski bone. Pli ol 50 domoj falis; kaj en tiuj kreskis sovaĝaj herboj pli altaj ol homa genuo kaj dense interplektiĝis araneajoj.

Malĝojo kaj mizero regis la tutan vilaĝon. La damndaj bilharzioj kaj la ankoraŭ pli kruelaj bienuloj kaj reakciuloj de Kuomintang kiel demonoj terure turmentis la senkulpajn vilaĝanojn kaj forprenis multajn vivojn, tiel ke la familioj de la ĵentun-aj kamparanoj ruiniĝis perdante siajn membrojn. En 1930 estis 960 loĝantoj en la vilaĝo, sed en 1949 restis vivantaj nur 461 homoj.

La historio de la familio de Vu Ada estas miniaturo por la mizera vivo de la malriĉaj kamparanoj de Ĵentun antaŭ la Liberiĝo.

Siatempe ĉe la kapo de la malgranda ponto en sudo de la vilaĝo estis kaduka domo el tri ĉambroj, kie loĝis kvar familioj kun 15 personoj entute, inter kiuj estis la familio de Vu Ada. Kaj en la daŭro de tri jaroj sinsekve mortis 14

personoj. Suferante bilharziozon, la patro de Vu Ada laboranta de infaneco kiel dungito ĉe bienulo mortis sub turmentado de la mastro. Post kelkaj jaroj mortis ankaŭ la patrino de Vu Ada sub duobla turmentado de bilharziozo kaj deviga repago de la ŝuldata mono al bienulo. Tiam Vu Ada havis nur 12 jarojn. Havante neniun proksimulon, li forlasis la "diablan domon" kaj vivis kiel vagulo. Vidante ke tio ne estas solvo por li, fratino de lia patro kondukis lin al iu bienulo por proponi lin kiel bovknabon. Kvankam Vu Ada eskapis el la malfeliĉa vilaĝo Ĵentun, tamen li ne povis eskapi de la demonaj manoj de la bienulo. Iutage, Ada revenis post paŝtado, sed la edzino de la bienulo ankoraŭ ordonis malice lin falĉi akvajn herbojn. Ĉar Ada ne konsentis, la bienula edzino ne nur insultis kaj batis lin, sed ankaŭ pelis lin en la lagon Ĵentuntang, en kies malvarma akvo li vadis 4 tutajn horojn. De tiam li suferis bilharziozon kaj baraktis inter vivo kaj morto. Li sopiris kaj sopiris, li sopiris la alvenon de la tagoj, en kiuj finiĝos al la mizeruloj la amara vivo.

Ekflirtis la ruĝa flago kun kvin steloj kaj Prezidanto Maŭ portis al Ĵentun novan vivon.

En somero de la sekvinta jaro, la Partio sendis al Ĵentun kuracan taĉmenton por elimini la epidemion por la vilaĝanoj. La loĝantaro akklamis kaj nereteneble ĝojkriadis: "Prezidanto Maŭ sendas al ni kuracistojn! Ni estas savitaj!"

En la malnova templo ĉe la okcidento de la vilaĝo, la kuracistoj faris kuracadon por Vu Ada tiam jam 20-jara. Iom post iom lia farto multe pliboniĝis. Poste la Partio sendis lin al hospitalo en urbo, kaj tie li estis plene resanigita. El la amara maro fine elsaviĝis Vu Ada! Nun li jam estas fortika homo kun unuaklasa laborforto kaj fariĝis membro de la revolucia komitato de Ĵentun-brigado. Li edziĝis kaj havas filon kaj filinon. Kiel akre kontrastas tiuj viglaj kaj sanaj

gefiloj naskitaj post la Liberigo en komparo kun la infaneco de Vu Ada!

Konata inter la loĝantoj de Ĵentun estas ankaŭ la historio de Li Juankjuan, kiu estas 45-jara kaj plena de vivforto kaj neelĉerpebla energio. Sed, la feliĉa juna generacio kreskinta post la Liberigo ja ne scias, kian mizeron li spertis antaŭe.

En la hejmo de Li Juankjuan troviĝas malnova foto jam dekoloriĝinta, en kiu estas dekoj da skeletaj homoj sidantaj aŭ starantaj sub la velkinta arbo antaŭ la malnova templo. Inter sidantoj en la fronto estas malaltkreska homo. Tiu estas neniu alia ol Li Juankjuan.

Tiam Li Juankjuan nur havis aĝon de 11 jaroj kaj jam suferis bilharziozon. Morto ĉiam minacis lian vivon. Post la Liberigo, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ sendis kuracistojn al la vilaĝo, kaj pro tio la farto de Li Juankjuan pliboniĝis tagon post tago. En 1958, la Partio sendis lin al iu hospitalo en Ŝanhajo, kie li estis plene resanigita. Forlasante la hospitalon, li emocie diris al la kuracistoj: "Prezidanto Maŭ estas la granda savanto de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!"

Efektive kiel Li Juankjuan diris, Prezidanto Maŭ estas la savanto de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj! La Partio senpage resanigis pli ol 400 suferantojn de bilharziozo en Ĵentun dum la 20 jaroj de post la Liberigo. Samtempe kun tio, la Partio asignis sufiĉan sumon por fosi putojn kaj konstruis sanitariajn necesejojn por la vilaĝo. Dank' al tio la antaŭe agonianta Ĵentun reakiris sian junecan vigecon. Kiel povus la Ĵentunanoj ne elkore kii: "Eternan vivon al Prezidanto Maŭ!"

De 20 jaroj la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĵentun aŭskultas la instruojn de Prezidanto Maŭ, iras la socialisman vojon sekvan lin, kaj akiris daŭre riĉajn rikoltojn en agrikulturo, disvolvante sian ĉiele altan revolucionan energion.

Tute ŝanĝiĝis la vilaĝo en la 20 jaroj. La 729 vilaĝanoj ĉiuj havas multe pli fortan korpon ol antaŭe. Prospero regas la tutan vilaĝon.

Brikaj domoj blanke kalkitaj montras sin sufiĉe vastaj, lumplenaj kaj komfortaj. Ankoraŭ novaj domoj estas en konstruado, inter kiuj estas ankaŭ cementaj domoj unuetaĝaj kaj duetaĝaj.

La lumo de Maŭzedongpenso brilas super Ĵentun.



AŬTOMATA UNIVERSALA ELEKTROLIZA ILMAŜINO

Sub la direkto de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ "sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj", la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Huabej-a Metalstruktura Fabriko de Pekino, kun forta aspirado kaj firma volo por venki seriozajn malfacilojn, sukcese provfaris en kvin monatoj la universalan elektrolizan ilmaŝinon kun avangarda nivelo.

Tia elektroliza ilmaŝino kun ĉina stilo aplikas tute novan teknologian metodon anstataŭ tranĉo, t. e. elektrolizan metodon por prilabori metalon. Ĝi kapablas aŭtomate fari metalaĵojn kun komplikaj fizikaj ecoj kaj geometriaj formoj, kaj ĝia produktigo estas nova kontribuo al niaj maŝinfabrika industrio kaj nacidefenda industrio.

ALTKLASA SPECIALA ULTRA-MALDIKA PAPERO POR INDUSTRIO


La ultra-maldika papero iam estis nomata de la monda papera industrio kiel atuto, nemankigebla grava izola materialo por fabriki elektronan komputilon, ekipaĵojn por aŭtomata pilotado kaj aliaj branĉoj en pintaj scienco kaj tekniko. En la pasinteco, tia papero bezonata de nia lando devis esti importita. La revoluciaj laboristoj de la Dongfeng-a Paper-fabriko de Giahing, Ĝegiang-provinco decidis mem eltrovi metodon por fabrikado de ultra-maldika papero por glorigi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la grandan socialisman patrolandon. Ili konkeris malfacilojn unujn post aliaj kaj finfine sukcese produktis rulaĵojn post rulaĵoj da ultra-maldika papero glaciigita tra la ultra-klasa kalandrililo.

Diverslandaj Popoloj Ĥamas

Prezidanton Maŭ

En la Ĉina Ekspozicio de Eksportaj Varoj, tenante la ruĝajn libretojn Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong, grekaj maristoj sin fotas antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ por esprimi al li sian respekton.






Kolombia laboranta virino studas verkon de Prezidanto Maŭ.



Alte tenante Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong, usonaj popoloj faras manifestacion indigne protestante la armitan provokon lanĉitan de la sovetunia reviziismo kontraŭ Ĉinio.

La pakistana popolo amas Maŭzedongpenson. Ĝi tradukis kaj eldonis multajn verkojn de Prezidanto Maŭ en la lastaj jaroj. Jen Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong en urdua lingvo estas bindata en iu presejo de Lahore.





*Du maristoj de Mauritius estas en
studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.*

Porliberaj batalantoj de Mozambiko kolektive studas verkojn de Prezidanto Maŭ.



Hodiaŭ Ĝangiang-haveno



EN la sudo de Ĉinio sin trovas moderna haveno. Ĝi estas Ĝangiang-haveno konstruita de la ĉina laborista klaso per siaj laboremaj manoj, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “sen-dependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”.

KONSTRUI NOVAN HAVENON SINAPOGAN- TE SUR PROPRAJ FORTOJ

Ekde la jaro 1898 Ĝangiang sate suferis tratan de fremdlandaj agresantoj; post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝi trafis kruelan rabadon de Kuomintango. La popolo de Ĝangiang vivis en tia sufero tutan duonon da jarcento.

Antaŭ la Liberiĝo, Ĝangiang estis postgiganta konsumata urbo. Krom opioj, vetejojn, prostituejojn kaj ordinarajn butikojn, ĝi havis nur unu kadukan lignan viaduktan kajon, kiu taŭgis por ankri nur lignajn velŝipojn kun malpli ol 30 toneloj. Vaporŝipoj devis ankri nur en Guang-ĝou-golfo. Por ŝarĝo aŭ malŝarĝo de ŝipoj oni devis uzi barĝojn, kies laborefiko estis tre malalta, tiel ke por elŝipigi kelkcent tunojn da varoj oni bezonis 2-3 tagojn.

Je la jaro 1949, Ĝangiang liberiĝis. De tiam la sorto de Ĝangiang-haveno estas ektenita en la manoj de la ĉina popolo. Por rapide ŝanĝi la mizeran fizionomion kaj pli bone subteni la socialisman konstruadon de la patrolando kaj la mondan revolucion, kun revolucia spirito kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi, nia laborista klaso mem projektis kaj konstruis tiun novan modernan havenon. Ekde tiam vaporŝipoj el landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo, Afriko, Oceanio kaj Latinameriko navede frekventas tiun tutjare nefrostigitan ha-

venon.

Hodiaŭ Ĝangiang-haveno ebligas al dek mil-tonelaj ŝipoj ankri ĉe siaj doko en ĉiu ajn tempo, kaj ŝarĝo kaj malŝarĝo de ŝipoj estas tute mekanikigitaj. Ĝi jam fariĝis unu el la gravaj havenoj de nia lando. La eksportaj varoj de Guanghi, Junnan, Gujĝou kaj aliaj lokoj povas esti portataj al Ĝangiang-haveno per Litang-Ĝangiang-a Fervojo kaj de tie rekte eksportiĝi, ne bezonante iri kelkmil liojn al Ŝanhajo, Kingdaŭ aŭ Dalian.

Kun la disvolviĝo de la havena konstruo, la vivo de laboristoj multe pliboniĝis. En la havena kvartalo fondiĝis magazenoj, bankoj, hospitaloj, teatroj kaj lernejoj por gefiloj de laboristoj. La dokaj laboristoj, kiuj pasinte laboris kun unu vekto kaj unu ŝnuro, vivis en mizero kaj tranoktis ĉe stratoj, nun enloĝiĝis en grandajn laktoblankajn domojn dank’ al zorgo de la Komunista Partio.

MASTROJ DE LA NOVA HAVENO

Post la Liberiĝo, la dokaj laboristoj fariĝis mastroj de la haveno. Sub gvido de la Partio, ili efike administras tiun modernan havenon.

Antaŭ la Liberiĝo, la dogana povo de Guang-ĝou-golfo estis tenata en la manoj de fremdlandanoj, eĉ la havenaj pilotoj ĉiuj estis fremdlandanoj. Sen pilotado de fremdlandano, ĉina ŝipo ne rajtis eniri la ĉinan havenon. La haveno ne havis ĉinajn teknikajn laboristojn kaj inĝenier-teknikajn laborantojn. Post la Liberiĝo, la ĉina popolo fariĝis mastro de sia lando kaj prenis al si la doganan povon, kaj ĉiuj havenaj pilotoj estas ĉinoj. Nutrate de Maŭzedongpenso, rapide kreskas vicoj de teknikaj laboristoj kaj inĝenier-teknikaj laborantoj.

En 1958 fiŝŝtdevena piloto Jang Jaguj la unua starigis rekordon nokte pilotoj dekmil-tonelan ŝipon en la havenon. En la fino de 1965, li sukcese pilotis pli ol 24,000-tonelan grekan ŝipon en la havenon. Foje, unu itala ŝipo ŝargita per pli ol 25,000 tunoj da varoj estis nokte ankrona en Ĝangiang-haveno. Pro la granda korpo de la ŝipo, ĝia peza ŝarĝo kaj plus tio, ke stirila kabineto troviĝas en la poŭpo, la stirado estis tre malfacila. Laŭ la rutino difinita de la burĝaraj teknikaj aŭtoritatuloj, estis malpermesite por ŝipoj eniri dokon en nokto. Sed la juna piloto Vu Zuntan kreskanta en Maŭzedong-epoko kuraĝas pensi, kuraĝas agi kaj kuraĝas iri la vojon, kiun ne iris la antaŭuloj. Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn, sed taktike ni devas trakti ilin ĉiujn serioze”**, antaŭ sia surŝipigo li analizis kune kun siaj kamaradoj direkton de la vento, marfluojn kaj manipuladojn, kaj poste sub efika kunlaboro de trenboato li sukcese pilotis kaj ankrigis tiun grandan ŝipon ĉe doko de Ĝangiang. De 1968, pilotoj sukcese pilotis en nokto 3 varŝipojn kun pli ol 34,000 toneloj en la havenon. Tio vivece pruvis refoje, ke posedante Maŭzedongpenson, oni povas krei ĉian ajn miraklon en la mondo.

Hardite en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la dokaj laboristoj levis senprecedence sian politikan konscion. Nemalmultaj elstaraj laboristoj estis elektitaj en diversnivelaĵajn revoluciajn komitatojn kaj rekte tenas la gvidantecon de la haveno.

Sub gvido de la revoluciaj komitatoj, la havenaj laboristoj, kun pli alta batalvolo kaj neelĉerpebla energio, konstante novigas produktajn rekordojn. Hodiaŭ la ŝarĝa kaj malŝarĝa kvanto de la haveno egalas al pli ol 3.5 obloj de tiu en la komenca periodo post konstruiĝo de la haveno kaj al pli ol 20 obloj de tiu plej alta antaŭ la Liberiĝo.

HAVENO DE AMIKECO

En Ĝangiang-haveno, ĉie cirkulas kortuŝaj rakontoj saturitaj de internaciismo.

En 1965, kuiristo de pakistana ŝipo falis malfeliĉe de ŝipa ŝtuparo kaj vundiĝis grave. La havena administracio sendis lin per aeroplano al iu hospitalo de Kantono kun bonaj kuracekspertoj. Post resaniĝo, li diris kun senlima dankemo: “Dankon al ĉinaj fratoj! Vian amikecon mi ĉiam gravuros en mia koro.” En januaro de 1966, tiu kuiristo denove alvenis Ĝangiang-have-

non. Li sincere petis okazigi amikecan vesperkunvenon ĉe la haveno. En la vesperkunveno plena de frateco, pakistana amikoj laŭdis la mareprofundan amikecon inter la ĉina kaj pakistana popoloj. La pakistana ĉefmaato laŭte kriis per la ĉinaj vortoj ĵus ellernitaj: “Vivu la amikeco inter Pakistano kaj Ĉinio!” “Vivu Prezidanto Maŭ!”

La similaj okazoj estas multaj. Ekz., iunokte falis en maron hispana ŝipano de greka ŝipo. Informiĝinte pri tio, niaj havenaj laboristoj kaj lingardaj PLA-anoj tuj faris urĝsaron kaj lin elsavis finfine. Alifoje, kiam japana ŝipo noktmeze sin pretigis por eniri la havenon, iu ŝipano neatente faligis nilon-kablon en maron sub la poŭpo, kaj ĝi ĉirkaŭvolvis la helicon. Antaŭ ol alveno de skafandristo, havenaj laboristoj meminitate saltis en la maron por malligi la kablajn. Pro la granda premo sub la frosta akvo, la laboristoj sen skafandroj malfacile spiradis, kaj iliaj timpanoj preskaŭ rompiĝis. Sed la havenaj laboristoj ne estis timigitaj de la malfaciloj. Firme tenante en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, ili persistis en la batalo de pli ol du horoj kaj finfine venke plenumis la taskon post 9 subakviĝoj kaj 9 elakviĝoj. Starigante la dikfingron, la ĉelokaj japanaj ŝipanoj senĉese laŭdis la firman volon de la ĉinaj laboristoj. Ili diris: “Nur tiuj laboristoj, kiuj estas nutrataj de Maŭzedongpensoj, povas tiel tutkore kaj tutanime servi al la mondaĵaj popoloj timante nek malfacilojn nek morton.”

La verkoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ fariĝis plej kara trezoro forte aspirata de la diverslandaj revoluciaj maristoj. Post atingo al Ĝangiang, ilia plej urĝa postulo estas ricevo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili unuvoĉe diris: “Maŭzedongpenso estas grandvalora trezoro.”

Por kontentigi la fortan deziron de la internaciaj amikoj pri studo de Maŭzedongpensoj, la havenaj laboristoj elmontras verkojn de Prezidanto Maŭ en diversaj lingvoj sur kajoj kaj en la marista klubo. Pro sincera peto de fremdlandaj amikoj, la laboristoj donacis al ili multajn ore brilajn insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj liajn brilajn verkojn, samtempe ili ankoraŭ organizis pli ol 20 propagandajn taĉmentojn de Maŭzedongpensoj, kiuj faras prezentojn sur kajoj, teatroj kaj en la marista klubo por ke Maŭzedongpensoj disvastiĝu tra ĉiuj kontinentoj kaj oceanoj kaj ĉiam disradiu brilojn!

Novaj Kontribuoj de la Akupunktura kaj Kaŭteriza Terapio

SEKVANTE la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, en la tempo de plenumo de siaj propraj taskoj, la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo grandanombre profundigis en la kamparon por tie rondire doni kuracajn helpojn al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En sia laborado en la kamparo ili kreis kaj aplikis novan akupunkturon, kiu montriĝis bone efika, kaj tiel faris novajn kontribuojn al la kuraca kaj higiena afero en la kamparo de nia lando.

NE EKZISTAS “NEKURACEBLAJ MALSAŬNOJ”

En Ĉinio, oni ofte per la frazo “krom se vi povus paroligi mutulon” asertas nerealigeblecon de iu afero. Sed, hodiaŭ, oni per nova akupunkturo jam sukcesis solvi la malfacilan problemon paroligi mutulon. La nova akupunkturo faris multajn “nekuraceblajn malsanojn” nun kuraceblaj, tiel ke multjaraj surdmutuloj povas paroli kaj multjaraj paralizuloj povas marŝi, multjaraj

blinduloj povas vidi. Kaj nun ili ĉiuj povas denove surpaŝi sian laborpostenon.

Surdmuteco estas unu el la oftaj malsanoj, kiu de longa tempo estis rigardata de la burĝaraj medicinaj “aŭtoritatuloj” kiel “malsano nekuracebla”. Por malfermi la “malpermesitan regionon por surdmuteco” kaj liberigi siajn klasajn gefratojn je tiu sufero, kamaradoj de kuraca taĉmento de iu trupo de la Ŝenĵang-a Milita Regiono kuraĝe aplikis la novan akupunkturon kaj la unuaj sukcesis resanigi milojn da surdmutuloj. Dank’ al kuracado de iu kuraca taĉmento per la nova akupunkturo, inter la 273 surdmutaj lernantoj de la surdmutulaj lernejoj de Liaŭĵuan kaj Fuhian en Liaŭning-provinco 261 ricevis aŭdpovon, inter kiuj 252 povas nun krei laŭte “Vivu Prezidanto Maŭ!” Vidante ke iliaj infanoj komencas paroli, multaj gepatroj eklarmis de emocio. Laŭ statistiko ĝis aprilo de 1969, la kuracado farita de diversaj kuracaj organizoj de la Liberiga Armeo al pli ol 198,000 surdmutaj pacientoj en la tuta lando montriĝis efika ĉe pli ol 80 procentoj. Post multfoja esplorado kaj klinika praktikado, kuraca taĉmento de iu trupo de la Liberiga Armeo konkeris per akupunkturo la sekvaĵon de infana para-



La kuraca taĉmento de la Ĝenerala Hospitalo de ĈPLA estas en la norda Ŝenhi. Jen la taĉmentaninoj surgrimpas montojn kaj travadas riveretojn por fari kuracadon por la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵ mez kamparanoj.

lizo, konatan kiel obstinan bastionon en la kuraca sfero. En duonjaro ili kuracis entute 4,600 kriplajn infanojn kaj ĉe ties absoluta plimulto atingis rimarkindan kuracefikon.

DISVOLVADO DE LA ĈINA TRADICIA MEDICINO EN Batalo

La nova akupunkturo formiĝis kaj disvolviĝis sur la bazo de la tradicia terapio de akupunkturo kaj kaŭterizo de nia patrolando. La ĉina tradicia medicino havas longan historion kaj estas medicina trezorejo kun tre riĉaj valoraroj. La terapio de akupunkturo kaj kaŭterizo estas grava konsistiga parto de tiu trezorejo kaj akumulo kaj kristaliĝo de la spertoj kaj saĝo de la laboranta popolo de nia lando. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉiam alte taksas la laboron de esplorado kaj ordigado de la heredaĵoj de la ĉina tradicia medicino. Li ĉiam pledas por kombini la ĉinan tradician

kuracarton kaj ĉinajn medikamentojn kun tiuj de la okcidento kaj persone difinis tutan serion da orientoj kaj politikoj disvolvi nian medicinan kaj higienan aferon por krei unuigitajn novajn medicinon kaj farmacion de Ĉinio.

Sed, freneze bojkotante la proletaran kuracan kaj higienan linion de Prezidanto Maŭ, la granda renegato Liu Ŝaŭki kune kun la "higiena ministerio de urbaj sinjoraj moŝtoj" ĉiurimede ekskluzivis, batis kaj limigis la disvolvon de la ĉina tradicia medicino. Ili distrumpetis siajn strangajn asertojn, ekzemple, ke "la ĉina tradicia medicino ne konformas al scienco, sed ĝiaj praktikantoj blufas por trompi aliajn", intencante meti la ĉinan tradician medicinon en forgesitan mansardon.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio la vastaj revoluciaj amasoj kaj medicinaj kaj higienaj laborantoj disvolvis longdaŭre profundan revolucion amasan kritikadon kontraŭ la kontraŭ-revolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio de



La kuraca taĉmento kulturas "nudpiedajn kuracistojn". Jen taĉmentanino lasas "nudpiedan kuracistinon" ekzerci pingloenpikon sur ŝia korpo.

Liu Ŝaŭki, tiel ke multe altiĝis la konscio de la vastaj amasoj de kuracaj laborantoj pri la batalo inter la du linioj. Por defendi la proletaran kuracan kaj higienan linion de Prezidanto Maŭ, ili deprenis de la manoj de la burĝaraj "aŭtoritatuloj" la potencon super la tekniko de akupunkturo kaj kaŭterizo kaj tiel malfermis senlime larĝan vojon por plue elfosi trezorojn de la ĉina tradicia medicino.

La nova akupunkturo klare distingas sin de la malnova per tio, ke ĝi pikas en nemultajn punktojn sed multe pli profunde kaj ne restigas la pinglojn enpikitajn sed pikas kun forta ekscito. Laŭ la malnova akupunkturo, la ĉefaj kaj helpaj pikpunktoj estas pli multaj kaj la enigita pingloj devas resti en la korpo de paciento duonon da horo. Ĉar la enpiko estas malprofunda kaj la ekscito ne granda, por iuj malsanoj ĝia efiko estas malgranda aŭ nula. Pro la objektivaj bezonoj en servado al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la kamparo, la kamaradoj de la kuraca taĉmento de iu trupo de la Liberiga Armeo en Ŝenĵang faris dum kuraca praktikado esploradon kaj analizon pri ĉiuj pikpunktoj sur la homa korpo kaj trovis la ĉefajn pikpunktojn

por diversaj malsanoj, provis la metodojn piki profunde nur en la ĉefajn punktojn kaj ricevis rimarkindan kuracefikon.

Post la sukceso en malpliigo de pikpunktoj, kiu reduktis al la pacientoj nenecesajn suferojn, la kamaradoj de la kuraca taĉmento faris seriozan esploradon kaj analizon ankaŭ pri la problemoj de restigo de pingloj. Foje, ili kuracis per la nova akupunkturo la malriĉkamparaninon Onklinon Gaŭ, kies brako doloris al ŝi jam 5-6 jarojn kaj ne povis leviĝi. Kamarado de la kuraca taĉmento faris profundan pikon en la ĉefan punkton kaj iom plifortigis la eksciton en manipulado de la pinglo; tio kaŭzis al ŝi tre rimarkindajn sentojn de aciddoloro, elektrumo, ŝveliĝo kaj pezo. Kiam la kuracisto eltiris la pinglon tuj post enpiko, ŝi jam povis levi sian brakon. Onklinino Gaŭ diris kun ĝojego: "Bone! Mi povas labori denove per miaj manoj."

La procezo de kreado de la nova akupunkturo estis ankaŭ la procezo de seninterrompaj bataloj kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo fare de la kuracaj laborantoj kaj de akcelado de ilia ideologia revoluciigo per Maŭzedongpenso kiel ilia akra armilo. Sen la alta devkonscio de la kuracaj

laborantoj kaj ilia spirito “ekskluzive” kaj “senrezerve” servi al la popolo, ne povus esti sukceso en la eksperimentado de la nova akupunkturo.

La punkto *jamen* estas grava pikpunkto por kuraci mutecon. Ĝi, tamen, estis rigardata de la burĝaraj medicinaj “aŭtoritatuloj” kiel “malpermesita regiono” en la pasinteco. Por kateni liberan pensadon, ili eĉ arbitre asertis, ke “malprofunda piko en la punkton *jamen* rezulton ne vidos, dum profunda enpiko la vivon de la paciento kune likvidos”. Ĉu vere tiel estas la afero? Por trovi efikan kuracmetodon de surdmuta malsano, kun alta sindona spirito sanitaristo de iu trupo kamarado Ĝaŭ Puju donis konvinkivan respondon al tiuj burĝaraj “aŭtoritatuloj”. Dum provado li kuraĝe ekpikis per pinglo en la punkton *jamen* sur sia propra korpo. Kiam li enigis la pinglon je iom pli ol unu colo, lia mano iom ekmoligis. Tamen, kiam li ekmemois la instruon de Prezidanto Maŭ “**Kie estas lukto, tie estas vivofero**”, tuj ekbolis al li la sango, kaj centoble kreskis lia kuraĝeco. Li firme pli enigis la pinglon, ĝis kiam li eksentis elektrumon tra sia tuta korpo, kaj nur tiam li eltiris la pinglon. Tute bankrotis la falsa aserto de la burĝaraj “famaj kuracistoj” kaj “aŭtoritatuloj”. Surbaze de sia persona sperto li kuracis surdmutulojn per akupunkturo kaj fine donis al ili parolkapablon.

NOVNASKITAJ KURACAJ TAĈMENTOJ

La nova akupunkturo havas multajn avantaĝojn. Ĝi estas facile lernebla per uzado de simple manipuleblaj pingloj, kaj tre oportuna por la amasoj kaj pacientoj, kaj krome ĝi estas facile disvastiĝebla.

En 1968, kiam kuraca taĉmento de iu trupo de la Liberiga Armeo iris al iu insulo por doni kuracajn helpojn al la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, samtempe kun sia fervora servado ili starigis kurson kaj elkulturis 14 “nudpiedajn kuracistojn” por ili. La 14 gefiloj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkam-

paranoj, post mallonga lernado, jam ekposedis la novan akupunkturon kaj certajn metodojn pri prevento kaj kuracado de iuj malsanoj. Ili vivas en la kamparo kaj tutkore servas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili ĉefe penas por kuraci oftajn kaj ripetemajn malsanojn kaj samtempe ankaŭ klopodas per ĉiuj rimedoj por doni kuracadon al malfacilaj kaj malsimplaj malsanoj kaj tiel fundamente solvis la problemon de manko de kuracistoj sur la insulo. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris ĝoje: “La Liberiga Armeo postlasis al ni ĉiam neforirontan kuracan taĉmenton.”

La sukcesa kreo de la nova akupunkturo rompis la superstiĉon de “neatingebla alteco” de la medicino. Precipe dum la disvastigo de la nova akupunkturo, la kamaradoj de la kuracaj taĉmentoj

Por mildigi doloron de malsanuloj, membro de la kuraca taĉmento la unua serĉas pikpunktojn sur sia korpo antaŭ aplikado.



de la Liberiga Armeo serioze efektivigis la orientilon “malmulte sed plibone” kaj “ligo de la teorio kun la praktiko”, tiel ke proksimume nur dek tagoj sufiĉas al ordinaraĵ lernantoj por fundamente mastri la manipulado de pinglo. Sub mallonga trejnado de la kuraca taĉmento de la loka garnizona trupo de Liberiga Armeo, kamaradino Sun Ginglan de Ĝianĉangbaŭ-brigado en Liaŭning jam ellernis la novan akupunkturon kaj fariĝis kapabla “nudpieda kuracistino”. En sia laboro ŝi diligente vive studis kaj vive aplikis Maŭzedong-penson, sukcese kuracis multajn oftajn kaj ripe-temajn malsanojn por la vastaj amasoj kaj samtempe ankaŭ resanigis iujn pacientojn, kiuj suferis malsanojn rigardatajn de iuj “aŭtoritatuloj” kiel “nekuraceblajn”. La vastaj amasoj de malriĉkampaĵoj kaj malsuperaj mezkampaĵoj nomas ŝin “ruĝa kuracistino”.

La disvastigo de la nova akupunkturo, cetere, multe faciligis la kuracigon al la vastaj amasoj de la malriĉkampaĵoj kaj malsuperaj mezkampaĵoj en la kampaĵo. Post la disvastigo de la nova akupunkturo la elspezoj por kuracado kaj medikamentoj en Aŭroro-vilaĝo de Hingin-gubernio de Liaŭning-provinco estas multe reduktitaj kaj ĝenerale efektiviĝis, ke por kuracigi sian malsanon oni “ne plu bezonas eliri el sia brigado, forlasi la produktan laboron kaj elspezi monon”. Multaj diras: “La nova akupunkturo estas vere tre bona. Ĝi estas bonefika kaj oportuna.”

Sub la direktado de la proletara kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ, la nova akupunkturo kreita kaj aplikata de la kuracaj laborantoj de la Liberiga Armeo certe ankoraŭ multe pli disvastiĝos kaj kontribuos al la popola higiena afero de nia lando.



Rondira kuraca taĉmento de iu trupo de Ŝenjang faras kuracadon por komunumanoj en la kampaĵo.

Unua Vizito

al Dongŝan

LI MING



Kun la spirito de Daĝaj komunumanoj de Vej-dong-brigado aktive konstruas ŝtuparkampojn.

VETURANTE de Suĝoŭ per aŭtomobilo, mi atingis Dongŝan-urbeton post unu kaj duono da horoj. En la urbeto, kiu situas en duoninsulo en la lago Tajhu de Giangsu-provinco, troviĝas la sidejo de la revolucia komitato de Dongting-komunumo de Vuhian.

Ĉirkaŭ la Aŭtunmeza Festo de la jaro 1969, mi la unuan fojon vizitis la brigadojn Dajsong, Vejdong, Fanĵong, Hingguang kaj aliajn de Dongting-komunumo. Kiam mi iris laŭ la ŝtoneta vojeto de la norda piedo de Mohia-monto plej alta en Dongŝan, antaŭ miaj okuloj prezentigis densa kaj verda fruktarbaro etendiĝanta de la montpiedo ĝis la pinto, en kiu troviĝas sume pli ol dek specoj de arboj kiaj mandarino, oranĝo, eribotrio (*erio-*

botrya japonica), arbuto, kaŝtano, zizifo, ginko, granato kaj aliaj. Klara estas la akvo en la lago kaj aromas la floroj kaj fruktoj: kia pitoreske bela pejzaĝo! De tie freŝaj fruktoj estas senĉese portataj al urboj. Kiam mi vizitis la lokon, jam maturiĝis ginko, granato kaj kaŝtano, kaj la abundaj nematuriĝintaj *dongtinghong*, landfamaj fruaj mandarinoj, pendis sur la kurbigitaj branĉoj.

“Ĉu la branĉoj ne rompiĝos sub la pezo de tiel multe da fruktoj?” Mi demandis kamaradon Je, kiu akompanis min.

“Nun la fruktoj estas ankoraŭ ne tre grandaj, kaj post iom da tempo ni lige tenos la branĉojn per ŝnuroj kaj tiam nenio okazos,” li respondis ridetante.

Ni iris sub la mandarinaj arboj kaj baldaŭ aŭdis helan kantadon de komunumanoj. Tamen, pro la densaj arboj ni povis vidi neniun.

Post longa marŝado sub la gvido de kamarado Je, mi fine venis al loko, kie ne estis tiom densaj la fruktarboj, kaj vidis komunumanojn intense konstruantaj ŝtupajn kampojn.

Kamarado Je estas konstanta komitatano de la revolucia komitato de Dongting-komunumo. Li afable salutis la komunumanojn, kaj el tio mi vidis ke li havas tre intiman rilaton kun ili. Mia admiro estis, ke tiu 26-27-jara junulo konas jam multajn simplajn komunumanojn en produktaj grupoj, post kiam li komencis plenumi sian gvidan laboron nur en malpli ol du jaroj. Kaj kiam mi ekparolis kun iu komunumano, li jam partoprenis en la laboro de konstruado de ŝtupaj kampoj profitante la okazon.

Dum la vizitado mi informiĝis, ke en la komunumo la fruktoplantejo ampleksas pli ol 8,600 muojn, inter kiuj pli ol 3,000 muoj estas nove

plantitaj per junaj fruktarboj en la lastaj jaroj. Komunumanoj diris al mi, ke dank' al la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ĉiamvenka Maŭzedongpenso estas disvastigita kaj popularigita en senprecedenca grado, kaj tre alte levigis ilia entuziasmo en **"teno de la revolucio kaj stimulo de la produkto"**, tiel ke ili akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn en la produkto de agrikulturo kaj flankokupoj. En 1968, ili rikoltis pli ol 1,650 tunojn da mandarinaj, sed en la jaro 1957, antaŭ la fondiĝo de la popola komunumo, ĉi tie la totala produktokvanto de mandarino estis nur iom pli ol 500 tunoj. En 1968, la totala produktokvanto de fruktoj en la tuta komunumo atingis 4,600 tunojn, t. e., pli ol tri oblojn de tiu en la loko dum la komenca periodo post la Liberiĝo. Ankaŭ la produktokvantoj de aliaj ekonomiaj plantaroj kreskis en diversaj gradoj. En 1969, ekonomiaj plantaroj de la komunumo refoje donis riĉan rikolton. En la unua duono de la jaro la komunumo rikoltis 25,500 kilogramojn da teo, kun kresko de preskaŭ unu oblo ol en la rikolto en 1968, kaj ankaŭ la kresko de rikolto de persikoj superis

Rikolto de te-folioj



unu oblon kompare kun tiu de 1968. Tamen, la komunumanoj ne estas jam kontentaj pri la nuna produkta nivelo. Disvolvante la spiriton de Daĝaj ili elmetis la batalan sloganon "akiru agrojn de Tajhu-lago". Dum mia vizito, la komunumanoj ĝuste estis konstruantaj digojn en malprofundaĵoj ĉe la bordo de la lago por ricevi agrojn post elpumpo de la akvo.

Preterpasinte iun monton, mi vidis ke la komunumanoj de Hingguang-brigado rikoltas tefoliojn. Ankaŭ tie regis intensa laborado kaj montriĝis sceno de riĉa rikolto. Post la rigardado, mi venis al la oficejo de la revolucia komitato de Dongting-komunumo. Laŭ mia peto respondeculoj de la revolucia komitato rakontis al mi la klasbatalon kaj batalon inter la du linioj en la komunumo antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. Dongting-komunumo okupiĝas pri multaj specoj de produktado, kaj en ĝia jara enspezo krom tiu de fruktoj, ankaŭ tiuj de grenoj, fiŝbredo, teo kaj silkaj kokonoj okupas sufiĉe grandan proporcion. Post la Liberigo, la revoluciaj amasoj de Dongting-komunumo ekmarŝis grandpaŝe sur la larĝa vojo de socialismo, laŭ la direkto montrita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **disvolu ekonomion kaj garantiu provizadon**, sub la unueca dispono de la ŝtata plano, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj aktive subtenas la industrion, urbojn, socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon. Sed sub la venena influo de la kontraŭ-revolucia reviziismo de la granda renegato Liu Ŝaŭki, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la komunumo, por akiri pli da enspezo, ne volis vendi al la ŝtato agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn. Ili kriaĉis, ke "tio donos malpli da enspezoj al la kolektivo kaj komunumanoj kaj ne estas profita," intencante puŝi la brigadojn sur la kapitalisman vojon.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la revolucia komitato de Dongting-komunumo mobilizis la amasojn kaj kune kritikis forte la reviziisman linion antaŭenpuŝitan de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la komunumo, tiel ke multe leviĝis la konscio de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri la klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. La revoluciaj amasoj firme decidis: "La socialisman vojon ni iros definitive." Hodiaŭ, en la komunumo ĉie elmontriĝas prospero.



40-KUBMETRA GRANDTIPA ALTPREMA GENERATORO DE ACETILENO

Kun la revolucia spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la revoluciaj laboristoj de la Riparejo de Pasaĝeraj Vagonoj en Ĝengĝou sukcese provproduktis 40-kubmetran grandtipan altpreman generatoron de acetileno post pli ol 120 eksperimentoj kaj per tio pretigis favoran kondiĉon por veldi kaj fande tranĉi metalaĵon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

Tiu generatoro estas facile manipulebla, funkcias stabile kaj sekure kun granda gasiga kapablo, kaj la pureco de la produktata acetileno estas alta. Tiu generatoro povas produkti 40 kubmetrojn da acetileno en ĉiu horo, kaj provizi sufiĉe da gaso al 40 veldantoj. Dank' al apliko de tiu generatoro, oni altigis la utiligan procenton de acetilena ŝtono de 60 ĝis 98 procentoj.

UNIVERSALA SENRUSTIGA AŬTOMATO

Laboristoj de la Fabriko de Konstruaj Maŝinoj en Harbino de Hejlonggiang sukcese provfabrikis universalan senrustigan aŭtomaton.

La tasko de tiu fabriko estis farado de konstruaj maŝinoj, kies partoj estas grandaj kaj komplikaj en formoj, kaj ĝi havas multan senrustigan laboron. En la pasinteco, la laboristoj senrustigis per feraj brosoj kaj mantenataj elektraj smirgdiskoj kaj tiel ne nur ne povis forigi ruston sur kaŝitaj lokoj kaj anguloj de maŝinpartoj sed ankaŭ la laborefiko estis malalta kaj la fizika laboro estis tre peza. Laborante per la universala senrustiga aŭtomato, la manipulanta laboristo okupiĝas nur pri premado de elektrobutoj starante sur la elektra direktejo. Per tiu aŭtomato oni ne nur povas forigi ruston de ŝtalaĵoj komplikformaj el gisŝtalo, gisfero, ŝtalplato kaj aliformaj ŝtalmaterialoj, sed eĉ povas senrustigi la objektojn ĝis taŭgeco por lakado kaj 32-oble plialtigi la laborefikon.

Disvolvi Lokan Industrion


Sinapogante sur Propraj Fortoj

Observante la grandan strategian orientilon de Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, la vastaj revoluciaj popolamasoj de Gijuan-gubernio, Henan-provinco, dum jungado de montoj kaj riveroj por disvolvi la agrikulturan produkton, laŭplane ekspluatas riĉfontojn en sia loko por disvolvi la industrion funkciigatan de gubernio.

Ili persistas en direkto, ke la gubernia industrio servu al la agrikultura produkto. Escepte de malmultaj fabrikoj kaj minejoj kiuj liveras al la ŝtato kru-dajn materialojn, la aliaj ĉiuj tenas intiman rilaton kun la agrikultura produkto.

Kun disvolviĝo de la gubernia industrio, nombro da teknikaj laboristoj de Gijuan-gubernio, Henan-provinco rapide kreskas. Jen la grupestro de martinformo kamarado Duan Devang (meze) kaj liaj kunbatalantoj observas la bolantan ŝtallikvaĵon.





Laboristoj muntas memfabrikitan dufostan robotmaŝinon.



La fabrikoj funkciigataj de la gubernio tre atentis pri maksimuma utiligo de la lokaj riĉfontoj. Dum fera ekstraktado oni ĝenerale devas preni koakson kiel la hejtaĵon, tamen en tiu gubernio mankas koakso sed multas antracito. La Ferŝtala Fabriko Panĉun produktis en sia malgranda altforno laŭnorman grizan krudferon per antracito kiel hejtaĵo, kaj tiamaniere ne nur solvis la problemon pri hejtaĵo, sed ankaŭ multe reduktis la produkthan memkoston.



La Kegin-a Minejo de Gijuan-gubernio estis konstruita en la antaŭensaltego de 1958. En la lastaj jaroj ĝia produkto senĉese disvolviĝas kaj fundamente kontentigas la bezonojn de industrio, agrikulturo kaj ĉiutaga vivo de la gubernio.



Jen laboristoj kaj komunumanoj riparas dizelon en sturma maniero.


La laboristoj de Tieŝan-a Ferekspluatejo estas en laboro.





La gubernia industrio kulturas kaj hardas sian teknikan vicaron en praktiko. Jen novaj kaj veteranaj laboristoj kaj revoluciaj gvidantaj kadro kune projektas ilmaŝinon.

La guberniaj fabrikoj produktas grandan nombron de pumpiloj, senŝeligiloj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj.



Kiam Mi Laboris Kune

kun Laboristoj

EN 1954 mi diplomiĝis en la altlernejo. Poste mi laboris 7 jarojn en la projekta institucio. En 1961 mi estis transpostenigita en la Pezmaŝinan Fabrikon de Ŝenjang kaj okupiĝis tie pri teknika laboro en la oficejo.

En novembro de 1968, mi venis en la gasstacion de nia fabriko por akcepti reedukon de la laborista klaso, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“Rilate al grandnombraj diplomitoj de altaj kaj mezaj lernejoj, kiuj jam delonge aŭ ĵus komencis laboron, necesas fari al ili reedukon por ke ili sin kombinu kun laboristoj kaj kamparanoj”**.

En la laborejo mi laboris kiel cindroforigisto. Iufoje mi purigis cindrujon, kie estis sufokanta varmego. Kiam mi abrupte levis mian kapon, la lasta ĝuste tuŝegis vaporan tubon troviĝantan malantaŭ mi kaj tuj aperis sur ĝi ŝvelaĵo. Mi tre koleriĝis kaj demandis laboriston-majstron: “La loko ne taŭgas por instali la vaporan tubon, kaj la kapo facile tuŝegas ĝin. Kiu tion faris?” Tiu laboristo-majstro respondis: “Ej, inĝeniero Kong, ĉu tio ne estas instalita laŭ via projekto?” La parolo de la majstro ruĝigis mian vizaĝon kaj min tre maltrankviligis. Certe ne malmultaj estis tiaj aferoj pro tio, ke en la pasinteco mi ne profundigis en bazajn unuojn kaj mia laboro apartiĝis de praktiko. Hodiaŭ la tuŝego je mia kapo estas por mi merita puno. Se intelektuloj ne sin kombinas kun la laborista klaso, do ili sukcesos en nenio.

Dank’ al sinhardo en fizika laboro, leviĝis paŝon post paŝo mia konscio pri la batalo inter la du linioj, pluroble plifortiĝis mia malamo al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj multe pliiĝis mia amo al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Mi faris firman decidon forlavi de mia korpo la malpuraĵon de burĝara

intelektulo per ŝvito en laboro, min hardi kaj transformi, iom post iom movi mian starpunkton al la flanko de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj elforĝi ruĝan koron ĉiam fidelan al Prezidanto Maŭ.

Iufoje kiam mi informiĝis ke laboristo-majstro pretis iri purigi elŝprucigilon de lavtureto, mi pensis en mi, ke tiu laboro estas malpura kaj laciga, kaj tio estas bona ŝanco por transformi mian malnovan ideologion, tial mi devas tien iri. Mi diris: “Majstro, mi iru kune kun vi!” Li ĝoje diris: “Bone, iru!” Sed kiam ni atingis la tureton, li zorgeme diris al mi: “Tiu laboro estas kompare peniga, malpura kaj laciga, vi laboru ekstere kaj mi iru internen.” Mi pensis, ke ju pli malfacila estas laboro, des pli ĝi povas remuldi kaj hardi homojn. Mi la unua eniris en la lavtureton. Kvankam tiu tureto estas projektita de mi mem, tamen mi neniam ĝin eniris en la pasintaj dek jaroj post finkonstruiĝo de la gasstacio. En ĝi mi sentis kvazaŭ en vaporumilo. Desupre faladis malpuraj akvogutoj, sube de piedoj estis dika tavolo da glueca gudro kaj tio tre malfavoris al la laboro. Ĉe la pordeto de la tureto la aero estis iom pli freŝa, sed ju pli mi iris internen, des pli mi sentis min preme sufokita kaj malfacile spiradis. Plej damninde estis ke la spaco, kie mi laboris, altas nur pli ol unu metron kaj en ĝi mezstatura homo ne povas labori kun elrektigita talio, por ne paroli pri mi altkreskulo. Post mallonga laborado mi tutkorpe ŝvitis, kaj elĉerpigis miaj fortoj. Krome, miaj manoj, vizaĝo, ĉapo, ŝuoj kaj vestoj ĉiuj estis ŝmiritaj de gudro, kies akraodoro pikis min ĝis larmoj. La majstro zorgeme demandis min: “Ĉu vi laciĝis? Eliru por iom spiri, kaj mi anstataŭu vin.” En tiu tempo mi tre volis eliri por enspiri freŝan aeron, sed mi pensis, kial laboristoj-majstroj povas persisti en tia laboro dek kelkajn jarojn, sed mi ne

povas eĉ en tiel mallonga tempo? Ĉu ne ĝuste en tio mi devas ricevi reedukon de la laborista klaso? Do mi parkeris **“faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, kaj persistis en la laboro ĝis la fino. La majstro intime subtenis min elpordiĝi kaj humore diris starigante la dikan fingron: “Altkreskulo, ni bonvenigas intelektulojn kia vi!” Mi haste diris: “Kompare kun laboristoj-majstroj, mi ankoraŭ malproksime postlasiĝis!”

En la laboro mi jam starigis profundan amikecon kun laboristoj-majstroj. Ili ne nur prizorgis min en la vivo, ideologio kaj politiko, sed ankaŭ iniciate interkonsiliĝis kun mi pri solvado de problemoj en produktado. Por solvi la problemon nesolvitan de en- kaj ekster-landoj, nome: ĉerpi gudron el la vertikala tubo, mi elpensis projekton ke gudro mem elfluu el la tubo, kaj post tio per altprema pumpilo forlavi ĝin el defluo en basenon. Pro manko de praktikaj produktaj spertoj, mi ne kuraĝis konkludi kaj fari provon. Sed konsiliĝinte kun laboristoj-majstroj, ili ĉiuj kun certeco diris: “Laŭ niaj spertoj tiu metodo estas tute aplikebla.” Ni rapide faris provadon. Sed poste ni trovis, ke la sekureco en produktado ne estas certa. Se deflua tubo estas ŝtopita, do tio kaŭzas leviĝon de akvonivelo, kaj se la akvo enfluas en fornegon, do tio estigos abruptan ŝprucadon. Post ripetada esploro ni decidis aldoni sekuran akvohermetikilon. Por solvi la problemon pri instaliĝo de sekura akvohermetikilo sub la funkciado, mi cerbumis kelkajn tagojn, rondiris plurajn cirklojn ĉirkaŭ la ekipaĵo kaj elmetis plurajn projektojn. Sed ĉiuj tiuj ne estis perfektaj. Mi turnis min al laboristoj-majstroj por peti helpon. Antaŭ ol mi klarigis miajn ĉiujn projektojn, laboristo-majstro min interrompis: “Ej, altkreskulo! Ne necesas tiom multe da penado, ĉi tie faru truon, jam sufiĉas!” La vortoj de la majstro solvis la problemon por kiu mi cerbumis kelkajn tagojn. Laŭ la propono de la majstro la problemo por instali la sekuran akvohermetikilon rapide solviĝis. Sub la helpo de laboristoj-majstroj ĉerpado de gudro el vertikala tubo per nova tekniko estis sukcese provita. Nun por ĉerpi gudron el vertikala tubo oni ne uzas homan forton, nur se laboristo ŝaltas, la gudro tuj forlaviĝas en la basenon. Tiamaniere

la laboristoj liberiĝis el la peza fizika laboro de dek kelkaj jaroj.

De la pasinta unu jaro mi kune kun laboristoj-majstroj faris teknikan esploron en kombino kun produkta praktiko kaj solvis problemojn pri rimena forigo de cindro, forlavado de gudro, varmokonservo de kuvo de pulvora karbo, gas-veldo, plibonigo de laboraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. La praktikado pli konvinkis min, ke la revoluciaj laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso estas la plej sciohavaj, talentaj kaj kapablaj en solvado de praktikaj problemoj. Kvankam ili ne vizitis fakajn lernejojn, tamen ili posedas riĉajn praktikajn spertojn neakireblajn en libroj. La laboristoj-majstroj plej fidelas al Prezidanto Maŭ, plej vive studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili revolucias ne por individua honoro kaj profito, timante nek malfacilojn nek morton. Nur se intelektuloj sin kombinos kun laboristoj, ili povos fari kontribuon en la afero de socialisma konstruado. Mi decidis pli diligente studi kaj apliki vive verkojn de Prezidanto Maŭ, modeste akcepti reedukon de laborista klaso, ĝisfunde transformi la burĝaran mondkoncepton, firme starigi la komunisman mondkoncepton, daŭre revolucii kaj senĉese antaŭenmarŝi en la tri grandaj revoluciaj bataloj strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

**La verkinto estas aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Liaŭning-provinco kaj inĝeniero de la Pezmaŝina Fabriko de Ŝenjang.*

Kamarado Kong Hiankaj (la dua de maldekstre) studas teknikan renovigon kune kun laboristoj.



Hjue Sanzi Sindonema

por Savi Aliajn

ESTIS junio. Super regiono de Altin-montaro (limregiono de Gansu, Kinghaj kaj Hingiang de nia lando) senlime etendiĝis la lazura ĉielo, brilis la suno kaj la neĝkovritaj montpintoj prezentiĝis aparte bele kaj impone.

Hjue Sanzi, batalanto de iu unuo de Langŝou-a Trupo de ĈPLA kune kun siaj kamaradoj ekspluatis asbeston sur la monto 3,800 metrojn alta super la marnivelo. Kelkaj kamaradoj sur la dekstra montpinto jam faris truon, enmetis dinamiton kaj ekbruligis la meĉon. Post kiam ĉiuj foriris kaj ŝirmis sin sub la komando de subplotonestro Ĝaŭ Hinggen, kun tondrego eksplodis ŝtontavoloj. En tiu momento ŝtono trafis la kapon de Ĝaŭ Hinggen kaj li falis sur krutan deklivon de pli ol 70 gradoj. Ĝaŭ Hinggen rapide ruliĝadis malsupren. Unu metron, tri, kvin, dek..... Kaj tridek metrojn fore estas abismo. Se li falos en la abismon, li tuj dispeciĝos.

En tiu kriza momento Hjue Sanzi fluge elpaŝis el la ŝirmejo, saltis de sur eĝo alta je tri metroj kaj kuris al la rando de la krutaĵo. En lia kapo estis nur unu ideo: nepre savi subplotonestron Ĝaŭ malsupren ruliĝantan. Kun sentima revolucia spirito li rapide atingis lokon kelkajn paŝojn foran de la rando de la krutaĵo, kaj spite al danĝero fali kune en la abismon pro ruluŝo de Ĝaŭ Hinggen, li antaŭenpaŝis kaj per la tuta forto brakprenis lin.

Subplotonestro Ĝaŭ estis savita. Kamaradoj varme laŭdis la heroaĵon de Hjue Sanzi, kiu sindoneme savis sian kunbatalanton. Multaj estas heroaĵoj pri sindonemo de Hjue Sanzi por savi aliajn.

Estas li, kiu iam brave luktis sola kontraŭ kruela lupo kaj savis el la faŭko Hjue Danhua, la knabinon de malriĉkamparano.

Estas li, kiu kvin fojojn saltis en diluvon por savi infanojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj brutojn de produkta brigado.

Estas li, kiu, spite al danĝero de morto, haltigis per sia korpo grandan ŝtonon ruliĝantan de sur la monto kaj tiel ŝirmis siajn kunbatalantojn dum transportado de ŝtonoj en la trupo.

Estas li, kiu, spite al rigora frostoj, saltis en akvon kaj per sia korpo ŝtopis breĉon de digo.

.....

En multaj faroj de Hjue Sanzi enkorpiĝas la spirito de ĝisfunda revolucio de la proletaro timi nek malfacilojn nek morton, kiel ĉiam alvokas Prezidanto Maŭ. Dum tiuj agoj li neniam konsideris pri si mem aŭ pri danĝero, en lia kapo estis nur unu ideo: revolucio postulas min tiel agi!

“Se nur estas afero utila al la popolo, Sanzi ĉiam ĝin faras per sia tuta forto!” tiel laŭdis lin multaj maljunaj malriĉkamparanoj.

Jang-vilaĝo kie Hjue Sanzi plenumas taskon de subteno al agrikulturo estas malproksima de puto kaj estis malfacile por amasoj preni akvon. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ zorgi la vivon de la amasoj, Hjue Sanzi mobilizis la amasojn fosi puton en la vilaĝo. Ju pli ili fosis, des pli fariĝis profunda la puto kaj des pli danĝera estis la laboro en la fundo de la puto. Hjue Sanzi diris: “Danĝera estas la laboro, mi faru!” Li ne lasis komunumanojn malleviĝi en la puton, dum li mem laboris tie per la tuta forto. Ŝtonetoj kaj sableroj senĉese falis de la muro de puto sed tion li spitis; en la fundo aperis akvo, sed li ankoraŭ persistis en fosado starante en ŝlima akvo profunda ĝis talio kaj laboris ĝis finfoso de la puto.

La ruĝa koro de Hjue Sanzi kiu tutanime servas



80-TUNA PEZTIPA VIBRA VOJPREM-MAŝINO

Lastatempe, la Fabriko de Konstruaj Maŝinoj en Luoŝang sukcese projektis kaj fabrikis la unuan 80-tunan peztipan vibran vojprem-maŝinon de nia lando. Tiu ĉi maŝino estas relative malpeza, malgranda, kun malalta gravita punkto kaj granda kapablo de deklivogrimpo, facile manipulebla kaj altefika. Ĝi estas nova frukto en la maŝinfarado de nia lando.

Akceptinte la taskon de projektado kaj fabrikado de la unua 80-tuna peztipa vibra vojprem-maŝino de nia lando, laboristoj de tiu fabriko iris al konstruejoj en la Nordoriento kaj aliaj lokoj por fari esploron kaj enketon kaj akiris unuamanajn materialojn pri fabrikado de tia maŝino.

Observante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Ni devas rompi la rutinojn kaj laŭeble apliki avangardajn teknikojn", ili kuraĝe rompis en projektado la malnovajn regulojn kaj aplikis nombrojn da avangardaj strukturoj dank' al la saĝo de la kolektivo.

RIMENA PESMAŜINO

La revoluciaj laboristoj kaj teknikaj laborantoj de la Fabriko de Havenaj Maŝinoj en Ŝanhajo lastatempe mem projektis kaj produktis sukcese rimenan pesmaŝinon kaj per tio faris kontribuon por rapidigi la ŝarĝon kaj malŝarĝon en la havenoj.

En la pasinteco, en niaj havenoj oni kalkulis la pezon de en-kaj el-ŝipigataj nepakitaj varoj laŭ la akvomezurilo de la ŝipo kaj ofte ne povis scii ilian ĝustan pezon. La revoluciaj laboristoj de la fabriko decidis fabriki rimenan pesmaŝinon, kaj ili sukcesis tion fari nur en du monatoj subtenate de doklaboristoj kaj en kunlaboro de frataj entreprenoj. Provado en haveno montris, ke ĝia erar-procento en pesado estas nur 0,33%, kiu estas malpli granda ol tiu de 0,5% de similaj maŝinoj de kapitalismaj landoj.

al la popolo kaj revolucio estas forĝita dank' al la brilaj "tri popularaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ.

Hjue Sanzi kreskinta sub la ruĝa flago glorie aliĝis al la Popola Liberiga Armeo en 1965. La unua leciono donita de la politika direktanto al rekrutoj estis la brila verko de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. Kvazaŭ hela lampo la alvoko "Servu al la Popolo" lumigis la koron de Hjue Sanzi. En pluraj noktoj, kuŝante sur la lito, li cerbumadis pri ĝia profunda signifo. Memorante pri la pasinteco, rigardante la nuntempon kaj antaŭenrigardante la estontecon, li profunde konsciis,

ke kun la ruĝa koro servi al la popolo la revoluciaj antaŭuloj liberigis la tutan Ĉinion kaj ankaŭ lian familion; nun ni devas kun ruĝa koro servanta al la popolo dediĉi niajn fortojn por liberigi la tutan homaron. De tiam li ĉiam agas laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ kaj elstare plenumas sian taskon.

En la Nacia Festo de 1969 Hjue Sanzi venis al Pekino por celebri la feston kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Li emocie diris: "Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, mi nepre strikte sekvos vin, kaj dediĉos ĉion mian al la revolucio kaj popolo!"



Modela Poŝtisto

JANG ĴUNŜENG estas poŝtisto en Liŝuping-komunumo de Jinghian-gubernio, Ŝanhi-provinco. Li okupiĝis pri la laboro jam dudek unu jarojn. Ekde la jaro 1964, li estas modela laboranto kaj aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en poŝttelegrafa laboro de Jinghian-gubernio.

Liŝuping-komunumo situas en dise loĝata montregiono alta je pli ol 1,000 metroj super la mar-nivelo, kie zigzagas malglataj vojoj. Tie poŝtisto ĉiutage devas iri montan vojon de pli ol sesdek lioj kun poŝtpako de dekoj da ĝinoj sur la dorso. Sed, en la pasintaj dudek unu jaroj, gravurante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **“tutkore kaj tutanime servi al la popolo”**, Jang Ĵunŝeng akurate iris al la laboro kaj ĉiamaniere plenumis sian taskon eĉ kiam venis monttorento aŭ vojo estis obstrukcita de neĝego.

Pluvegis iun matenon. Kiel antaŭe, Jang Ĵunŝeng estis preta eliri al la laboro. Iu lin konsilis: **“Nun pluvegas kaj furiozas monttorento, estos danĝero! Vi prefere iru iom poste!”**

“Por fari revolucion oni ne devas timi danĝeron!” firme respondis Jang Ĵunŝeng. Kaj preninte sur sian dorson la poŝtpakon li ekiris ĝustatempe malgraŭ la pluvego.

Kiam li atingis bordon de iu montfluejo, la muĝanta torento

kun ruliĝantaj ŝtonoj baris al li la vojon kaj ne estis eblo por li ĉirkaŭ-iri ĝin. Demetinte siajn vestojn kaj alliginte strikte la poŝtpakon al sia korpo, li komencis travadi ĝin. Sed, dum vadado li estis faligita de la torento, kaj li sukcesis rampi sur la transan bordon, nur kiam li estis puŝita ĝis malprofundejo. Rimarkinte, ke la poŝtpako restas sendifekta kiel antaŭe, li ĝoje diris al si: **“La pakaĵoj ne estis malsekigitaj, tio ja estas venko!”** Tuj post tio li rapidigis siajn paŝojn antaŭen. Post kelkaj paŝoj, li eksentis doloron sur siaj membroj kaj trovis sur ili vundojn ricevitaĵojn pro froto de akraj ŝtonoj. Tamen spite tion li kuris senhalte al la celloko, kaj de tie li revenis akurate al la poŝta stacio.

Dum vintro, montvojoj ofte estas obstrukcitaj de neĝo. Tamen kamarado Jang Ĵunŝeng ĉiam akurate iras al sia servo. Foje, furiozis neĝvento. Li devis rampi dum montascendo, kaj malsupren gliti kvazaŭ ĉe **“glitejo”** dum descendo. Neatendite, li glitis en neĝkavaĵon sur iu deklivo. Kaj la neĝego kunkirlita de la furioza ventego lin kovris en palpebruma tempdaŭro. Recitante parkere: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, li ruliĝadis al neĝa malprofundejo kaj sukcesis elrampi. En tiu tago, same kiel antaŭe, li atingis ĝustatempe la destinitan vilaĝon kaj enmanigis la poŝtaĵojn al la adresitoj.

En aprilo de 1969 okazis la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. Kun senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, Jang Ĵunŝeng kuris senhalte al loko je 30 lioj malproksima por preni la novaj-komunikon de la Naŭa Kongreso de la Partio, kaj dum reveno li disdonis la presitajn komunikojn al naŭ brigadoj ambaŭflanke de la vojo. Kiam li revenis al la poŝta stacio, jam vesperiĝis. Kamaradoj konsilis lin vespermanĝi kaj ripozi. Sed, pensante ke la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj aspiras legi la novaj-komunikon, li tuj forlasis la stacion en la sama nokto por daŭre disporti la komunikon malgraŭ sia malsato kaj laciĝo. Jam estis noktomezo, kiam li atingis Hiaŭbu-brigadon, kiu troviĝas en la plej alta monto en la loko. Vekinte kadron de la brigado kaj doninte al li la presitajn komunikojn, li tuj foriris plu al alia brigado.

Nur je vesperiĝo de la sekvinta tago Jang Ĵunŝeng revenis al la poŝta stacio. En tiuj du tagoj kaj unu nokto li transgrimpis tri montegojn, trapasis dekojn da grandaj kaj malgrandaj valoj kaj montfluejoj, tra iris tridek du montvilaĝojn, kun totala vojaĝo de pli ol 180 lioj por porti ĝustatempe la novaj-komunikon de la Naŭa Kongreso de la Partio al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



Letero de Ĉeĥoslovaka Leganto J.G.

Ja, mi intencis jam pli frue skribi al vi kaj sincere danki por multaj ege bonaj artikoloj kaj gravaj informoj, kiujn mi eksciis el via ŝatata revuo EPĈ, kiu estas optimisma kaj entuziasma serĉante kaj montrante la veron, kiu tre ofte mankas. Kaj estas fakte tre agrable kaj utile legi EPĈ en niaj komplikaj cirkonstancoj kaj nunaj vivkondiĉoj.

Mi sincere gratulas al tuta kolektivo de redakcio de EPĈ kaj mi deziras al ĝi multe da kuraĝo kaj multajn sukcesojn en la utila kaj necesa laboro. Mi deziras ankaŭ al via granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong precipe fortan sanon, longan vivon kaj multajn novajn sukcesojn kaj esprimas similajn dezirojn ankaŭ por lia fidela kunlaboranto kaj kunbatalanto, Vicprezidanto Lin Biaŭ.

Letero de Itala Leganto E.M.

Faŝismmaniere diktaturantaj malŝatindaj reviziistoj, ĉefaliantuloj de la kapitalistoj, asertadas idiote, ke Ĉinio izoligas de la resto de la mondo, sed fakte la abomeneginduloj nur mensogas!! Ĉiam pli grandaj nombroj da popoloj sin turnas al Maŭzedongpenso! La vero estas, ke Ĉinio izoligas for de la registaroj de burĝaj kaj reviziistaj fitiranaĉoj dum ĝi karne fratiĝas kun la popoloj vivantaj sub la ferocega fidiktaturo kapitalist-reviziista!!!!

Letero de Itala Leganto A.C.

Mi deziras esprimi al vi ĉiuj miajn sentojn de sincera kaj frata proksimeco por vi dum tiuj-ĉi momentoj de heroa batalo kontraŭ la reviziista, faŝista, imperiista agreso de la sovetunia reviziismo, kontraŭ la perfido de la novaj kremlaj caroj, kontraŭ la novaj Hitler, Breĵnev kaj Kosigin!!!!

Morton al la agresantoj!

Venkon al la granda popolo de Ĉinio!

La lukto de la granda kaj amika ĉina popolo estas la lukto de ĉiuj

popoloj de la mondo kontraŭ la moderna reviziismo, kontraŭ la imperiismo kaj kontraŭ la faŝismo.

Vi, armitaj per la penso de Prezidanto Maŭ Zedong, scias malvenkigi kaj mortigi la bestajn agresantojn kaj vi scias defendi heroe vian sanktan teron kaj batali por la sendependeco ne nur via sed ankaŭ monda!

La sovetunia reviziismo estas malamiko por ĉiuj popoloj de la mondo, ĉar ĝi estas kontraŭ la ĉina popolo! Sovetunio estas perfida kontraŭ la libereco kaj sendependeco de ĉiuj popoloj de la mondo!

Vivu la heroa batalo de ĉina popolo kontraŭ la agresantoj!

Vivu la penso de Maŭ Zedong, kiu estas la estro de ĉiuj progresemaj kaj demokratiaj landoj en la mondo!

Letero de Ĉeĥoslovaka Leganto F.K.

Ĝis nun via gazeto plaĉas al mi. Interesaĵoj el Via vasta lando kun plej multnombra popolo, progreso en tekniko, kulturaj entreprenoj estas por mi altiraj. Bonkvalita papero, belkoloraj bildoj, bona Esperanto kaj veraj sciigoj.



Redakcia Respondo de "Spegulo de Imperiismo kaj de Reviziismo" al K-do Bonest

Kara amiko,

Nin regule atingis via skribaĵo, kaj ni trovas nun iomete da tempo por respondi al vi.

Pri nia organizo vi jam iomete scias, se vi bone tralegis nian gazeton SIR.

Ni estas samtempe esperantistoj kaj anoj de la LGC (m-l) d' I — Ligo de la Komunista (marksist-leninista) Junularo de Italio. Niaj politikaj celoj estas disvolvi klasbatalon en nia lando ĝis la liberigo de la laboristaro kaj de la popolaj amasoj, kiun oni atingos nur post la kompleta disfalingado de la kapitalisma sistemo. En tiu giganta batalo niaj plej gravaj aliancanoj estas kompreneble la liberigmovadoj de la subpremataj popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj Nigruloj, kiuj precipe en la lastaj jardekoj tiel pliiĝis la efikon politikan aŭ militan de la ribelo, ke kelkiuj el ili jam praktike atingis finan venkon kontraŭ la subpremantaj fortoj.

Niaj malamikoj estas la naciaj fortoj de la itala kapitalismo, kaj precipe la mastroj de la italaj kapitalistoj: la imperiistoj usonaj. Kiel la ekzemploj nuntempaj demonstras kristale klare, ne estas eble liberigi eĉ unu tercolon sen deviga opono kontraŭ la mondskalaj fortoj de la usonaj imperiistoj.

Tiun agadon inter la itala proletaro ni akompanas kun la agado inter la esperantistaro celante PERSVADI LA SAMIDEANOJN KE "nia kara lingvo" ESTAS REVO UTOPIA ĜIS KIAM LA MONDO ESTOS LIBERIGITA DE IMPERIISMO KAJ DE KAPITALISMO KIU PRODUKTAS ĜIN.

Fakte, kiam la laboristaro povas esti malriĉigata de la kapitalistoj, kiam la moderna procezo de ekspluatado ekzistas inter imperiistaj landoj kaj sklavigitaj popoloj, neniu racia homo povas esperi ke la ekspluatantoj prikonsideru la eblecon anstataŭigi sian lingvon en la rilatoj kun la sklavigita mondo, aŭ ke la malsatantaj hinduloj (el kiuj mortas 20 milionoj poĵare sekve de malabunda nutrado) preferu ekzemple esperantistiĝi anstataŭ serĉi akcepteblan solvon por siaj vivproblemoj.

Do, NIA CELO ESTAS ESPERANTIGI LA MONDON PERE DE LA NURA EFIKA RIMEDO: KOMUNISMA REVOLUCIO.

P. S. mendu la verkojn de Maŭ Zedong kaj zorge pristudu ilin. Mendu ilin ĉe ni, aŭ rekte ĉe ĈEL, PK 313, Pekino. VIVU MAŬ-ZEDONGPENSO!!!

El "Spegulo de Imperiismo kaj de Reviziismo", n-ro 5 (j.3), aprilo 1969

ĈINIO SUKCESE ELFARIS ALTKLASAN PULPON EL LARIKAJ FORĴETAĴOJ

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la revoluciaj laboristoj de Ŝihian-paperefabriko de la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Gilin-provinco, sukcese faris grandan eksperimenton pri fabrikado de altklasa pulpo el larikaj forĵetaĵoj kaj malfermis novan fonton de materialo por la disvolviĝo de la papera industrio de nia lando.

La sukceso de tiu scienca eksperimento faris novan kontribuon al la provizado de granda kvanto da papero por presi portretojn kaj verkojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, al la disvastigo de Maŭzedongpenso al la revolucia popolo de la tuta lando kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

Papero farita el tia altklasa pulpo por presi verkojn de Prezidanto Maŭ estas maldika sed nepenetrebla por presinko, blanka sed ne okulpika kaj senbrua dum foliumado. Tia papero tre plaĉas al la legantoj.

女兒 的 回 答

Nǚr de Huídā
(filino -a respondo)

Respondo de la Filino

我 下 班 回 来 的 时 候, 只 见 我 十 三 岁 的
Wǒ xiàbān huílai de shíhòu, zhǐ jiàn wǒ shí sān suì de
(mi de-labori reveni ... tempo nur vidi mi dek tri jaro -a
Kiam mi revenis post deĵoro, mi vidis ke mia 13-jara malgranda filino ĝuste faras

小 女 儿¹ 向 阳 正 在 做 世 界 语 练 习。我 问 她: “向 阳,
xiǎo nǚ Xiàngyáng zhèngzài zuò shìjièyǔ liànxí. Wǒ wèn tā: “Xiàngyáng,
malgranda filino Hiangjang ĝuste fari Esperanto ekzerco mi demandi ŝi Hiangjang
siajn Esperantajn ekzercojn. Mi demandis ŝin: “Hiangjang,

你 为 什 么 要 学 世 界 语 呢?²”
nǐ wèishénme yào xué shìjièyǔ ne?”
vi pro kio voli lerni Esperanto ...
pro kio vi volas lerni Esperanton?”

她 回 答 说: “为 革 命 呗!²”
Tā huídā shuō: “Wèi géming bei!”
ŝi respondi diri pro revolucio ...
Ŝi respondis: “Ja pro revolucio!”

我 点 头 说: “向 阳, 你 回 答 得 很 好。只 有
Wǒ diǎntóu shuō: “Xiàngyáng, nǐ huídā de hěn hǎo. Zhǐyǒu
mi kap-jesi diri Hiangjang vi respondi ... tre bona nur
Mi diris kapjesante: “Hiangjang, vi respondas tre bone. Nur per

树 立 起 为 革 命 而 学 世 界 语 的 思 想, 你 将 来 才
shùlìqǐ wèi géming ér xué shìjièyǔ de sīxiǎng, nǐ jiānglái cái
starigi pro revolucio ... lerni Esperanto -a penso vi estonteco ...
starigo de la penso lerni Esperanton pro revolucio, vi povos pli bone uzi la lingvon

能 更 好 地 使 用 世 界 语 这 种 语 言。”
néng gèng hǎo de shǐyòng shìjièyǔ zhè zhǒng yǔyán.”
povi pli bona -e uzi Esperanto tiu speco lingvo)
Esperanton.”

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas Esperanta traduko de la frazoj. Necesaĵ klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. Kiam 儿 er formas kun la antaŭiranta(j)

ideografaĵo(j) unu vorton, prononce ĝi perdas sian vokalon e kaj ĉesas esti memstara silabo, ekz., ĉe 女儿 (nǚ+er=nǚr).

2. Iuj vortoj en la ĉina lingvo, ne havas memstaran signifon, sed esprimas ĉefe la senton de la parolanto, ekz.: 呢 kaj 呗. En tiu ĉi leciono, 呢 esprimas senton de dubo kaj 呗 la senton, ke ĝuste pri tio temas, sed nenio alia.

La Bravaj Batalantoj kaj la Heroa


— Noto pri batalantoj de la Popola Liberiga Armeo en Dhofar-regiono sur

Sub la gvido de la Popola Fronto por Liberigi la Okupatan Araban Golfon, la popolo kaj la Popola Liberiga Armeo batalantaj en Dhofar-regiono sude en la araba duoninsulo, timante nek malfacilojn nek oferon, persistas en armita batalo kontraŭ la brita kolonia regado. En la batalo ili diligente studas brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam pli klare konsciiĝis, ke la saĝa tezo de Prezidanto Maŭ “El la pafilo venas la ŝtatpotenco” estas granda vero.

La revolucia armita batalo de la popolo en Dhofar peze batas la damnindajn imperiismon kaj koloniismon. Ĉiam pli forte flamas la incendio de la armita batalo en Dhofar.



Batalantoj de la Popola Liberiga Armeo en Dhofar kaj batalas kaj sin ekzercas por konstante levi sian batalkapblon.




Popolo

la araba duoninsulo



Gerilaj batalantoj profundiĝas en kamparon por mobilizi la popolamasojn kaj ricevis ilian subtenon. Jen gerilanoj kunvenas kun lokaj popolanoj.



Utiligante libertempon inter bataloj aŭ militaj trejnadaj, ili serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

La batalantoj de la Popola Liberiga Armeo en Dhofar kolektive diskutas gerilan taktikon antaŭ milita ekzercado.





Virinoj en Dhofar varme bonvenigas kamaradojn venintajn el Ĉinio.



La gerila taĉmento de Dhofar en militiro

Certe Bankrotos la Konspiro de Usonaj kaj Japanaj Reakciuloj

DE la 19-a ĝis 21-a de novembro 1969, Nixon kaj Sato en sia interparolado en Vaŝingtono ludis la trompan ruzon de "redono de Okinaŭa". La esenco de tiu artifiko estas tio, ke la usona imperiismo volas ŝanĝi Japanion en Okinaŭa-n, t.e. ŝanĝi la tutan Japanion en nuklean bazon libere uzeblan de la usona imperiismo kaj ebligi al la japanaj reakciuloj servi kiel ĝiaj sturmantoj en opozicio kontraŭ Ĉinio kaj la popoloj de la aziaj landoj. Tio estas serioza paŝo farita de la usona imperiismo kaj japana militarismo en pliintensigo de ilia milita koluzio kaj en freneza efektivigo de ilia milita kaj agresiva politiko en Azio.

Depost la Dua Mondmilito, la usona imperiismo ĝis nun okupas la japanan teritorion Okinaŭa, ŝanĝis ĝin en sian gravan agresan apogpunkton

sur la okcidenta Pacifiko kaj faris ĉiajn agresajn kaj militajn krimojn utiligante tieajn militajn bazojn. Ĝuste de tiuj bazoj bombaviadiloj B-52 de la usona imperiismo flugas al Vjetnamio por fari senbridajn kaj frenezajn bombadojn. La japana popolo ripetade levis potencon movadon kontraŭ la usona imperiismo por senkondiĉe repreni Okinaŭa-n kaj forpeli la usonajn rabistojn el Japanio. Por trompi la japanan popolon kaj la publikon de la mondo, mildigi la kontraŭuson senton de la japana popolo kaj kovri siajn ĉiam pli intensigatajn militajn koluziojn kaj militpreparon, la usonaj kaj japanaj reakciuloj de longe jam sekrete planis trompan ruzon de "redono de Okinaŭa". Fakte, la usona imperiismo absolute ne forlasos la gravan agresan apogpunkton Okinaŭa, kaj eĉ kiam la usonaj kaj

La japana popolo okazigas mitingon kontraŭ la reakciuloj de Usono kaj Japanio.



japanaj reakciuloj senĉese ellasis fumkurtenon pri “redono de Okinaŭa”, la usona imperiismo ankoraŭ pliintensigis la konstruon de militaj bazoj sur Okinaŭa. Oficistoj de la usona nacidefenda ministerio senkaŝe esprimis, ke por ili “la plua ‘libera uzado’ de Okinaŭa estas grava”. En sia interparolado kun Sato, Nixon nur nebule esprimis, ke la “administra rajto” super Okinaŭa estos redonita al Japanio en 1972, sed la nukleaj bazoj de la usona armeo konstruitaj sur Okinaŭa estos ankoraŭ konservataj senŝanĝe, nome, la usona imperiismo ankoraŭ povos libere uzi tiujn bazojn por fari agresan militon. Tio jam plene malkaŝis la mensogon pri “redono de Okinaŭa”.

La trompa ruĝo de “redono de Okinaŭa” kovras grandan intrigon, nome, Okinaŭa forme fariĝos parto de la japana teritorio, do tio signifas ke la usona imperiismo povos konstrui nukleajn bazojn en ĉiuj aliaj teritoriaj partoj de Japanio. Pri tio, frue en januaro, 1969, kiam la usonaj kaj japanaj reakciuloj komencis kontakton pri la problemo de “redono de Okinaŭa”, japana altranga oficisto foje malkaŝis, ke Usono jam postulis, ke Japanio “permesu al nukleaj submarŝipoj de Usono portantaj misilojn Polaris eniri havenojn de Japanio”, kiel “minimuma kondiĉo” de redono de Okinaŭa al Japanio. En komenco de februaro, la japana ministro de fremdlandaj aferoj Kiiĉi Aiĉi diris en la

parlamento, ke Japanio “eble konsentos” tion. La usona ĵurnalo *Los Angeles Times* malkaŝis, ke Sato faris kun Nixon sekretan naciperfidan negocon en Usono kaj konsentis ke Usono povos apliki tujan agon en la bazoj en Japanio por fari agreson “sen permeso de Japanio”. El tio oni klare vidas, ke la redono de Okinaŭa fare de Usono estas falsa, ĝia reala intenco estas turni Japanion en nuklean bazon de Usono. Tiamaniere, la usona imperiismo povas pliintensigi sian militan kontrolon super Japanio, pli firme ligi Japanion al sia militĉaro kaj devigi la japanajn militarismajn fortojn agi kiel instrumento de usona agresiva milito.

Kaj krome, la usonaj kaj japanaj reakciuloj intencas utiligi la trompan artifikon de “redono de Okinaŭa” por malfermi vojon al la japanaj militarismaj fortoj ekspedi trupojn al fremdlandoj. Post kiam Okinaŭa forme estos donita al la japana teritorio, la japanaj reakciuloj povos ekspedi trupojn al Okinaŭa por garnizonado kaj efektiviĝi “komunan defendon” kun agresaj trupoj de la usona imperiismo, sub la preteksto defendi la t.n. japanan teritorion. La usonaj militaj bazoj en Okinaŭa estas ganglio interliganta la agresivajn militajn traktatojn kontraktitajn de Usono kun Ĉiang Kajŝek kaj Pakjunghi. Aplikante la “japan-usonan sekurecan traktaton” al Okinaŭa, la usonaj kaj japanaj reakciuloj permesas al Japanio



La japanaj revoluciaj popoloj protestas kontraŭ la milita konspiro de la usonaj kaj japanaj reakciuloj.

Tenante la sloganojn oponantajn kontraŭ la uson-japana "komuna komuniko" kaj laŭte kriante "Frakasu la japanan-usonan sekurecan traktaton", "Faligu Sato-registaron" k. a., la japanaj revoluciaj popoloj okazigas grand-skalan protestan manifestacion.



ekspedi trupojn al Okinaŭa, kaj tiel ligis Japanion al tiuj agresivaj militaj traktatoj. Tio estas ne nur nova paŝo en la kovata nova agresiva milita alianco kun Usono kiel pup-ludanto kaj kun Japanio kiel grava rolulo, sed ankaŭ signifas, ke la japanaj agresaj trupoj povos partopreni agresan militon de Usono sub la preteksto "defendi japanan sekurecon". Laŭ raporto, sub direktado de la usona imperiismo, la japana "Defenda Agentejo" jam faris projekton de "plano de defendo de Okinaŭa" por ekspedi trupojn al Okinaŭa. Eisaku Sato arogante kriaĉis pri enstreko de la sankta teritorio de Ĉinio Tajvan-provinco, suda Koreio kaj eĉ Hinduĉinio en influan sferon de Japanio. La usonaj kaj japanaj reakciuloj planas ekspedi japanajn trupojn eksterlanden por ke Japanio ludu la rolon de azia ĝendarmo en servo al la usona imperiismo por subpremi la naciliberegajn batalojn de la aziaj popoloj. Jen la intenco de usona imperiismo kiu lasas japanion ludi la "ĉefan rolon" en Azio.

Sub la preteksto de "redono de Okinaŭa", la japanaj militarismaj fortoj plirapidigas armeekspansion kaj militpreparon por akomodigi al la bezono de la usona imperiismo. La reakcia Sato-registaro distruptetis, ke Japanio jam akiros plenan sendependecon post la "redono de Okinaŭa" al Japanio kaj konstruos la t.n. "memstaran defendon". Estas malkaŝite, ke la kvara armeeks-

pansia plano projektata de la japana "Defenda Agentejo" havas skalon pli ol duoble tiom grandan kiom la tria armeekspansia plano, kaj ĝia grava punkto estas plifortigi la aerarmeon kaj mararmeon, ekipi la japanan armeon per ofensivaj armiloj inkluzive nukleajn armilojn. Dum sia vizito al Usono en novembro 1969, Sato jam faris garantion al siaj usonaj mastroj, ke Japanio "prenos sur sin pli grandan devon" por militaj aventuroj de la usona imperiismo kaj "plenumos internacian devon kaj rolon konformajn al la forto de Japanio".

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: "Ĉiuj agresantoj kaj iliaj lakeoj en la mondo estos enterigitaj, kaj la tago por tio ne estas tre malproksima. Ili certe ne povos eskapi."

La historio estas rigora. La usona imperiismo kaj japana militarismo estas venkitoj de la aziaj popoloj. Ili provas plirapidigi sian militan konspiron por denove ataki la aziajn popolojn, sed tio similas al ambicio de formikoj kiuj deziras skui arbegon, supertaksante sian forton. Hodiaŭ, kiuj decidas la azian sorton, estas la aziaj popoloj, sed ne la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj ĉiuj reakciaj fortoj. Obstine persistante en malamikeco kontraŭ la aziaj popoloj, la usonaj kaj japanaj reakciuloj nepre kaŭzos pereon al si mem. La ĉina popolo firme kondukos batalon kune kun la aziaj popoloj kaj nepre enterigos la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn!



JAPANAJ LABORISTOJ KAJ STUDENTOJ PROTESTIS KONTRAŬ LA REAKCIA SATO-REGISTARO PRO MURDO AL PROGRESEMA STUDENTO

Posttagmeze de la 14-a de decembro, 1969, 8,000 laboristoj, studentoj kaj aliaj urbanoj de Japanio okazigis kunvenon en Hibija-parko de Tokio por indigne kondamni la reakcian Sato-registaron pro ĝia murdo al progresema studento de Okajama-universitato, kaj

La revolucia batalo de la japana popolo torento disvolviĝas antaŭen. Jen laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj urbanoj faras protestan manifestacion antaŭ la "parlamentalo", alte tenante la grandan standardon "oponi imperiismon kaj reviziismon".



firme decidis konduki ĝisfine la batalon frakasi la japan-usonan "sekurecan traktaton".

En siaj paroladoj ĉe la kunveno multaj reprezentantoj rigore riproĉis, ke la uson-japana reakciularo freneze subpremis la patriotan batalon de la japana popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj intensigis armeekspansion kaj militpreparon intrigante por lanĉi novan agresan militon.

En la kunveno iu juna laborista reprezentanto emfaze montris, ke en la batalado kontraŭ la uson-japana reakciularo, la japanaj laboristoj firme decidis plifortigi kaj pligrandigi siajn vicojn por plue ludi la rolon de ĉefa forto kaj disvolvi pli profunde la patriotan batalon kontraŭ la usona imperiismo.

Post la kunveno, spite al subpremo de la reakciaj policistoj, la kunvenantoj okazigis manifestacion, tenante la ruĝajn flagojn kaj laŭte kriante la sloganojn "Frakasu la japan-usonan 'sekurecan traktaton'!" k. a.

NOVA TAJDO REFOJE LEVITA DE LA USONA POPOLO KONTRAŬ LA AGRESA MILITO EN VJETNAMIO

Je la 13-a kaj 14-a de decembro, 1969, la usona popolo refoje levis novan tajdon kontraŭ la agresna milito en Vjetnamio. La popolamasoj en Novjorko, Vaŝingtono kaj aliaj kelkaj ĉefaj urboj okazigis respektive mitingojn kaj manifestaciojn por forte postuli, ke la Nixon-registaro tuj ĉesigu sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio kaj komplete retiru la usonan agresan armeon el la suda Vjetnamio.

Tiu ĉi manifestacio de la usona popolo kontraŭ la agresna milito en Vjetnamio estas daŭrigo de la du grandaj landskalaj manifestacioj kontraŭ la agresna milito en Vjetnamio, okazigitaj de pli ol miliono da usonaj popolanoj respektive en oktobro kaj novembro de 1969. Tio estas forta bato al Nixon, kiu nun faras trompaĵon de t. n. "paŝpostpaŝa trup-retiriĝo" el la suda Vjetnamio.

En la 13-a, pli ol 1,000 laboristoj, studentoj kaj instruistoj de Novjorko, la plej granda urbo en Usono, okazigis mitingon por protesti la agresan militon en Vjetnamio kaj postulis, ke la Nixon-registaro tuj finu la agresan militon en Vjetnamio. En la ĉefurbo Vaŝingtono, amasoj da popolanoj okazigis maldorman manifestacion ekster la Blanka Domo je la nokto de la 12-a.

En Detroit, unu el la plej grandaj industriaj urboj de Usono, kaj en Oceanside de Kalifornio ĉe la okcidenta bordo, ankaŭ miloj da popolanoj okazigis mitingojn kaj firme postulis, ke la Nixon-registaro tuj finu la agresan militon kontraŭ Vjetnamio kaj retiru la tutan usonan armeon el la suda Vjetnamio.

Usonaj popolanoj okazigas en Vaŝingtono grandskalan manifestacion por protesti kontraŭ la agreso fare de la usona reaktia registaro kontraŭ Vjetnamio.



MANIFESTACIOJ DE KVINCENT MIL ITALAJ MALRIĈAJ KAMPARANOJ

En la 13-a de decembro, 1969, kvincent mil italaj malriĉaj kamparanoj okazigis manifestaciojn en multaj urboj kaj urbetoj tra la lando por oponi la kruelan ekspluatadon de la bienularo.

En Italio, precipe en la ekonomie postiginta sudo, pro la kruela ekspluatado de bienularo, multaj malriĉaj kamparanoj fuĝis de sia hejmloko al aliaj lokoj aŭ eksterlanden pelate de la vivo, kaj iuj eĉ devigite forvendis siajn infanojn.

Sub la kruelaj subpremado kaj ekspluatado de la bienularo kaj la monopola burĝaro, la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj pli kaj pli vekigis. Ili brave leviĝis al batalo, multfoje okazigis manifestaciojn kaj strikojn, eĉ okupis fervojajn staciojn kaj blokadis fervojan trafikon. La reciproka respondo en agado inter la malriĉaj kamparanoj kaj la laboristoj kaj studentoj formis ŝtormon de la popola batalo, kiu donis ĉiam pli furiozan baton al la italaj reakciaj regantaj klasoj.

Studentoj kaj laboristoj en Milano de Italio, ne timante perforton, faras bravan batalon en la burĝara tribunalo kaj indigne protestas kontraŭ kruela subpremo fare de la itala reganta klico al studenta kaj laborista movadoj. Sur la foto, alte tenante Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong, brave faras batalon la studentoj "pridemandataj" de la reaktia instanco.



Korespondi Deziras

*Albana juna esperantisto Ilir Pistoli deziras korespondi kun esperantistoj de Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Afriko kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. La adreso: RR. F. Rada Pall. M. Ndertimit Sh 1/8, Tiraneo, ALBANIO

*Rubena Dorno, dez. kor. kun junaj geesperantistoj. Lia adreso estas Casilla 814, Vina del Mar, Chile

*21-jara kanada studento Larry Leduc dez. kor. kun junaj geesperantistoj pri diversaj temoj. La adreso: P. O. Box 72, Pine Grove, Ont., Canado

*Jugoslava esperantisto Zvonimir Marovic dez. kor. Lia adreso: ul. Jua Bogdana 13, Sarajevo, Jugoslavio

*Esperantisto-amiko Wolfgang Warmuth, dez. kor. La adreso: 50 Erfurt/DDR, Weimarische Str. 29, Germanio/DDR

Vortoj de la Redaktoro

Kara leganto, se vi volas aperigi vian anonceton pri korespondo en nia revuo, bonvolu skribi al ni viajn nomon, adreson, aĝon, profesion kaj intereson prefere en presliterato por eviti erarojn.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (139) 1970

Ĉefa Enhavo

Gratula Telegramo de Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin kaj Ĉefministro Ĝou al Kamaradoj Enver Hoxha, Haxhi Lleshi kaj Mehmet Shehu

Kunveno en Pekino por Celebri la Brilan Festtagon de Albanio

La Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio Revenis de Albanio al Pekino

Grandiozaj Atingoj de Albanio en Industrio

La Socialisma Agrikulturo de Albanio en Prospero

Luo Ĉundi kaj Ŝia Virina Montekspluata Taĉmento

Mi Fariĝis "Nudpieda Kuracisto"

Bi Jinglan — Bona Filino de la Partio

Superba Poemo de Unuiĝo kaj Batalo

Sunradioj Prilumas Ĵentun-vilaĝon

Diverslandaj Popoloj Amas Prezidanton Maŭ

Hodiaŭa Ĝangiang-haveno

Novaj Kontribuoj de la Akupunktura kaj Kaŭteriza Terapio Unua Vizito al Dongŝan

Kiam Mi Laboris Kune kun Laboristoj

Hjue Sanzi Sindonema por Savi Aliajn

Certe Bankrotos la Konspiro de Usonaj kaj Japanaj Reakciuloj

Sur la Kovrilo:

Kinvong, tibeta "nudpieda kuracistino" tutkore kaj tutanime servanta al la popolo, feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kiam ŝi venis al Pekino por celebri la 20-an datrevenon de la Nacia Festo en 1969. Jen ŝi estas kun jaŭ-nacia virino Ĝaŭ Hiuĵing.

Sur la Dorskovrilo:

Persiste plenumante la principon de sinapogo sur la propraj fortoj kaj peniga luktado, la produkta grupo Dongfeng de la komunumo Hinŭ de Junhian-gubernio denove akiris riĉan rikolton de greno. Jen kamaradino Jang Hiaŭsan batalas sur la produkta fronto kune kun aliaj komunumanoj.

Ki Dianjun kaj la Produkta Grupo sub Ŝia Gvido

Kamaradino Ki Dianjun, kompartiano kaj politika estro de la produkta grupo Hiaŭhiang de Guangming-komunumo, Juŝu-gubernio, Gilin-provinco, estas modelo fame konata de la tuta provinco.

Hiaŭhiang estis malriĉa loko, kie montetoj estas multaj, grundo sterila, kaj ĉiuj agroj dislokiĝas en dek ravinoj, sur ses montkrestoj kaj tri deklivoj. Antaŭ la jaro 1963 la pomua produktokvanto de greno estis nur ĉirkaŭ 65 kilogramoj kaj la tie produktitaj grenoj ne sufiĉis por plenumi la tiean bezonon.

Kune kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kamaradino Ki Dianjun pene bataladis kun revolucia spirito kontraŭ la naturo, kontraŭ la klasaj malamikoj kaj ĝisfunde ŝanĝis la fizionomion de "malriĉeco kaj postrestinteco". En la jaro 1968, kvankam tiu loko suferis gravan katastrofon de sekeco, tamen ĝia meznombra pomua produktokvanto atingis 335 kilogramojn kaj ĝi subite fariĝis grupo kiu akiris plej altan pomuan produktokvanton de sekkampoj kaj liveris grenon al la ŝtato. Krom akumulo de ĉirkaŭ dekmil *yuan* kiel komuna fonduso, nun tiu grupo posedas 14 ŝarĝbrutojn, tri ĉarojn, unu mantraktoron kaj maŝinojn por draŝado, sarkado, muelado ktp.

Alte tenante la flagon de solidareco kaj venko, la popolanoj de Hiaŭhiang, plenaj de heroo sento, decidis gajni pli grandajn venkojn en revolucio kaj produkto sur la vojo de socialismo.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ kamaradino Ki Dianjun (*la meza*) energie faras politikan kaj ideologian laboron kaj ofte korverŝas kun siaj grupanoj.






Supre maldekstre: Ki Dian-
jun studas Vortojn de Pre-
lanto Maŭ Zedong kune
kun komunumanoj.



Maŭzedongpenso profunde penetras en la koron de la popolanoj. Jen lernanto
entuziasme legas ĵurnalon por paŝtistoj.

Sube maldekstre: Bajtoŭ-
goŭ, kie oni ne povis
kreskigi grenplantojn an-
taŭe, nun fariĝis kampoj
riĉa rikolto.



Helpate de membro de la PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso
kunvenas la familianoj de Gaŭ Ĉungeng de Hiaŭhiang-grupo por kune batali
kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon.





Kamaradino Ki Dianjun kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hiaŭhiang havas ardan koron kaj altan batalvolon kaj estas plenaj de memfido pri sia venko.

Supre dekstre: Nun
Hŭiŭhiang-grupo jam
havas sian mantrakto-
n.



Sube dekstre: Kun la re-
volucia spirito timi nek
alfacilojn nek morton,
aŭhiang-anoj kons-
uis digojn per elfosita
imo, plivastigis lage-
ojn sur montoj por
jni pli grandajn ven-
ojn en revolucio kaj
produkto.



